



# LA RONDO

*The Australian Esperanto Monthly*  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (ink. membrecon de A.E.A.) Anoncoj: Tri linioj—4\$.

---

Redaktoro: F. R. Banham, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.	Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell-st., N.16, Vic.	A.E.A. adreso: Box 2122T, Elizabeth-st., Melbourne.
--	---	--

---

Vol. 10, N-ro 48.

MELBURNO.

JAN. - FEB., 1952.

---

## LA OKA TUTAŬSTRALIA ESPERANTO - KONGRESO

31 Dec. 1951 - 6 Jan. 1952 en Sydney.

Aere, ŝipe kaj trajne nia verda fratero alveturis Sidnejon por partopreni la okan tutaŭstralian Esperanto-kongreson. Ĉiuj ŝtatoj, escepte de Tasmanio, estis reprezentataj kaj eĉ la Perth-anojn ne timigis la longa distanco kaj grandaj vojaĝkostoj. Partoprenis la kongreson sesdek anoj, el kiuj pli ol la duono estis vizitantoj. Kaj vere internacia kongresnaro ĝi estis, ĉar inter ili troviĝis anoj de 13 diversaj landoj.

Bedaŭrinde la loka sekretario, s-ano E. W. Chandler, sur kies ŝultroj kuŝis ĉiuj antaŭlaboroj, malsaniĝis antaŭ la kongreso kaj pro tio ne havis la eblecon ĉion prepari tiel bone kiel oni kutime atendas. Tamen improvizioj de aliaj komitatanoj ŝtopis la breĉon. S-ino E. Kleussendorf ne nur penadis havigi al ĉiu kongresano sufiĉe komfortan loĝejon kaj renkonti ĉiujn ĉe haveno kaj stacidomo, sed eĉ mem gastigis lastmomentajn alvenintojn. S-ano Kevin Smith laboregis kiel sklavo multflanke: aranĝi ekskursojn, informi ĵurnalistojn, prepari manuskripton por radioparolado, organizi diservon. Sed speciale menciinda estas s-ano Matasin, kies senlaca laboro ebligis surprizan sukceson de la kongresanojn; dum la tuta kongreso. Li loĝigis kaj gastigis semajno li servis kiel veturigisto kaj li disponigis al la kongreso tiom da maŝinoj ke finfine oni donis al li la ŝercnomon "motorigita esperantisto." Sian privatan aŭtomobilon li uzis kiel taksion; sian ŝarĝaŭtomobilon li pruntedonis por ekskurso; lian skribmaŝi-

non ni uzis por la kongreslaboroj; lia voĉregistrilo provis distron ĉe du festvesperoj; kaj lumbildaparato kune kun du filmaparatoj savis la filmvesperon.

La kongreso okazis en la bela halo de la "Instruista Federacio," rekte en la urbcentro. Ne ekzistis, bedaŭrinde, eblecoj vendi librojn, kutima aranĝo ĉe kongresoj, ne nur por plibonigi la financon staton de la organizo, sed speciale grava por izolitaj esperantistoj kiuj nur dum kongresoj povas vidi, elekti kaj aĉeti librojn.

### Gazetara Konferenco

La A.E.A. sekretario, s-ano Herbert Koppel, estis komisiita de la kongreskomitato aranĝi la gazetaran kaj radian propagandon. Li invitis reprezentantojn de la Sidnejoj gazetoj al speciala konferenco en la Gresham Hotelo, kie loĝis la plimulto de la kongresanoj. Sur unu tablo estis ekspoziciitaj ĉiuj Esperanto-gazetoj de la mondo, kaj sur alia turistbroŝuroj kaj gravaj libroj (kiel verkoj de Shakespeare, la Biblio) Ĉiuj gazetoj sekvis la inviton kaj sendis reprezentantojn. Kongresanoj, intertempe libere interbabiladis en la sama salono kaj estis ĉemane kiam s-anoj Kevin Smith kaj Koppel deziris prezenti ilin al la ĵurnalistoj por intervjuoj. La ĵurnalistoj inspektis kun intereso la ekspoziciitan materialon kaj sekve de tiu-ĉi gazetara konferenco aperis ne nur multaj artikoloj en la Sidneja gazeto, sed la Telegrafa Agentejo "A.A.P." (Australian Associated Press)

kaj aliaj gazetaraj agentejoj transprenis la novaĵojn pri Esperanto kaj la kongreso kaj disvastigis ilin tra la tuta kontinento.

Ankaŭ okazis du radio-paroladoj pri la kongreso. Ambaŭfoje parolis s-ano Kevin Smith. Unu disaŭdigo okazis ĉe la plej granda privatkomerca radiostacio 2GB kaj la alia en la tutaŭstralia elsendo de ABC (Australian Broadcasting Commission).

#### **Katolika Diservo**

S-ano Kevin Smith multe penadis aranĝi la diservon. Ĝi okazis en St. Patrick's preĝejo, ĵaŭde, 3 Jan. Kapucena Patro Dominic celebris la meson, je kiu helpservis ankaŭ nia s-ano Smith kaj predikis esperantlingve nia samideano Patro Sigismund. Nur antaŭnelonge Patro Sigismund enmigris Aŭstralion el Eŭropo. Estante Polo li estis arestita de la Nazi-germanoj post la eksplodo de la milito kaj internigita en la koncentrejo Dachau, kie li organizis "subteran" Esperanto-grupon al kiu apartenis anoj de 14 subpremitaj eŭropaj nacioj.

Vere estis neforgesebla momento kiam aŭdiĝis la vortoj de nia Majstro el la predika katedro, kiam Patro Sigismund citis i.a. la "Vojo"-n. Sendube, la diservo estis la plej digna ero de la tuta kongreso.

#### **Kongresa Laboro**

Post neformala diskutvespero marde, 1 Jan., kiam oni ĝenerale diskutis la farotajn kongreslaborojn, okazis merkrede, 2 Jan., la malfermo de la kongreso. S-ro Bennett nome de la Sydney Esperanto-Societo bonvenigis la ĉeestantojn kaj laŭtlegis multajn salutleterojn el transmaraj landoj.

Sekvis paroladetoj de Novaŭstralianoj. S-anoj Karl Hunhold (de Hannover-Germanujo), P. Dikštejn (de Varsovio-Pollando) kaj V. Koseff (de Bulgarujo) emfazis ke pere de Esperanto ili pli rapide alktimigis sin al la nova lando kaj ke ili ĝojas vidi ke ankaŭ ĉi-tie vivas la Interna Ideo de Esperanto.

Kun bedaŭro ni devis konstati ke nia altŝatata prezidanto Doktoro Caldera ne povis ĉeesti la kongreson. Sed feliĉe kristaliĝis el la kongresanaro nova taŭga gvidanto. S-ano A. Towsey, instruisto el Parkes (N.S.W.) kaj mem lingvisto, scipovante multajn lingvojn (inter ili eĉ la japanan) estis elektita kiel kongresprezidanto kaj

vere majstre gvidis la diversajn kongreslaborojn. Kiel vicprezidanto oni elektis D-ron Fridenbergs (Melbourne) kaj kiel oficialan protokoliston s-inon Fay Koppel (Melbourne).

Laŭ propono de la kongresprezidanto oni elektis kvar komitatojn kiuj dum la sekvantoj 2 tagoj zorge preparolis la diversajn problemojn. Ĉe la ferma kunsido, vendrede, 4 Jan. unu ano el ĉiu komitato raportis al la kongresanaro, kiu poste pridiskutis kaj akceptis la jenajn proponojn:

#### **A.E.A. aferoj kaj "La Rondo":**

(1) "La Rondo" devas enhavi pli da materialo pri la en-tio-kaj-eksterlanda movadoj kaj pro tio publikigu krom la "Australia Kroniko" ankaŭ tutan paĝon en angla lingvo pri la progreso de Esperanto en aliaj landoj. Kvarfoje jare aperu sur la unua paĝo varbartikoloj en la angla lingvo. Se eble oni dediĉu kvaronan paĝon al infanoj. Oni esprimis la deziron ke la redaktoro uzu estonte pli popularan stilon kaj por la Esperanto kaj por la angla tekstoj.

(2) Plialtigi la membrecon (kun abono) de 10 ŝ al 12/6. Parto de la profito de la libroservo uzota por la "R" kondiĉe ke sufiĉe da reklamoj aperu pri librovendado.

(3) D-ro Fridenbergs, kiel juristo, estas komisiita ellabori pli demokratajn kaj elastajn statutojn.

#### **Libro-Servo:**

(1) Ĉiuj kluboj sekvu la ekzemplon de la Perth-a klubo kaj aranĝu de tempo al tempo libro-varbvesperojn.

(2) Por kuraĝigi la klubojn vendi pli multe da libroj ili ricevos estonte 10%-an rabaton por la klubkaso.

(3) Pli da anoncoj devas aperi en la Rondo reklamante librojn.

(4) Oni elektu instruistojn por la Koresponda Kurso en ĉiu ŝtato.

#### **Propagando:**

(1) Lokaj kluboj komisiu unu estraron kiu okupas sin pri propagando.

(2) Aranĝi prelegojn pri E-o en diversaj organizoj kun universalaj celoj kaj kontakti sindikatojn, geskoltojn kaj similaj organizoj.

(3) aperigi artikolojn pri pli gravaj klubaranĝoj en la loka gazetaraj kaj aranĝi ekspoziciajn fenestrojn en lokaj magazenoj.

**Instruado kaj Aŭstraliaj Ekzamenoj:**

(1) Daŭrigi la "Austr. E.-Societon de Instruistoj" kaj gian organon "La Klerigo" (Aktivaj membroj pagas 5/-, subtenantoj 2/6).

(2) Turni sin al la registaro de ĉiu ŝtato por instigi enkondukon de E-o en la lernejoj.

(3) Alparoli la organizojn de la Gepatroj kaj Komitatoj de Lernejoj por akiri ilian subtenadon ĉe la edukaj aŭtoritatoj.

(4) A.E.S.I. kompilu 2 jaran lern-programon de E-instruado en kunlaboro kun la aprobataj E-ekzamenoj. La programo estu poste utiligata de la tutaŭstralia klubaro.

Post voĉdono pri la proponoj okazis la novelekto de la A.E.A. estraro. Elektigis la jenaj samideanoj:

Prezidanto: S-ro K. Linton (Melburno)

Vicprezidanto: S-ro A. Towsey (Parkes, N.S.W.)

Sekretario: S-ro Herbert Koppel ((Melbourne))

Kasisto: S-ro E. McKenzie (Melburno)

Estraranoj: F-ino O. Stempel (Perth)

F-ino W. Addis (Adelaide)

Kaskontrolisto: S-ro A. C. Boyle (Sydney).

La novelektita prezidanto s-ano K. Linton transprenis la prezidantan seĝon. Li speciale atentigis la anaron pri la meritoj de la lasta prezidanto Doktoro Caldera, sub kies gvidado la movado multe progresis. Speciale menciinda estis la klopodoj de Doktoro Caldera, en kunlaboro kun Pastro Cowling, pri la starigo de Aŭstraliaj Ekzamenoj. Laŭ propono de s-ano Koppel oni unuanime decidis sendi al Doktoro Caldera la sekvan tan saluttelegramon (en Esperanto):

"CEESTANTOJ DE OKA AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO KORSALUTAS DAN-KANTE PRO FARITA CELKONSCIA LABORO."

**S.A.T. Fakkunsido**

Membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda aranĝis en la kadro de la kongreso la unuan tiaspecan fakkunsidon en Aŭstralio. S-ino Grace Barlow, kiu lastatempe multe klopodis pri SAT-aferoj estis elektita Aŭstralia S.A.T. Peranto. Oni decidis propagandi Esperanton speciale inter

la diversaj sindikatoj kaj laboristaj vesperlernejoj.

**La 9-a en Perth**

Laŭ propono de s-ro Mataŝin kaj D-ro Fridenbergs oni decidis ke la 9-a Aŭstralia E-Kongreso okazu de la 2-a ĝis la 7-a de Januaro 1954 en Perth. La Prezidantino de la Okcident-Aŭstralia E-Ligo, f-ino O. Stempel, promesis ke la Ligo faros sian plej eblon por ke la kongreso fariĝu granda sukceso.

En sia **Ferma Parolado** D-ro Fridenbergs emfazis ke Esperantisto estas pli ol nura membro de E-klubo, ne nur homo de karno sed de spirito, ne materialisto sed idealisto, kiu preter sian malgrandan cirklon vidas la vastan, belan mondon. Eksonis "La Espero", kiun ĉiuj kantis starante.

**Distraj Aranĝoj**

La kongresanoj ne nur laboris sed trovis ankaŭ tempon por amuzo. Novjara festeto estis la komenco de la amuza programo. Boatekskurso ĉirkaŭ la belega haveno en brila sunlumo, sekvis, 1 Jan., agrablan lunĉon en la Botanika Ĝardeno. Interesa rondveturo donis la oportunon vidi la urbajn vidindaĵojn kaj plurajn belegajn strandojn (jaŭde, 3 Jan.).

La **"Internacia Koncerto"**, vendredvespere, 4 Jan., provizis agrablan kontraston kun la seriozezo de la samtagaj fermkunsidoj. Proks. 300 personoj plenigis la salonon. S-ino Monckton aranĝis bonan programon: Skota muzikistaro, hungara dancistino, nederlanda akordeonisto, trio da flutistoj kaj bonega ĉina trombonisto estis nur kelkaj el la multaj programeroj. Kompreneble ne mankis Esperantantoj: s-ino Ila Brewer (la filino de s-ro Bennett) bele kantis; f-ino O. Stempel amuze deklamis; s-roj Bennett kaj Chandler alparolis la neesperantistojn propagandecle.

Sabate, 5 Jan., la anaro ekskursis tuttage per aŭtomobiloj al la belaj "Bluaj Montoj". Post minacantaj pluvejoj en la mateno, la vetero pliboniĝis tagmeze kaj ni pasigis agrablan tagon.

Postkongresa okazo kiu meritas mencion estis ĝuinda festvespero en la domo de s-ino Kluessendorf (marde 8 Jan.) kiu regalas nin per bongustaj manĝaĵoj. Denove muzikaj eroj kaj je la fino unu reprezentanto de ĉiu ŝtato esprimis dankon al la gastigan-

tino kaj la Sidnejanoj. En malfrua horo venis la neevitebla adiaŭo: GIS LA REVIDO EN PERTH 1954!!

### MAJSTROVERKO DE IMPROVIZO

estis la Oka Kongreso en Sidnejo. La ekscito de la vojaĝantoj pro la ĝislastmomenta manko de programo iomete kvietiĝis, kiam en la fino de decembro en "la Rondo" la programo aperis. Neniu miris pri tio ke mankis malferma kaj ferma paroladoj, prelegoj kaj lekcionoj, ĉar oni jam sciis ke la Sidnejanoj kiel homoj de agado ne ŝatas vortajn torrentojn. Sed aliel ĉio aspektis kvazaŭ en ordo, ne mankis bonveniga vespermanĝo, teatra vespero, filmvespero, koncerto, kiel ordinare dum kongresoj.

La bonveniga vespermanĝo estis agrabla surprizo, ĉar, aranĝita en ĉina kafejo, ĝi emfazis la internaciecon de nia lingvo kaj samtempe estis bona propagandilo por la mirigitaj neesperantistaj klientoj, kiuj eble aliel neniam en sia vivo estus havintaj okazon ĝui la sonon de Esperanto. Bone, ankaŭ, ke ĉirkaŭ duonhoron la samideanaro povis atendi sur la trotuaro antaŭ la kafejo ĝis kiam oni aranĝis la tablojn por ili; oni do havis sufiĉan tempon kaj oportunon interkonatiĝi, babiladi kaj akriigi sian apetiton por la frandaĵoj, kiuj, cetero, estis vere bongustaj.

La teatra vespero konsistis ne el banala Esperantaĵo, prezentita de aktoroj diletantoj, sed el la klasika anglalingva komedio "Brigadoon." Sajne oni volis prezenti eblecon al tiuj, kiuj ne havis tempon viziti tiun teatraĵon en propra urbo, vidi kaj aŭdi ĝin dum ilia libertempo, kaj la novaŭstralianoj havis okazon plibonigi sian scipovon de la angla lingvo.

Nun ke la filmvespero ne okazis laŭprograme pro la neebleco de la organizantoj havigi al si filmojn, fakte ne estis malbonŝanco, ĉar la esperataj filmoj kiel klariĝis, nenian rilaton kun Esperanto havis. Sed por tio ni estis rekompenctaj per bonegaj filmoj en koloroj faritaj de s-ano Matasin, kiu kiel privata persono ĉie kaj ĉiam intervenis kun siaj aŭtomobiloj, kinoaparatoj, aliaj maŝinoj kaj ĉarma helpemo, kiam vakuo minacis la kongreson.

Same, s-ano Kevin Smith pruvis grandegan eltroveman kaj improvizan talenton en ĉiuj malklaraj situacioj, tiel ke mi decidis, ke li devas esti almenaŭ membro de la Kongresa Komitato; sed mia supozo estis erara—li estis nur bonulo, ĉar kongresa aŭ organiza komitato simple neniam ekzistis.

La koncerto estis interesa kaj multflanka, ne mankis Espreantaĵoj kaj ankaŭ profesiaj artistoj. Neforgesbla momento estis, kiam ĉina kantistino invitis la ĉeestantojn ekstari, por aŭskulti la nacian himnon de Ĉinujo en ĉina lingvo. Sed kiam ŝi, finante la ĉinan tekston per pugnosaluto, rekomencis la himnon anglalingve, multaj konjektis ke ili honorigis per starado la himnon de la Ruĝa Ĉinujo kaj sidiĝis denove. Tio certe fuŝis la ĝeneralan harmonion kaj senton de unueco de la homaro. Kelkaj homoj vere estas tro pedantaj . . .

Eksterprograma estis la ĵurnalista konferenco aranĝita de s-ano Koppel en la Gresham Hotelo. Aro da ĵurnalistoj alsvarmis kaj intervjuis ĉiujn pri ĉio, kaj la rezulto estis granda bruoj pri Esperanto en la presoj, tute ne malfavora. Raportistino de virina ĵurnalo eĉ eltrovis ke receptojn pri kukoj kaj manĝaĵoj de tuta mondo oni povas havigi al si pere de Esperanto—grava instigilo ĝin lerni.

Konklude, oni devas konstati ke la Sidnejanoj pruvis la eblecon aranĝi kongreson ankaŭ en ne-ortodoksa maniero. Finfine ili pravus, ĉar kongreso ja estas ne nur afero de la loka samideanaro, sed ankaŭ de ĉiuj la alveturantoj—ke ili sambone ekzercu sian kreadan fantazion. Krom tio, la beleco de Sidnejo, ĝia mirinda situo kaj la afableco de la gastiganta samideanaro estas tiaj, ke ĉiu aranĝo devas rezulti en sukceso. Kaj tial oni povas riski eĉ jungante ĉevalon malantaŭ la ĉaro: ĝi tamen veturos!!

—A.F.

### GELERNANTOJ ĈE BRISBANA ESPERANTO SOCIETO

petas korespondantojn pri diversaj temoj kaj poŝtmark-interŝanĝado. Skribu unue al la Sekretario: Miss E. B. Carrick, 167 Lytton Road, East Brisbane, S.E.I., Queensland.

### "PEER GYNT"

Drama Poemo de Ibsen. Tradukita de Erling A. Haügen. Eldono Rondo, Box 178, Trondheim, Norvegujo. Prezo (Angle) 10/6 broŝurita; 13/- bindita. 258 paĝoj; notaro kaj komentario.

Kion "Faust" signifas en la Germana literaturo, tion signifas "Peer Gynt" por la Norvega. Ĝi estas simbolisma satiro pri trajtoj aŭ inklinoj de la Norvega karaktero, kiel Ibsen vidis ĝin en sia tempo.

Peer estas enkarniĝo de la nedecidemo, de la malvolo dediĉi sin al difinita celrado. Li revadas, obsedate de fantazio pri estonta gloro kaj pasinta famili-grandiozo, nezorgante pri nunaj devoj kaj havante kiel religion la arton kompromisi, kaj fari nenian paŝon, kiun li ne povus returne paŝi.

Lia bona anĝelo estas virta junulino, Solvejg, sed amgajni ŝin postulus multe da penado, kaj Peer ne havas spiritan forton por tio. Li malsaĝe forportas Ingridon, edziniĝonton de alia, kaj fariĝas monda vagulo. La poemo priskribas lian iom-post-ioman degeneron, lian kunulecon kun la trojoj, kaj la senfruktan klopodon de Solvejg por levi lin al pli alta vivnivelo. Ni vidas lin kiel memaman mondumulon, kiu riĉiĝis per sklavovendado; post kiel pseŭdoprofeton en Afriko, amajantan kun Arabino. Fine li revenas, senluziĝinta maljunulo, al Norvegujo, kie li trovas, ke atendas lin butonmuldisto, kies tasko estas: fandi lin—rubajon—por ricevi el li denove krudan materialon. Sed li saviĝas per la amo de Solvejg, kiu fidele atendis lin dum multe da jaroj.

Haügen donas legindan tradukon malgraŭ la trokompakteco esprima, kiu karakterizas verkojn, kiaj la tradukoj de La Infero, Faŭsto, la Jugoslavaj eposoj kaj aliaj penantaj fideli al la originala versformo. Tradukistoj de "Peer Gynt" tre respektas la taskon de rimfara spegulado, kaj la aŭtoritata Angla traduko de s-roj Archer donas nur ritman. Ibsen diris, ke li lasus "Peer Gynt" netradukita prefere ol vidi ĝin proze vestita. Haügen brave luktis kun la rimo kaj grandgrade sukcesis.

La signifoj de la dramo estas: (1) la ĝenerale-homa satiro kaj simbol-

ismo pri la homa gento entute; (2) satiro pri la Norvega homnaturo aparte; (3) lokaj kaj tempaj aludoj, pri kiuj ne estas necese kompreni ilin por ĝui la verkon kiel tutajon. La edukaj veraj kaj admonaj riproĉoj vidigas klare kaj tuj-komprenate, malgraŭ iuj tekstlokoj, kie la denseco de la esprimrimedoj estas sence nekontentiga. Pro la naturo mem de la verko kiu naskis vastan koment-literaturon, eksterlandaj legantoj dezirus multe pli da klarigaj notoj, sed taŭge provizi tion postulus apartan libron pli grandan ol la poemo. Malgraŭ tiu manko, suprajemaj legantoj ĝuos la spriton de la rakonto, kaj aparte frandos paĝojn, ekzemple pri la amlogado al la Arabino Anitra, kiuj rememorigas pri la plej ridiga en "Don Juan".

La frivolaĵaj partoj aparte plaĉas, sed por plena kompreno de la folkloraj kaj popoldiraj elementoj seriozaj studentoj sin turnos al nacilingvaj pri-traktoj. Tio validas cetere por ĉiu grava produkto de la arta pensesperimo naskita en nacia kadro kaj destinita ĉefe por aparta popolo. La vera mondliteraturo, direktita al la Universala Homo, ankoraŭ ne aperis.

Per la oferemo de la tradukinto, kiu eldonigis la verkon proprariske, la Norvegoj povos fieri, prezentante trezoron de sia popolgenio al la Kongreso de Esperanto en Oslo, Aŭguston 1952.

Enklitikaj rimoj abundas: ĉar mi, svarmi; fusila, pri la; iam, ĝi jam; tiel, vi el; koke, do ke kaj aliaj. La rimarko de Butler (p. 14, Malgranda Revuo 1951), ke tiaj "nur okaze eblas", estas dube vera. Haügen pruvis la kampon tre fekunda.

### "ANTAŬ DU MIL JAROJ"

El la Portugala tradukis L.C. Porto Carreiro Neto. Eld. La Brazila Spiritisma Federacio, Avenida Passos 30, Rio de Janeiro, Brazil.

Tiu ĉi rimarkinda verko, preskaŭ 400-paĝa, pri la tempo de Jesuo Kristo, estis komunikita de spirito, Emmanüel, pere de mediumo, F.C. Xavier, neinstruita homo 40-jara. Temas pri unu el la reenkarnejoj de "malsupera" spirito, kiu lernas per doloroj la vojon al karaktera perfekteco. Xavier jam 41 verkojn skribis,

ne verkis, ricevinte ilin el la post-morta mondo.

Konvenece mi uzas la lingvaĵojn de la Brazilaj kristanoj-spiritistoj, estimindaj homoj, kiuj fidele, kaj utilege, uzas E-on en sia kulto.

Sub titolo "Intime kun Emmanuel," estas mesaĝoj donitaj de tiu spirito inter 24 Okt. 1938 kaj 3 Feb., 1939, per kiuj li anoncis sian intencon komenci la longan rakonton pri sia enkarigo kiel Publio Lentulus, Roma senatano. Tiun historion, aŭ "romanon", ni nun havas en bona prezento.

Ĝi estas certgrade psikologia studo pri mortinto, kiu en la tempo de la Katalina Konspiro, en kiu li ludis kriman rolon, ricevas ordonon de la alimondaj juĝistoj denove suriri la teron, por tie travivu ankoraŭ unu vivon, en kiu li devos batali kontraŭ sia ennaska fiero kaj malhumilo, cele al pli pura animstato. La diaj juĝistoj avertas lin, ke li paŝos en medion, kie disvolviĝos epokfaraj aferoj. Tio realiĝas. Li venas en kontakto kun la Dia Galileano, kies personeco funde efikas sur lian psikon, precipe per la modela vivo de lia kristaniĝinta edzino. Sin li for-metas el la geedza rilato, ĉar li duone kredas mensogan disfamon koncerne sian moralon, kaj ŝi, post 25 jaroj de pacience portata maljusto, estas mortigita en la Granda Cirko, kun aliaj kristanoj, dum persekuto.

En ĉi tiu pretendata revelacio la Kristo parolas al jusvenintoj el la tero en Paradizon. Strange estas, ke la lingvaĵo de la Majstro similas multe pli la retorikon de Lapenna ol la simplan stilon de la Nova Testamento, Vortoj kiaj "surplaneda vivo", "evoluo-ciklo" ŝajnas nekongruaj sur la lipoj de tiu, kiu parolis per la elementaj vortoj konservataj en la Kvar Evangelioj.

La lingvaĵo de ĉi-verko estas ĝenerale flulegebla kaj preskaŭ tute gramatike korekta, sed pri ĝia stilkompono mi rimarkas, ke la rakontanto uzas tro da akcesoraj vortoj, balastigante la frazojn per troriĉa, floreca enhavo de pli-malpli negravaj flankideoj kaj priskribajetoj. La tuta verko senteble gajnas per diskreta reverko laŭ la principoj de arta resumado, kompaktigo. Legante tian "precis", oni bonefike ŝparus la okulojn, kaj la cerbo ricevus la konkretan historion sen

ĝenado de miloj da modifantaj vortoj aŭ frazeroj ne necesaj por doni la bazan sencon. La malnovmoda stilo estas krome peze partecipeca; ĉe pasivaj participoj la tradukinto ŝajne hezitis antaŭ -ata kaj -ita; ufoje la frazoj estas iom tro sintakse kompleksaj, tamen analizeblaj por inteligentaj legantoj, kiuj pacience rimarkos ilian konstruon. Longa frazo estas bona, se la rilataj partoj sidas en apudo logika, kiel konfirmas ekzemple la 17-linia de Zamenhof sur p. 271 de la Fundamenta Krestomatio.

La eldonantoj strange nomas "romano" rakonton, pri kiu ili asertas, ke ĝi estas historia okazintaĵo, aŭtenta kaj laŭfakta. Laŭ la Plena Vortaro "romano" estas verko **image** elpensita.

Kiel ajn tio estu, ni jam havas antaŭ ni unu el la tri grandiozaj monumentoj en E-o al la epokfara historia fenomeno—la estiĝo de la Kristana Eklezio meze de la pagana mondo. La ceteraj estas Fabiola kaj Quo Vadis?—F.R.B.

#### EKZAMENOJ PRI ESPERANTO.

La komitato de la Asocio oficiale informas la anojn, ke dum 1952 studantoj de la lingvo havas eblon kandidatiĝi por Aŭstraliaj ekzamenoj sub kontrolo de nia Asocio. La diplomoj ricevas oficialan aŭtoritaton pere de la Akademio de Esperanto, kiu aprobis la planon submetitan. La Akademiestro post kontrolo de skriba provo akceptis kiel oficialajn dumtempajn ekzamenistojn la jenajn personojn:—Pastro C. C. Cowling, S-ino Hanks, D-ro Fridenbergs, S-ro P. Schwerin, S-ro F. R. Banham, D-ro C. J. Caldera, S-ro K. Linton.

Por detalaj informoj skribu al Pastro C. C. Cowling, St. Cuthbert's Home for Boys, Colac, Victoria, aidonante poŝtmarkon (3½p.) por respondo. La ekzamenoj estas trigradaj: elementa, kapableca, klereca.

—Prezidanto de la A.E.A.

#### AMIKAJ VORTOJ

"Ni legas **La Rondo** ĉiam kun ĝuo, ĉar ŝi informas serioze pri la esperantista vivo en la kvina kontinento, inteligente kaj informite diskutas pri lingvaj demandoj, uzas tre bonan lingvaĵon. Jam la fakto mem, ke ankaŭ en Aŭstralio nia lingvo vivas organizite, konsolas koron de esper-

antisto. Eĉ se La Rondo nin mokas (jan.-feb. p. 7), ni legas ĝin kun ĝuo, ĉar ĝia redaktoro legas nin atente kaj komprenas, kion ni volis diri. Ne ĉiam estas niaj spertoj same edifantaj."

(Dankon al vi, "Esperantista", Praha, 15.10.51.)

### THE LANGUAGE PROBLEM AND WESTERN DEFENCE.

By Captain K. Scott Simpson (Middlesex Regt.) in *The United Services and Empire Review*, July, 1951.

In essence the author said: "Considering the progress that has been made in every other field of human effort, it is astounding that the difficulty of international communications was not overcome centuries ago. The need for a common international language is growing daily as scientific progress and economic necessity bring the nations into ever closer contact.

"In any Western European Army direct communication between the various nationalities participating will be vitally important. Interpreters will have to be considered relics of a by-gone age. Translators will always be required, but it is now imperative that all Services in all countries concerned in Western defence should be able to communicate with one another quickly and accurately. The advantages of direct communication at conferences, over wireless, and in the ordinary routine of daily speech are such as to need no further elaboration.

"The international language must be practicable and neutral; its grammar simple and its spelling phonetic.

#### Difficult Languages.

"English is probably the widest-spoken of the modern tongues. But by far the greater number of people in the Commonwealth of Nations do not speak English. It is difficult for a foreigner to learn; its grammar is complicated and its spelling defies all reasoning. The only other language that might lay claim is French, which, nevertheless, is by no means simple. How many of us remember much about it after leaving school? Such a claim by it would be based solely on its tradition as the language of diplomacy.

#### National Pride.

"Apart, however, from purely technical difficulties of learning a modern European tongue, deep-rooted national pride, inherent in all of us, would doom any scheme to elect a national language as an international medium.

"The chosen language must be 'neutral'. Such a language is Esperanto. Its inventor was an idealist who saw in a common speech the possibility of lessening the intense national prejudices of mankind. There are over a million Esperantists in over 100 countries—this is on a purely voluntary basis. Where Government recognition has been rarely given, considerable success has followed, but Governments are slow to accept new schemes of this nature, the more so where, as in the case of Esperanto, co-operation of a number of Governments is required.

"Its practicability has been amply demonstrated at its annual Congresses, where hundreds of people of different nationalities have conversed freely, despite ignorance of each other's national language.

"Its being a 'constructed' language, and therefore neutral, is the greatest argument in its favor, since it cannot offend national susceptibilities. It is additional to the national tongue, and as such requires Government action to fully attain its object. In many countries children grow up bi-lingual. Why not in all? A lead by two or three Powers would give the inspiration and guidance needed.

#### Great Potentialities.

"In Western defence Esperanto would be of the greatest value in establishing common doctrine in military schools and technical establishments. Instead of dozens of such, with varying theories, one establishment could teach a common doctrine with textbooks in a common language.

"In simplicity Esperanto is far in advance of any 'natural' language. The alphabet is phonetic, accent is standard. Any national can pronounce Esperanto, and, remarkably, colored races learn it easily.

"Sixteen fundamental rules, no irregularities or exceptions. Ambiguity, the curse of all 'natural' languages, is eliminated. Its root words are derived from the Indo-European

speech-group, and parts of speech are formed by prefixes and suffixes. Grammar is reduced to a minimum; it can therefore be learned by those who have not had a 'good' education.

"All national languages are too difficult for the average soldier to learn in a reasonable time and carry out his normal duties as well. It is not enough that the British soldier has a capacity for picking up bits of the language of the country he is serving in—enough to be 'understood' (or misunderstood).

"Esperanto calls for some effort, but it can be learned in one-fifth of the time needed for a national language by ordinary methods. By the direct method, akin to the Berlitz system, an intensive course of one month will give a good grounding and enable any student to read, write and speak it, particularly the latter. It can be learned by the busy staff officer or senior commander with but little time for language study.

"Esperanto was taught during the last war to some hundreds of men in the Air Force and Army, particularly by correspondence courses under the auspices of the War Office, which stated in 1940 that "there are no obstacles to officers and men serving in the Army giving instruction in Esperanto, or any other language, subject to this not interfering with the performance of their military duties. A similar announcement had been made by the French War Office.

"In any case this is a negative approach, for Esperanto is not on the list of languages in which regular officers may qualify as interpreters, neither is it on the list of colloquial language qualifications open to all ranks. The full adoption of Esperanto as an auxiliary language in the armed forces of N.A.T.O. requires the co-operation of the nations concerned. This will not be easy, but neither was the introduction, almost universal now, of the metric system.

"Sweet are the uses of adversity', and out of the fears of a third world war there may emerge the use of a common auxiliary tongue to contribute towards international understanding."

—Sent in by Mr. J. Couche.

## PLENDA PLORPEPO

Nia pene paŝanta presajo por la pasinta jaro naskis deficiton, kiu estas vere timiga por tiuj mizeruloj, kiuj devas gratadi la kranion kaj fingrumadi la korpemajn ciferojn de nia melankolia matematiko. Ni sidas en senelira cirklo—egale pereiga estas la principo de la "dumonata" numero kaj la "ĉiumonata" aperigado de la gazeto. La unua nepre forpinĉos la jamajn abonantojn kaj forpeŝos novajn; la dua estas rekte neebla, pro la alta kosto kaj la guteta enspezo. Same staras la eldonafero en aliaj landoj, ekzemple Francujo kaj Usono. Ĉie la E-aj presorganoj velkas laŭ ia sama diabla ritmo. Tiom longe, kiom estos netrovita ia malkara prestekniko, aŭ mirakla inundo de novaj abonantoj, aŭ sana inklino je la jamaj Asocioj (160 animoj) regule pagi la kotizon, redaktoro kaj liaj kolegoj ĝuos sendormajn (sed ne sendornajn) noktojn.

## SUBSCRIPTIONS TO 19 JAN.

Messrs. Mattingly, Calwell, Oki, J. Couche, T. Porter, P. Williams, L. Love, C. Lowe, Fekonja, 10/-; V. Smith, E. Thompson, Ottens, 12/6; J. Dudley, 12/-; Dr. F. Williams, 10/-; C. Ramsay, 20/-; Mesd. E. Turnbull, 20/-; N. Foster, 10/-; Misses E. Carrick, W. Addis, J. Kempson, J. Willans, V. Cox, 10/-; G. Sims, I. James, 20/-; F. Kemp, 40/-; I. T. Maddern, 5/-. Brisbane E.S., 10/-; advtg. Brisbane, 5/-; sales Rondo Brisbane, 14/-; sales Rondo Melbourne, 17/3; sale books 9/-.

PLEASE NOTE!—The subscription is now 12/6 yearly.

## MORTO.

Sept. 17 mortis F-ino Lillian O'Connor, 72-jara, ĉe St. Joseph's Home, Northcote (Victoria). Ŝi estis kriplulo, kiu amis E-on; ĝi "malfermis al ŝi novan mondon". Dumviva membro de U.E.A.



# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 49.

MELBURNO.

Marto-Aprilo, 1952.

---

## De La Nova Prezidanto

Karaj samideanoj,

Ĉiuj, kiuj partoprenis la Okan Tutaŭstralian Kongreson en Sidnejo, ĝuante la internacian atmosferon kaj enmiksiĝante inter tro malofte rekomtitaj samideanoj, deklaris ĝin senduba sukceso, sed la vera sukceso dependas de tio, ĉu ĝiaj rezolucioj estos efektiveblaj por la bono de la movado.

La dujara periodo inter Sidnejo kaj Perto komenciĝis per bato—la rezigno de nia alte estimata prezidanto, D-ro Caldera, al kiu ni ŝuldas tiom multe. Precipe ni devas danki al liaj klopodoj por la starigo de akademia ekzameno en Aŭstralio. Ricevinte sur miajn humilajn ŝultrojn lian mantelon, mi faros mian eblon, sed, petegante ĉies helpon, mi emfazas la neceson, ke ĉiu harmonie kunlaboradu.

Kaj nun okazis dua bato—rezignis nia tre kapabla kaj alte estimata redaktoro, s-ro F. R. Banham, kiu, akceptinte la malfacilan taskon demetitan de s-ro P. Hudson, tiel bonege redaktis nian oficialan organon dum 25 jaroj, ke samideanoj tra la tuta mondo laŭdis ĝian altan nivelon.

Bone konstatante, ke ni ne povas pag' nian ŝuldon al s-ro Banham, mi deziras esprimi la dankon tiel tutkore sentatan de ĉiu sincera aŭstralia Es-

perantisto, fervore esperante, ke mal-longa estos la tempo pasonta, antaŭ ol ni povos denove bonvenigi lin en niajn aktivajn vicojn.

Ĉar la taskon redakti la gazeton devas do surprizi komitato, la helpo kaj subteno de ĉiu aŭstralia samideano estas des pli ricevendaj.

Devus interesi ĉiujn aŭstralian samideanon la novaĵo, ke jam fondiĝis fervora grupo en nia federacia ĉefurbo. Revene de la kongreso kun mia familio mi vizitis Canberra-n, kie gastigis nin la ĉarma sekretariino de la Canberra Esperanto-Klubo, s-ino Maybee. Nin veturigante en sia aŭto ĉirkaŭ la urbon, kaj montrante al ni ĉiun vidindaĵon, ŝi informis nin, ke la grupo konsistas el s-ro Whiteford, bone konata aŭstralia samideano dum jaroj, s-ro Harry, kiu helpis traduki la Deklaracion pri Homaj Rajtoj ĉe la Unuigitaj Nacioj, s-ro Torr, kiun mi ĝoje renkontis ĉe lia posteno en la Universitato kaj 2 lernantoj. Parolante bonegan Esperanton, s-ino Maybee estas ĉarma atesto pri la alta nivelo atingebla de entuziasma samideano dum nur 8 monatoj.

Via Prezidanto,

K. G. LINTON.

## With Esperanto around the World

His Royal Highness, Crown Prince Olav of Norway, has just kindly agreed to extend his patronage to the 37th Universal Esperanto Congress, taking place in Oslo (2-9 Aug., 1952).

● **ANDORRA:** Even in this far-away tiny republic there is a vigorous Esperanto movement. A very active group meets three times a week in Sant Julia de Loria and in the capital Andorra la Vella, an Esperanto Section of the Government Tourist Bureau has just been opened.

● **AUSTRIA:** A monument to Dr. Zamenhof is to be erected in the Tyrolian city of Woergl. The bust will be sculptured in Carrara marble by an Esperanto sculptor. The unveiling ceremony will take place during the "Tyrolian Esperanto Day" this summer.

The Ministry of Education has granted a subsidy to the Teachers' Section of the Austrian Esperanto Federation and has decided to increase its annual subsidy to the International Esperanto Museum in Vienna.

● **BELGIUM:** The Royal Athenaeum of Antwerp has just started an Esperanto course for beginners.

● **BRAZIL:** The newly elected President of the Brazilian Institute of Geography and Statistics, General Polli Coelho, declared that he will support Esperanto because he recognizes its superiority as a means of understanding amongst peoples.

The 13th Brazilian Esperanto Congress will take place this year in Recife. The Institute of Geography and Statistics will publish on this occasion a Photo Album, "City of Recife." In the same series it has published already Photo Albums about Sao Paulo, Salvador and Belo Horizonte. These beautiful albums are printed in the Esperanto and Portuguese languages.

The Radio-Station of Manaus in the State of Amazonas has just decided to broadcast regularly news about Esperanto. In Salvador, in the State of Bahia, the City Council is recognizing the cultural value of Esperanto by a grant of Cr. \$13,000. In the college "Antonio Vieira," the two Catholic fathers, Borges and Lima, are con-

ducting an Esperanto course which is compulsory for all first-grade students. The "Professional School for Women, Pedro II," in Sao Paulo is conducting daily lessons in Esperanto for its students.

● **DENMARK:** The Students' Esperanto Club of the University of Copenhagen organised an Esperanto Exhibition in the dining room of the University, visited by 1,500 students. The Chancellor of the University, Prof. Dr. H. M. Hansen, honoured the exhibition by a visit, during which he inspected with great interest the scientific exhibits.

● **FINLAND:** The "Kuva ja Saana" Publishing Company of Helsinki has just published a Finnish translation of the book "Invito al cielo" (Invitation to Heaven) which was originally written in Esperanto by the American Esperantist, James D. Sayers.

The "Finnish Good Templars" at their recent convention in Tampere decided to ask the International Grand Lodge to accept Esperanto as one of the official languages and that their magazine "The International Good Templar" should contain articles in Esperanto.

● **FRANCE:** 400 Railwaymen from 11 countries held an international conference recently in Paris. They decided to publish an international vocabulary of railway-terms.

The City Council of Angers has decided to name one of its new streets "Rue du Docteur Zamenhof."

● **GERMANY:** An International Conference of Esperanto Students will be held in Schluchsee from the 18th to the 25th August, 1952.

The Chief of Police of the City of Hamburg is favouring Esperanto amongst the Police force. 80 policemen are at present learning the language.

● **GREAT BRITAIN:** The "International Federation for Correspondence Chess" is publishing a magazine called "Mail Chess" in English, French, German and Esperanto.

● **GUATEMALA:** In the Summer School of the San Carlos University of Guatemala City, Dr. Jules Bonge, a migrant from Belgium, is conducting Esperanto classes. Under the auspices of the Department of Education, the first Esperanto Exhibition has taken place in a hall provided by the National Tourist Office of Guatemala.

● **HOLLAND:** "Wagon Lits-Cook," the International Travel Organisation, equips its dining cars with menus printed in Esperanto.

● **ITALY:** For the first time an Italian Esperanto Congress has been opened by a minister in office. Signor Segni, Minister of Education, accompanied by the Lord Mayor, Prof. Pagni recently opened the 23rd Italian Esperanto Congress in Pisa. This year's congress will be held in Bologna (6-9 Sept.). Greetings by picture-cards are welcomed and will be recompensed by "Esperanto-grupo A. Tellini," via Borgonuovo 16 Bologna, Italy.

● **JAPAN:** The 38th Japanese Esperanto Congress was held recently at Nagoya. The Japanese Esperanto Institute has now more than 2,000 members. 30 Universities and 50 High Schools have Esperanto groups.

"Medicina Revuo," a medical journal in Esperanto, has resumed its publication in Japan. Professor Masao Suzuki, Director of the Physiological Institute in Tiba, is the Editor-in-Chief. Dr. Hideo Shinado (135 Sakurakozi, Kasmicho, Yamagata-shi), who is reviving the World Association of Esperanto-Doctors (T.E.K.A.), is asking Esperanto-doctors to communicate with him.

● **NORWAY:** Inspired by the forthcoming World Esperanto Congress in Oslo this year, the "Scandinavian Airlines System" has just published a folder in Esperanto.

● **PARAGUAY:** "Revista Filatelica Paraguaya," the most important magazine for stamp collectors, publishes every year a year-book in Spanish, English, French, German and Italian. By request of 3500 readers, the last year-book also contains articles in Esperanto.

● **SPAIN:** The 12th Spanish Esperanto Congress, the first since the Civil War, took place in Tarrasa, near Barcelona, and was a great success. This year's congress will be held in Valencia.

● **U.S.A.:** One of the most important trade unions of the United States, the "International Ladies' Garment Workers' Union," is listing Esperanto classes in the report of its Educational Department. I.L.G.W.U. has 423,000 members and its educational Director, Mr. Mark Starr, is a well-known Esperantist.

● **YUGOSLAVIA:** The Yugoslav Film Company, "Triglav," has just produced a sound picture entirely in Esperanto — "We Will Tame the Waters"—which at present is being shown with great success in the Scandinavian countries.

● **Mrs. Patricia de Cleene,** the "Hitch-hiking Grandmother" of New Zealand, has been in the news recently. In Lidköping (Sweden) she addressed a large audience in the building of A.B.F., the Swedish Workers' Educational Association. In Vienna (Austria) she had a half-hour interview with the newly elected Lord Mayor, Franz Jonas, who has been an active Esperantist for many years. She was later interviewed by Radio Vienna. In Valencia (Spain) she lectured in one of the largest halls of this city about her long trip from New Zealand to Iceland and back through Europe to Spain.

● **"Ente Nazionale Turistiche"** (via Marghera 2, Rome), the official Italian Tourist Organization, is sending free of charge tourist literature in Esperanto to all who are interested.

● **Freemasons' Lodge, "Lazaro Zamenhof,"** has been founded recently in Rio de Janeiro. All members of this lodge are Esperantists. This is the second lodge of its kind, the first being Lodge No. 454, "Lodge Esperanto" of Paris (France).

● **"The British and Foreign Bible Society"** announces that during the quarter of a century following the first edition of the complete Bible in Esperanto, 13,000 Esperanto Bibles and 50,500 parts thereof were printed.

## Nia Gast-Artikolo

Por prexenti al nia membraro interesan legomaterialon multvarian, ni komencas per la hodiaŭa numero novan serion da artikoloj por kiu ni elektis la titolon "NIA GAST - ARTIKOLO." En ĝi elstaraj eksterlandaj esp-istoj rakontos al ni aŭ pri la loka Esperanto-movado, aŭ pri si mem, kiamaniere ili fariĝis esp-istoj, aŭ pri amuzaj kaj interesaj okazintaĵoj de sia vivo.

La plej najbara E-movado de Aŭstralio estas nia fratorganizo en Nov-Zelando. Unu el ĝiaj plej elstaraj gvidantoj, sendube estas s-ano Bertram Potts, honora dumviva prezidanto de la N.Z. Esperanto-Asocio kaj la redaktoro de ĝia monata organo "N.Z. Esperantist." Nia redacio petis lin malfermi nian novan serion kaj li afable akceptis:

### KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

de Bertram Potts, J.P., F.B.E.A.  
(Wellington, N.Z.)

Jus atingis min letero de la Aŭstralio Esperanto-Asocio, petante ke mi inaŭguru serion da artikoloj, kies rubriko estos "Nia Gast-Artikolo", kaj dirante ke "La Rondo" atendas **poŝt-revenan** artikolon! Vere estas granda honoro fariĝi la unua kontribuanto, pri kio mi etendas dankon, sed petante ke mia humila skribmaŝino produkti sufiĉe interesan artikolon **poŝt-revenan**, la aŭstralia redakcio kredas, ke mi estas aŭ magiisto kun febastono aŭ viandovendisto, kiu povas gurdi artikolojn el kolbasomaŝino. Kaj por emfazi la gravon de la afero, la A.E.A. informas min, ke ĝi invitis ankaŭ famajn Esperantistojn el aliaj landoj kaj menciis kelke da elstaraj nomoj—speco de revolvero apud mia kapo! Por kvietigi mian timon, oni proponis, ke mi elektu propran temon, ekzemple: "Kiel mi fariĝis Esperantisto." Tio multe faciligas la taskon kaj mi akceptas ĝin.

Mi estas viktimo de propagando—de unu semo, kiu verŝajne falis sur bonan teron kaj donis frukton. Frue en la nuna jarcento, kiam mi havis eble naŭ jarojn, okazis ekspozicio en la urbo Bradford Anglujo. Nia familio tiutempe loĝis en Carlisle, pli norde de Bradford. Mia patro, kiu

vizitis la ekspozicion, hazarde vidis Esperantostandon, kie li elspezis unu pencon por broŝuro "Esperanto for the Million"! La samideanoj de Bradford estis la semistoj, kiuj eliris, por semi. Kiom da semoj falis apud la vojo, sur ŝtonajn lokojn, inter dornojn? Kiom da semoj burĝonis? Almenaŭ unu semo elmetis grandajn branĉojn en postaj jaroj. Mia patro donis al mi la broŝuron, dirante, ke jen estas granda ideo por internacia frateco. Mia pli juna fratino kaj mi lernis la tabelon de gramatikaj reguloj, sed baldaŭ forgesis pri tiu nova ludilo. En 1911 nia familio veturis trans la marojn al Nov-Zelando—1200 mejlojn malproksime de Aŭstralio—kie mi poste fariĝis raportisto. Unu tagon en 1913, kiam deksepjara, mi okaze legis en iu usona ĵurnalo leteron, kiu defendis Esperanton. Esperanto! Batis mia pulso dum mi rapidis al malnova kesto kaj faris esploron inter kolekto da forgesitaj diversajoj! Jen—"Esperanto for the Million"! Avide mi legis ĉiun vorton kaj por la dua fojo fariĝis viktimo de propagando. Tiel infektis min tiu verda febro, ke hodiaŭ—39 jarojn poste—aŭstralia redakcio povas dependi de **poŝt-revena** artikolo! Dankon, samideanoj de Bradford—vi faris bone, disjetante semojn en komerca ekspozicio; dankon, nekonata samideano de Usono—via humila letero al ĵurnalo vekis dormantan semon kaj senscie helpis antaŭenigi la movadon en malproksima Nov-Zelando!

En la poemo "La Vojo" d-ro Zamenhof konfesas, ke "cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas—ni semas kaj semas konstante." Ni ne forgesu la proverbon: "Faru hodiaŭ, kion vi povas—morgaŭ vi eble okazon ne trovos." Kaptu okazojn por paroli aŭ skribi pri Esperanto, starigi klubon, aŭ aranĝi ekspozicion! Semu konstante. Rilate la rikolton, neniu scias. Dank' al hazarda semo, Esperanto tute superregas mian vivon. Miaj amikoj parolas tiun lingvon—la libroj kaj gazetoj, kiujn mi legas, estas verkitaĵoj en tiu lingvo—mia edzino kaj du filoj ankaŭ estas Esperantistoj. Mia mondo jam estas dulingva!

En la horoj, kiam mi ne perlaboras la vivrimedojn, mia "amata ĉevaletto" plejparte okupas mian atenton—la verkado de privata tradukista leksikono angla-Esperanta, kiun mi komencis antaŭ eble dekdu jaroj. Mi esperas paŝigi la senlaboran kreuskon de mia vivo tradukante en Esperanton, kaj tiucele preparas konsultan verkon, kie la vortoj, idiotismoj, kaj rutinaj esprimoj de la angla lingvo estos troveblaj en Esperanto. Ĉiutage dum mi legas Esperantajn librojn kaj gazetojn, mi notas trafikajn vortojn kaj esprimojn, kiuj fidele spegulas anglajn vortojn kaj esprimojn. Tiu alfabeto aranĝita verko konsistas el 135 volumoj, kies enhavo estas mia plej riĉa posedajo. Unue mi kopiis la verkojn de Millidge, Fulcher kaj Long, la vortaron Edinburgh, vortojn kaj frazerojn el multaj verkoj de Zamenhof, William Bailey, Montagu Butler, Engholm, Baghy, Jung, Waringhien kaj aliaj stilistoj. La manuskripto de mia "amata ĉevaletto" estas preskaŭ tri metrojn dika kaj ankoraŭ kreskas. Mi ĉiam pli konsciigas, ke nia lingvo estas literatura majstroverko, kies esprimokapablon iam rekonos la ekstera mondo. Sed ni devas semi kaj semi konstante. Neniam mi povos repaigi al la pioniroj de Bradford kaj al la nekonata samideano de Usono—sed rekompence mi profitas ĉiun okazon por propagande semi.

### LA PARADOKSO DE LILI MARLENE

Dum la milito la malamiko fariĝas ne nur la simbolo de ĉiu malbono, sed eĉ lia lingvo, literaturo, arto, muziko—unuvoĉe ĉiuj liaj kulturaj akiraĵoj estas abomenaĵo por honesta patrioto. Tiam ambaŭ kontraŭuloj konkurencas unu kun la alia, purigante sian lingvon de elementoj kiuj enŝoviĝis de la lingvo de malamiko dum jardekoj—eble jarcentoj—de paca kunvivado kaj kunlaborado. Oni penas forgesi muzikon kaj literaturon de la "barbaro" kaj adaptemaj kaj flekseblaj scienculoj konvinke pravas kiel granda miskompreno estis supozi dum longa tempo, ke ankaŭ la malamiko havas kulturon.

Nun, tio ja estas bone konata amaspikologia fenomeno, kiun ni observadis mem dum 2 mondmilitoj, kaj kiu

neeviteble estis sekvata de troiga laŭdo de propraj kulturaj valoroj kaj propra nacia karaktero. Geniga estas nur la konstato ke la pritakso de la meritoj kaj ecoj de aliaj popoloj ŝanĝiĝas radikale post relative mallonga periodo, se intertempe hazarde malamiko fariĝas amiko, aŭ kontraŭe. Tial oni jam povas demandi sin pri la valoro de la dumilitaj prijuĝoj mem, pli ol tio—pri la senco de la milito mem. Ekzemple, dum la unua mondmilito la japanoj estis modelo de samuraa virto kaj braveco, sed dum la dua . . . ? Kaj ĉu en kazo de tria mondmilito la opinio pri la japana, germana kaj rusa kulturoj kaj naciaj ecoj restos la sama, kiel dum la dua, dependas ŝajne de la fakto en kiu kombinacio tiufoje renkontiĝos sur la batalkampoj la diversaj nacioj.

Sed tamen, dum la lasta milito okazis senekzempla escepto. Kaj mi volas rakonti pli detale pri malgranda banala soldata kanteto, kiu kontraŭ la supre menciita tendenco de forigo de ĉio, kio venas kaj venis de la alia flanko de la fronto, transsaltis la fronton, kaj finfine firme enradikiĝis en la koro de la soldatoj tiel ke finfine ĝi fariĝis la plej populara kanto, samtempe eksonanta sur ambaŭ flankoj de la fronto. Ĝi estas la kanto pri LILI MARLENE, pri la knabino kiu venis ie kaj iam al rendezuo sub la lanterna kolono ĉe la pordego de la kazernaj barakoj. La teksto de la kanto estas sentimentala kaj seninspira la fono de la okazintaĵo senkonsola kaj griza, sed la vortoj iel tiel trafte pentras la malmulton de la elementarizita travivajaro de la mizera soldata vivo, ke ĝi kaptis la animon de amiko kaj malamiko. Kio ja restas al soldato, se ne songado pri regula manĝo, ripozo, reveno kaj sopiri je malproksima knabino. La senpersonigita frontsoldato trovis en la kanto sin mem kaj sian knabinojn, kaj krom tio, la ritmo de la melodio estis tre taŭga por kanto dum la marŝado.

La kanto nun estas jam kvazaŭ popola kanto kaj ĝia historio montras ĉiujn elementojn de kolektiva kreado kaj akcepto. Kiam ĝi fariĝis populara iu germana gazeto faris enketon pri la historio de la kanto, kaj troviĝis, cetere, multaj virinoj, kiuj asertis (ho, virina ambicio) ke ili estis la in-

spirantinoj de la versaĵo, la knabino, kiu kaŝiĝas malantaŭ la nomo de Lili Marlen. Sed ĝisfunda investigado klarigis, ke dum la unua mondmilito la germana soldato Hans Laip forte amis 2 knabinojn samtempe. Estante iomete poeto kaj ne povante decidiĝi al kiu doni la preferon, al Lili aŭ Marlen, li trovis genian eliron de la situacio (kiu, cetere ne estis tro embarasa pro malproksimeco de la objektoj) kaj simple kunigis ambaŭ nomojn en sia versaĵo. Li mem de la milito ne revenis. Sed 23 jarojn poste sammalmultkonata komponisto Norbert Schultze trovis ie la poezion kaj donis al ĝi muzikan vestaĵon. La en Germanujo tiam vivanta norvega kantistino—ankaŭ de negranda kalibro—Lale Andersen la unuan fojon kantis ĝin en la Kolonja radiostacio en 1938. Sed la aŭskultantoj preskaŭ senescepte estis civiluloj, la vortoj kaj melodio ne falis sur psikologie preparitan grundon, kaj la disko kun la kanto estis forsendita al arkivo kiel netaŭga por ripeto.

Nur en 1941 serĝento sendita kolekti muzikaĵojn por disaŭdigo al soldatoj en diversaj arkivoj, trovis la diskon kaj decidis ke oni povus provi la disaŭdigon de ĝi tra la milita radio-stacio de Belgrado (Jugoslavio). La rezulto estis surpriziga: miloj da entuziasmaj leteroj soldataj de diversaj partoj de la fronto fluis al la sendstacio. Kaj la kantistino Lale Andersen fariĝis fama interpretistino de la kanto en kabaretoj, frontteatroj kaj disaŭdigoj.

Sed la fino venis abrupte kaj neatendite kiam en 1942 la radio-stacio Belgrado fiere komunikis al la propagandministro Goebbels pri la kolosa sukceso de la kanto. Tiu lasta ekinteresigis pri la kaŭzoj de la populareco de la kanto kaj venis al konkludo, ke la kanto estas danĝera por la moralo de la armeo, ke ĝi estas "defaŭlist'a" (malkuraĝiga) kaj sentimentala. La kanto estis malpermesita kaj la kantistino arestita de la Gestapo. Post atenco kontraŭ sia vivo ŝi estis liberigita sed sub malpermeso kanti.

Tamen la frontaj radiostacioj sub premo de soldataj postuloj daŭrigis la disaŭdigon laŭ diskoj ĝis la fino de la milito. Kaj post la enmarŝo de la

okupaciaj armeoj, sur la insulo Langeoog de la Norda Maro, kien retiriĝis Lale Andersen, ŝi denove kantis sian Lili Marlen al la kanadaj soldatoj, la saman stultetan kanton, kiu intertempe sukcesis konkuri la korojn de la soldatoj de tuta mondo.

Kaj denove pruviĝis kiel similaj estas la homoj malgraŭ sia ŝajna diverseco. La nostalgio kaj sopiro je malgranda feliĉo superis limojn, frontojn, malpermesojn kaj lingvajn barojn en la momento kiam troviĝis kolektive kreita esprimilo de komunaj sentoj.

In the dark of evnig  
Where you stand and wait,  
Stands a lamp-post gleaming  
By the barracks gate.  
We'll meet again by lantern shine  
As we did once upon a time  
My sweet Lili Marlene,  
My sweet Lili Marlene.  
—D-ro Andrew Fridenbergs.

## Australia Kroniko

● **PERTH:** Ĉe nia ĝenerala kunveno elektigis la sekvanta estraro: Prez.: f-no O. Stempel, D.B.E.; Viceprez.: s-ro E. Walker, D.B.E.A.; Sekr.: D-ro Einihovici, D.B.E.A.; Kasisto: f-no E. Chandler; Propagando: s-ro J. Hawks; Ekzamenoj: s-ro R. Stephens, D.B.E.A.; Bibliotekisto: f-no E. Bull.

Dum la kristnaskaj festotagoj trapasis Perth pola s-ano Przybyleki, kiu venante de Francujo enmigris Aŭstralion. Li ne povis paroli la anglan lingvon kaj kelkaj anoj de la klubo helpis lin trovi loĝejon ktp., ĝis la malfermo de la enmigrintaj oficejoj post la libertagoj.

Post reveno de la Sidneja Kongreso ni sukcesis aperigi kelkajn artikolojn en la loka gazetaro. La posttagmeza gazeto "The Mirror" publikigis artikolon de s-no M. Strassberg (19/1) pri E-o ĝenerale. La posttagmeza gazeto "Daily News" (26/1) kaj la dimanĉa gazeto "Sunday Times" aperigis intervjuojn kun nia prezidantino pri la kongreso kaj kun la anonco ke la venonta kongreso okazos en Perth. Tre ĝojiga fakto ankaŭ estas ke la Instruista Jurnalo de Okcidenta Aŭstralio publikigis en la

februara eldono longan artikolon de s-ano L. T. Sardone (Sydney) pri la "Ekspozicio de Infanaj Artverkoj."

Du novaj kursoj komenciĝis: s-no Sedgely instruas sabatmatene infanojn (12-16 jaraĝaj) kaj s-no Pollard mardvespere plenaĝulojn. Dum nia unua kunveno post la ferioj, f-no Stempel donis detalan raporton pri la Sidneja Kongreso kaj pri ĝiaj decidoj. Niaj anoj tre ĝojis ke la 1954-a kongreso okazos en nia urbo.

● **ADELAIDE:** Estas ĝojige raporti ke fine estas fondita la "Adelaide E-Asocio." En Suda Aŭstralio estas viglaj esp-istoj, sed pro malgranda nombro ne ekzistis laŭregula asocio deposed multaj jaroj. Tamen, dum februaro f-no W. Addis kunvokis la esperantistaron por raporti pri la Sidneja Kongreso. Ĉe tiu kunveno la sugesto ke oni fondu la "Adelaide E-Asociation" estis unuanime aprobita. Kiel prezidanto estis elektita s-ro G. Downing kaj kiel sekretario s-ro Grace Barlow. La vigla batalantino f-no Addis ne povis akcepti ian oficon, ĉar ŝi estas la gvidantino de la W.E.A. E-klubo.

La asocioj intencas unue kunveni monate kaj planas vesperojn, dum kiuj nur E-o estos parolata. La W.E.A. Klubo daŭrigos sian valoran laboron dum la nuna jaro kaj sendube provizos multajn estontajn anojn por nia klubo.—Grace Barlow.

● **MELBOURNE:** Post nur eta kristnaska ripozo, rekomenciĝis la laboro en la Melburna E-klubo, kie troviĝas medio por ĉiuj. Je la 6.30 kunvenas ĉiumerkrede nova kaj kontentige granda rondo da lernantoj, kiuj jam bone progresas sub la vigla gvidado de D-ro Fridenbergs. Estas interese noti, ke ĉi-tiu rondo inkluzivas 2 brilokulajn infanojn—gefilojn de la gvidanto mem. Sekvas la lernantojn kunveno da progresintoj, kies studadon gvidas nia Prezidanto (s-ro Drummond); kaj kiuj restas aŭ venas post la oka ĝuas ne nur la societone de samideanoj, sed ankaŭ ĵun programeron aranĝitan de la prezidanto por distro aŭ informo. Je la 16-a de Jan. s-ro H. Koppel donis detalan raporton pri la 8-a kongreso en Sidnejo; je la 23-a s-ro Linton—nia nova A.E.A. prezidanto — rakontis entuziasme pri sia vizito al Canbera kaj

la vigla areto da esp-istoj tie; je la 6-a de Feb. s-ro P. Dikŝtejn faris libro-recenzon, kaj je la 27-a de Feb. s-ro J. Mugrauer denove bone distris nin per rakontoj pri Brazilo. Tamen, la vera "leono" inter ni laŭ rajto krom aspekto estas nia sprita vicprezidanto (D-ro Fridenbergs), ĉiam preta kapable informi nin pri tutmondaj aferoj. Post reveno el Sidnejo li donis (9 Jan.) siajn impresojn pri tiu bela urbo; laŭ petoj de la ĉeestantoj (30 Jan.) li parolis pri diversaj aferoj, kaj 13 Feb. li rakontis interese pri siaj spertoj kiel studanto en cara Rusujo.

Bedaŭrinde ne tiel ofte aŭdata, tamen ne malpli interesa estas s-ino P. Hanks, kiu (20 Feb.) distris nin per interesa rakonto pri vojaĝo trans Norda-Ameriko, lando de superlativoj, kie troviĝas la plej—el ĉio. Helpate de la edzo, kiu funkciigis lumbildaparaton, ŝi prenis nin unue al Kalifornio. De tie ni vojaĝis tra belaj naciaj parkoj, kie, krom grandiozaj pizjaĝoj, troviĝas la plej grandaj arboj kaj la plej etaj birdoj de la mondo, trans la tuta kontinento al la plej grandaj akvofaloj, kaj fine ni alvenis inter la nubskrapuloj de Nov-Jorko, urbejo, kiu estas atesto al la forta influo de grandioza lando sur ĝia popolo.

Post la parolado, oni havis la okazon ekzameni belajn bildojn de amerikaj birdoj—la speciala intereso de ĉi-tiuj naturamantoj.

En la franclingva elsendo de la mallongonda stacio "Radio Australia," s-ro Martin Manelis detale priskribis la Ekspozicion de Infanaj Artverkoj en Sidnejo.

● **MELBURNA RENDEVUO:** Agrablan distradon ĉe la Januara Rendevuo provizis s-ano Josef Mugrauer per kelkaj humoraj prelegoj, kiuj evidentiĝis ke bonega aktoro perdiĝas en ĉi tiu aŭstra samideano. La skizo "Historia Leciono" donis amuzan bildon pri la malfaciloj de instruado. Egale gajigaj estis "La Pluvombrelo," portreto de viro, kiu ne povas mem fari decidan, kaj "La Spektral-Multipleks-Biformo-Lampo," kiu malkovras ruzon de fabrikisto; sed kontraston kaj revokon al seriozeco provizis la fina legaĵo "La Nekonata Soldato de Esperanto."—F.F.K.

● **CANBERRA:** Ni ĝoje anoncas ke 25 Feb. estis fondita la "Esperanto-Klubo de Canberra." Anonco pri la klubfondiĝo en "Canberra Times" kaj per radio de la A.B.C. kunvokis 9 personojn, kiuj aprobis konstitucion ellaboritan de s-ano Ralph Harry. Oni elektis la sekvan-  
tan estraron: Prez: s-ro R. Harry; Vicprez: s-ro H. R. Torr, Sekr: s-no J. R. Maybee; Kasisto: s-no H. R. Torr; Bibliotekisto: s-ro S. Fulop. La klubo kunvenas ĉiulunde en la hejmo de s-no Maybee ĝis kiam ĝi tiuos alian lokon. La kunveno decidis ke la klubkoto de ĉiu membro devas enhavi ankaŭ la A.E.A.-kotizon. La klubo havas bonajn rilatojn kun registaraj instancoj kaj intencas agi kiel reprezentanto de nia afero ĉe la registaro en la federacia ĉefurbo.

● **SYDNEY:** Depost la kongreso la Sydney E-Soc. gajnis multajn novajn membrojn kaj kurso por komencantoj komenciĝis kun 26 lernantoj. Je la monata societ-vespero (2 Feb.) f-no Hilda Foley, kiu ĵus revenis el Eŭropo, rakontis al ni pri siaj vojaĝspertoj kaj s-ro Matasin distris nin per kolorigitaj lumbildoj faritaj de si mem dum siaj lastatempaj vojaĝoj al Melburno kaj Brisbane.

● **COOMA (N.S.W.):** En tiu ĉi malgranda loko oni ĵus konstruas grandegan digon kaj elektrejon. Grandparte laboras tie enmigrintoj el Germanujo. Nia fervora samcelano Karl Hunold (el Hannover) ĵus komencis E-kurson. Spite de la fakto ke ne ekzistas taŭgaj ejoj, nia s-ano instruas 6 lernantojn en sia eta ĉambro kaj nur la malgrandeco de lia ĉambro malebligas pli grandan klason.

● **BRISBANE:** Nur nun atingis nin raporto pri la Zamenhofa Festo pasintjara. Ĝi okazis en Hotelo Canberra; ĉeestis 28 personoj, inter ili 4 gastoj el Polujo kaj Ĉeĥoslovakujo, novenmigrintoj, kiuj estis senditaj al ni de "New Settlers' League." La Prezidanto s-ro T. Suess, s-no R. McGeoch kaj s-ro Love faris paroladojn. Vespermanĝon sekvis programo de muziko, deklamoj, diversaj konkursoj kaj kantado de E-kantoj. Ni adiaŭis ges-rojn R. S. McGeoch, kiuj translokiĝas al Tasmanio.

Specialan kunvenon (22 Jan.) ni reklamis en la gazetaro por ricevi ra-

portojn pri la Sidneja Kongreso. F-no Curtis kaj s-ro Kelk detale raportis kaj poste ni povis enskribi novajn lernantojn por nova kurso, inkluzive 5 enmigrintoj el Skotlando kaj Anglujo.

### LA VIVO DE RUI BARBOSA Eminenta Brazilia Ŝtatviro.

La Brazilia Esperanto-Ligo plezure donacas al Esperantistoj novan libron kiu prezentas ne nur intereseĝan legadon, sed ankaŭ ateston pri grava sukceso en nia batalado por oficialigo de la internacia lingvo.

La biografio konigas al vi la vivon de granda homo kaj, nerekte, interesan epokon de la historio de Brazilo—1849-1923.

Grava estas la fakto, ke tiun tradukon eldonis la Brazilia Ministerio de Edukado kaj Sano (pere de la muzeo-biblioteko Domo de Rui Barbosa), okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de la fama Brazilano.

Por ebligi al ni pluan favorigadon de la registaro al nia afero, ni pruvu —per prezentado de multego da gratuletoj el diversaj landoj—ke ĉi libro, publikigita de la Registaro en Esperanto, efektive havis grandan sukceson.

Ni petas, ke vi, traleginte ĉi biografion de Rui Barbosa, ne nur skribu al ni por konigi viajn proprajn impresojn pri la libro, sed ke vi ankaŭ diskonigu ĝin en la Esperantistaj rondoj, rekomdante, ke ĉiu samideano kaj ĉiu grupo sendu al ni apartan gratuleton.

—BRAZILA ESPERANTO-LIGO,  
Praca de Republica 54, 1. Rio de Janeiro, Brazil.

(Mi, leginte la verkon, forte rekomendas ĝin al ĉiu serioza E-isto.—Redaktoro.)

### SUBSCRIPTIONS TO 22 FEB.

Messrs. Wanmer, H. Love, 12/-; H. W. Cohen, M. Cohen, Koppel, Kew, Hanks, McKenzie, A. Newman, 12/6; Ballard, 13/-; Dr. Caldera, 10/-; Mesd. Caldera, 10/-; E. Hill, Hintze, 12/6; Misses McEwan, Newnham, E. Styles, Henderson, Thomas, 12/6; Carrick, 12/-; Brisb. E-Soc., 12/-; Adv., Sydney E-Soc., 13/6; Donaco Melb. E-Klubo, 36/-.

Esp.—Seven



# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.  
Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 50.

MELBURNO.

Majo, 1952.

---

## Kiel mi renkontis nian Majstron

de J. Diamo.



Estis tiam tempo tre malgajaj, mallumaj: la malfeliĉaj jaroj de la regno de "Nikolajo la Lasta" en Rusujo. Bombaj eksplodis en multaj urboj, ministroj kaj aliaj altaj ŝtataj oficistoj estis mortpafitaj de teroristoj. La ĉiama timo de revolucio elvokis severajn kaj kurozajn leĝojn kaj ordonojn. Publikaj kunvenoj estis malpermesitaj. Pli ol tri personoj, babilantaj paceme en strato, estis rigardataj kiel "kunveno" kaj estis ofte arestitaj. Sed la progresema junularo, la studentoj kaj inteligentuloj trovis aliajn vojojn por interparoloj kaj kunvenoj. Ili aranĝis fikтивajn "ĉiunoktajn" kaj eĉ "edziĝajn" festojn kun muziko kaj dancoj kaj la severaj "gardistoj de la ŝtata ordo" eĉ ne suspektis, ke tiuj senkulpaj festenoj estis gravaj malpermesitaj konferen-

coj de delegitoj diversurbaj. La konferencoj estis treege necesaj, ĉar la registaro mem instigis kaj permesis sovaĝajn amasatakojn flanke de la "Nigracentuloj", malsobraj banditoj kaj rabistoj kontraŭ la suspektitaj "malamikoj internaj."

La progresema junularo komencis organizi sindefendajn grupojn kontraŭ la bestigitaj bandoj. Por tia tasko mi alvenis al la urbo Grodno. Mia amiko, kiu renkontis min ĉe la stacidomo, raportis al mi, ke ĉi tiun vesperon li estas okupota, ĉar D-ro Zamenhof parolos al kelkaj interesuloj en privata domo pri la "Lingvo Esperanto."—"Esperanto" ?? Mia cerbo komencis labori: estinte preskaŭ dekjara knabo mi trovis iun tagon en la biblioteko de mia avo, arda lingvisto, malgrandan broŝuron kun la biblia moto: "Unu lingvo estu por ni ĉiuj!", verkita de iu pseŭdonimulo "D-ro Esperanto". Mi tiam tre interesiĝis pri ĝi, montris ĝin al mia pli aĝa frato kaj junaj amikoj, komencis studadi kaj eĉ fondis malgrandan grupon por parol-ekzercado. La intereso poste pasis ĉar alvenis aliaj taskoj. Kaj nun post kvin jaroj de tiu incidento mi renkontos la aŭtoron mem!

Mia amiko gvidis min tre singardeme al tre ŝpareme lumigita malgranda ĉambro de malnova dometo en malvasta strato. Ĉeestis 6 aŭ 8 palaj, longharaj junuloj. La parolo en Esperanto estis tre mallaŭta, sed kun granda koncentriĝo. Oni prezentis min. La tre simpata, okulvitrita, ĉirkaŭ 35-jara Doktoro rigardis min tre afable, kaj ridetante demandis min: "Ĉu vi jam aŭdis pri tiu-ĉi lingvo?" Iom ekscitite mi rakontis pri miaj infanaj penadoj kaj kun efektiva varmeco eĉ komencis deklami la malgrandan poemon el tiu lernolibro: "En songo princinon mi vidis kun vangoj malsekaj de ploro" (de Heine). La Doktoro estis videble tuŝita kaj kontenta, sed kiam mi rakontis al li la celon de mia alveno al Grodno, li fariĝis tre serioza kaj diris kun trankvila sed konvinka voĉo: "Ne batalu, havu konfidon al la homoj. Daŭrigu la lernadon de nia lingvo kaj agadu por paco kaj interkompreniĝo." Liaj vortoj profunde impresis min. Mi premis la etenditan manon kaj diris sincere: "Mi promesas fari tion!"

Forpasis ĉirkaŭ 12-13 travivriĉaj jaroj. Mi estis tiam studento de Alta Teknika Lernejo apud Dresdeno en Germanujo. Estis la jaro 1908. De la gazeto mi eksciis, ke en Dresdeno estas farotaj grandaj preparoj por la kvara Universala Esperanto-Kongreso. Mi kun granda fervoro jetis min al nova lernado de nia lingvo kaj post 6 semajnoj de tre sindona ekzercado mi aranĝis mian unuan kurson por diversnaciaj studentoj kaj komencis korespondadi kun la tiama Organiza Komitato de la Kongreso: D-ro Arnhold, D-ro Schramm, Profesoro Marie Hankel ktp, kiuj subtenis min poste en miaj penadoj por nia movado.

La urbo Dresdeno kaj la tuta lando Saksujo estis elektrigita per la ideo de Esperanto. En la lernejoj oni lernis kaj instruis Esperanton. La fama aktoro Reichel kaj lia filino organizis esperantan trupon. Pastroj okupiĝis per la ekzercado de nia lingvo. Esperanto-parolantaj policistoj kun la verda stelo sur la maniko promenis en multaj stratoj de la urbo. La kvara kongreso fariĝis unu el la plej grandaj sukcesoj en nia movado.

Miloj ĉeestis, brilaj paroladoj, Esperanto-predikoj en la preĝejoj, Esperanto-prezentado de "Ifigenio" de Goethe en la granda urba teatro, internaciaj festoj, ĝojo senfina.

Je mia peto D-ro Arnhold prezentis min dum mallonga paŭzo al la Majstro. Li estis feliĉa pro la granda sukceso, liaj bonkoraj okuloj brilis. Mi tre modeste memorigis lin pri nia mallonga renkontiĝo en Grodno kaj mi diris kun junula fiero: "Mi plenumis mian tiaman promeson, nun ankaŭ mi apartenas al la granda internacia armeo da pacaj batalantoj." Liaj malmultaj sed sinceraj respondvortoj sufiĉis por doni al mi aktivan esper-enerĝion por multaj jaroj kaj mi esperas, ke ĝi ne ĉesos dum mia tuta vivo.

## De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,

Ĉi-tiu numero de "La Rondo", nia dua sen regula redaktoro, aperas dank' al la penoj de nia energia sekretario kaj tre malgranda grupo da helpantoj en Melburno. Tiel la afero ŝajne devos daŭri, ĝis aperos iu samideano, kaj inda kaj kapabla surmeti la mantelon tiel longe portitan de s-ro F. R. Banham.

Pere de la kotizoj de la nuna membraro nia gazeto povus aperi nur sepfoje en jaro sen enspezoj el aliaj fontoj, do mi petas al ĉiu membro, ke li aŭ ŝi penu kiel eble plej energie varbi novajn aŭ revarbi malnovajn membrojn. Tri pencoj ĉiusemajne estas tre malgranda ofero al la sukceso de nia kara movado.

La plej juna grupo en Aŭstralio, "The Esperanto Club of Canberra," kiu nur en la ĵus pasinta Februaro oficiale komencis sian agadon, decidis ĉe sia inaŭgura kunveno, ke la kotizo al la nova klubo inkluzivu ankaŭ la kotizon al A.E.A. Jen estas tre laŭdinda ekzemplo, imitinda ĉe ĉiu alia Esperanto-grupo en ĉi tiu lando.

Karaj gesamideanoj, nur necesas, ke ni iomete dediĉu nin al ĉi tiu urĝa temo por efektiviĝi baldaŭan pligrandigon de nia membraro, tiel garan-

tianta la regulan aperon de tre leginda gazeto. Mi elkore petas la helpon de ĉiu aŭstralia samideano.

La 20-an de Januaro okazis la sepdeka datreveno de la naskiĝo de la populara kaj tre alte estimata prezidanto de la Melburna Esperanto-Klubo, s-ro William J. Drummond, fervora Esperantisto dum preskaŭ duonjarcento. Li akceptu la sincerajn gratulojn de ni ĉiuj.

Via Prezidanto,  
KEN G. LINTON.

### LINGUISTIC IMPERIALISM AND ESPERANTO

To speak of the advantages of an international language is not superfluous, because all who have come in contact with the different peoples, or even to take part in international conferences, have experienced the difficulties and loss of time, caused by the inability to understand one another clearly, thus necessitating the employment of translators.

Now, one speaks of the urgent need for an international language. The secret hope of many, whom we might call linguistic imperialists, that the problem of an international language will be solved quite naturally, in such a way that everybody in the world will soon be speaking English, German, Russian or another language, in addition to their own national tongue, is obviously utopian, because it is clear that no one people in the world is stronger than all others in a military, economic, or spiritual sense. The theories of the "Herrenvolk" and its superiority have crashed, and no longer does any person doubt that neither a future war nor cultural superiority will bring to any one people the privilege of seeing its language the universally accepted medium of communication.

Even militarists accustomed to solve problems simply by the sword are conscious of the fact that, to support the equilibrium of political forces, they are compelled to allow their enemies of yesterday to rearm, and that assuredly only renews the national self-esteem of the latter.

So, then, neither peace nor war will solve the question in that direction, namely, the acceptance of one national language as the international tongue and, in the end, it is just as well, because such a solution would not be democratic. If one people, in the linguistic sense, were in the position of the "Herrenvolk," one could readily imagine the advantages that people would have in the cultural and economic fields. If the world hopes to exist as an international fellowship on the basis of democracy, then only the adoption of an un-national, neutral, international, auxiliary language can be the solution. And actually that is one of the reasons why totalitarian regimes are unfavourable to an international auxiliary language, and even forbid its use, notwithstanding the fact that such an international language does not even for a moment support the preposterous suggestion that it displace any national tongue. The second reason is that the use of a neutral international language would facilitate the objective reciprocal information of diverse peoples, and that of course opposes the principle of state-controlled information and propaganda. In this regard an international auxiliary language is even a greater factor for peace. It liquidates the often unfactual official news and facilitates authentic information being obtained by the peoples outside the countries concerned.

All peoples desire to work peaceably together in a world made smaller by technical achievements, and the direct contact which an international auxiliary language makes possible, cannot be too highly estimated. Such a language must be easily learnt, euphonic and, at the same time, capable of expressing the most subtle thoughts and feelings of educated people. An international medium to be used only for commerce and traffic would not suffice.

Of all the hundreds of different projects offered to meet these demands only Esperanto continues as a proved and established fact, with millions using it in all countries, and enjoying its very considerable original and translated literature, journals, etc., and being very much assisted by its efficient organisations.

Theoretically one could argue whether a better auxiliary language could be evolved, but the fact remains that since 1887 when Dr. Zamenhof gave Esperanto to the world, no other project proved itself worthy of taking the place of his fine creation. So take it or leave it—tertium non datur!!

—Dr. A. FRIDENBERGS.

## ĈE SAMOVARO

(de Julio Baghy)

Ĉe malnova samovaro  
sidis rusoj kaj hungaro.  
Dum la akvo zume bolas  
La amikoj ekparolas.

Havi landon en libero  
tamen migri tra la tero  
iri vojon, sed sencelan  
Ĉu vi konas pli kruelan?

La hungaro ne respondas  
liaj pensoj ĝeme ondas  
viŝas larmon retenitan  
"Havi landon, sed perditan!"

Ĉe malnova samovaro  
sidas rusoj kaj hungaro.  
Dum la akvo bolas zume  
ili ploras, ploras kune.  
(El "Pilgrimo")

## IMPRESOJ PRI LA 8-a AŬSTRALIA E-KONGRESO

Permesu al mi amike, kun la bona intenco plibonigi E-kongresojn en Aŭstralio, eldiri kelkajn miajn kritikajn pensojn pri la aranĝo. Antaŭ ĉio min malagrabla frap-miris la malesto de E-flago kaj iaj ajn notoj, avizoj aŭ montriloj ĉe la enirejo Kongreson. La 7-etaĝa domo ja estis granda kaj ne estis facile al mi trovi la kongresejon. Kial oni timis surmeti ĉe la pordo la anoncon pri la kongreso kaj la E-flagon?

La kongreso NE estis malfermita per la kanto aŭ ludo de nia himno oficiala, kvankam piano estis en la salono. Ne estis permesite, eĉ en la kelkminuta saluto, paroli pri la "Interneta Ideo" de l'Esperantismo. "Nur saluti!", diris la prezidanto (s-ro Steve Bennett) Ellaso de la Interna Ideo estas grava eraro ĉe ajna E-kongreso!

Mi rimarkis dum mia kvaronjarcenta vivo en Aŭstralio ke aŭstralianoj estas malbonaj, nespertaj propagandistoj. Ekzemple dum 25 jaroj la G.P.O. de Sydney ne scias la adreson de la Sydney E-Societo kaj ĉiujn leterojn adresitajn al ĝi metas en mian poŝtkoston, ŝar G.P.O. scias bonege mian adreson, sed ne scias la adreson de la E-Societo. Ĉu ne frap-mirinde? Mi kelkfoje protestis tiun staton, sed la E-Societo malatentis min. Pri la maniero de propagando de E-o mi multe povus komuniki, sed la kongreso ne havis intereson tion aŭskulti.

Jen kial mi preferas, ne estante A.E.A.-membro, private energie labori por nia kara lingvo kaj por nia kara Interna Ideo.

Rusa Pastro Inocento Serisev, EsperantULO deponit 1909.

(Laŭ Pastro Serisev, EsperantULO estas homo kiu sekvas ĉefe la Internan Ideon de D-ro Zamenhof.)

## Esperantisto gajnas altan premion

S-ano Frank Halls ĵus gajnis altan premion ĉe la "Jubilea Film Konkurso". Dum la filmfestoj en la urbo Olinda, la federacia ministro por internaj aferoj, s-ro Kent-Hughes, transdonis al li belan pokalon kiel unuan premion en la sekcio por amatoroj, pro lia filmo "Enlanda Maro de Aŭstralio."

## LA RONDO RAPORTOS EL EŬROPO

Por studi la prizorgadon kaj traktadon de orfaj, dependaj kaj krimuliĝintaj infanoj kaj por viziti la 37-an Universalan E-Kongreson en Oslo, s-ano Frank Halls forlasis Melburnon la 15-an de Aprilo. Per aŭtomobilo li travagos Eŭropon dum 8 monatoj kaj li afable akceptis nian inviton skribi serion da artikoloj, kiun ni publikigos sub la titolo "Per Aŭtomobilo tra Eŭropo."

Frank ankaŭ prelegos ĉe eŭropaj E-klubo. Li kunportos 200 lumbildojn en naturkoloro pri Aŭstralio ĝenerale kaj du de-si-mem-faritajn filmojn: "Centra Aŭstralio" kaj "Enlanda Maro de Aŭstralio."

## With Esperanto around the World

The Prime Minister of Australia granted to Frank Halls (Melbourne) the authority to convey the good wishes of the Commonwealth of Australia to the 37th Universal Esperanto Congress in Oslo, Norway.

● **AUSTRIA:** The Education Department of the City of Vienna has agreed that the Austrian Society of Esperanto Teachers may give lectures about Esperanto in all Teachers' Seminaries. The Lord Mayor of this city, Mr. Franz Jonas, an old esperantist, took part at the last Zamenhof celebrations that was attended by 250 esperantists.

● **DENMARK:** The 8th International Congress of Esperanto Youths will take place this year in the Danish city of Ry.

● **FRANCE:** The French Esperanto-movement has just acquired a small castle which will be renovated and conducted as the "Cultural House of French Esperantists." This cultural centre will have tennis-courts, dormitories, etc., and organize Summer Schools for visiting and French esperantists.

● **GERMANY:** The 25th World Congress of Labour Esperantists (S.A.T.) will take place this year in Duesseldorf. As visitors are expected from many countries, many policemen of this city are learning Esperanto. An international Kindergarten, where parents taking part in this congress may leave their children under the supervision of Esperanto nurses, will be organised.

The International Order of Good Templars will hold congress this year in Hamburg (24th - 31st July). As many esperantists will visit this important congress, the Hamburg Esperanto Society has organised a special service for visiting Esperanto Good Templars.

An international Ski Meeting of Esperantists from Germany, Switzerland, Sweden and Denmark took place recently in Titisee in the Black Forest. The 4200-ft. high Herzogenborn allowed excellent skiing.

● **GREAT BRITAIN:** The 36th British Esperanto Congress will take place during Whitsuntide in New-

castle-upon-Tyne. The Lord Mayor of the city has extended his patronage to the Congress and the city's Education Committee has made available the Heaton Lyceum for the congress. The Australian Esperanto Association will be represented by Frank Halls, of Melbourne, who will show colour-films of Central Australia.

The Technical College in Huddersfield runs at present two Esperanto classes and the Public Library of this city lists 50 Esperanto books. New classes have also been started at the Bristol Aeroplane Company, in London, Brighton, Greenford and Hexham. At the Elliston County Secondary School in Cleethorpes (Lincs.) 40 boys between the ages of 11 and 17 have an extensive Esperanto correspondence with boys of other countries.

Sergeant R. Hamilton of the Glasgow Police Force in a recent article, "Language Study," published by the police review "Neighbour," recommended the study of Esperanto. The editor of this magazine has just started a new series of articles about Esperanto.

● **HOLLAND:** A change in the law governing Primary Schools was announced in the Dutch Parliament by the Minister of Education. This new law will allow Esperanto as a voluntary subject in these schools.

● **JAPAN:** Prince Kooŝoo Ootani, the Buddhist Archbishop of the Nishi Honguani Temple in Kyoto, sent a letter of greeting to the Buddhist Esperanto League.

The Catholic Bishop of Hiroshima, Mgr. Akira Ogihara, said on a recent visit to Italy, that many Japanese catholics are esperantists. One of his books was translated recently into Esperanto,

● **SPAIN:** Radio Station S.E.U., Madrid, has just started weekly Esperanto broadcasts. The programme known as "Anteno Esperantista" consists of bilingual broadcasts in Esperanto and Spanish about the World and Spanish Esperanto movements, Tourist Information and Spanish Folk-Music.

The Eucharistic World Convention will take place this year in Barcelona. On this occasion, visiting Esperantists will be cared for by a special Esperanto Committee.

In Manresa, Catalonia, the eminent singer, Emili Vendrell, spoke during an Esperanto evening about popular and classical songs and sang in Esperanto the minuet by Apelles Mestres. In the Co-operative Society of Textile Workers of Barcelona, Esperanto has many followers. New classes have also started in Moia, Reus and Tarragona.

● **The Universal Esperanto Association** had 14,943 members at the end of 1951. 8049 were associate and 6094 individual members.

● **The U.S. Treasury Department** lists the Esperanto Association of North America in its Cumulative List of Organisations, contributions to which are deductible for income tax purposes.

● **The U.S. Government Printing Office Style Manual** has a chapter on Esperanto. It fully explains for the benefit of printers the technical characteristics of the language.

● **The Reference Catalogue of Current Literature in England** lists about 50 Esperanto books in its 1951 edition.

● **The Vatican's newspaper, "L'Osservatore Romano,"** published a long and favourable article on Esperanto recently.

#### Esperanto kaj la Sindikatoj

La S.A.T. perantino, s-no Grace Barlow, ĵus preparis tre traŝan cikuleron en angla lingvo kun la titolo "Alvoko al Aŭstraliaj Sindikatanoj", kiun ŝi sendis al ĉiuj sindikatoj de Adelaide. En ĝi, ŝi klare priskribas kial sindikatano devas lerni E-on. Ĉiu, kiu deziras havi kvanton de ĉi-tiu flugfolio skribu al ŝi (3 Mokari Ave., Somerton Pk., S.A.) aldonante reafrankon.

## Australia Kroniko

● **ADELAIDE:** La fondiĝo de la Adelaide E-Societo vekis grandan intereson en tiu urbo kaj la Aŭstralia Brodkasta Komisiono invitis la sekretariinon doni paroladon en la Stacio 5CL (1 Marto), 2 geinstruistoj ĉe Port Germein, aŭdinte pri E-o per la radio parolado petis informon, kaj jam komencis la studadon. En la kamparo nia aktivulo s-ano Koseff komencis instrui malgrandan laboristan rondon. La laboro inter la infanoj bone progresas. F-ino Kempsen komencis gvidi klason inter dekjaraj knabinoj ĉe registara lernejo. La E-klubo ĉe Woodlands Knabina Lernejo nun havas 11 membrojn. Dum marto ili ekskursis al Port Elliott (60 mejloj de Adelaide) kie ili logis dum la tuta semajnfino, multe ekzercante E-on. En la sindikatoj ankaŭ estis iom da sukceso. 2 sindikatoj invitis parolonton, la Registartaj Laboristoj dum Majo kaj ia Butiklaboristoj dum Aŭgusto. La Registartaj Laboristoj anoncos la paroladon en sia organo "Solidareco".

La temo de la aprila kunveno de la Societo estis "Kiel mi fariĝis E-isto." Ĉiu membro rakontis la influojn, kiuj instigis al ties esperantiĝo. Ni rimarkis en ĉiu historioto la fakton ke la etaj semoj, disfaligite okaze dum la pasinteco kreskis kaj ekfloris post pli malpli longa tempo. La maja kunveno priliskutos la temon "ĉu estas pli bone instrui la infanojn aŭ la plenaĝulojn. Kion opinias niaj frat-kluboj?" —Grace Barlow.

● **SYDNEY:** La marta amuzvespero estis la plej bona en la historio de nia societo. Ĉiu seĝo en la ĉambro estis okupata. La koncerta programo, dank' al la klopodoj de s-inoj Kluessendorf kaj Monckton, estis altkvalita; kelkaj eminentaj muzikistoj partoprenis.

La jarkunveno daŭris dum 2 vesperoj. La jenaj oficistoj estis elektitaj: Prez. s-ro Bennett, Vic-Prez. Prof. Rudkin, Sekretaro s-ro Chandler, Kasistino s-ino Kluessendorf, Bibliotekistino f-ino Smith. Estis decidite, ke tiuj membroj, kiuj havas telefonon, enmetu siajn nomojn en la anonca parto de la telefonlibro sub la nomo de la E-Societo.

● **MELBOURNE:** La 5-an de Marto okazis la jarkunveno de la klubo, kun la rezulto, ke, al la reelektita antaŭa estraro, oni aldonis 3 novajn el la juna generacio, kaj laŭ decido de la Sidneja Kongreso, komisiis al unu el ĉi-tiuj (f-ino Graham) la propagandan taskon. Surprizo por la prezidanto okazis je la fino de la tagordo, kiam oni anoncis ke, por festi la atingon de lia sepdeka jaro la samideanaro, decidis transdoni al li malgrandan donacon. Parolantoj sciigis, ke s-ano Drummond estas en la movado jam pli ol 40 jaroj kaj emfazis, ke lia mensa kaj korpa vigleco pravas la junigan influon de Esperanto, kaj donas favoran aŭspicion vidi lin en gvidanta pozicio inter ni ankoraŭ dum multaj jaroj.—A.F.

D-ro Fridenbergs daŭrigis (12.3) la rakonton pri siaj multvariaj spertoj kiel studento en Cara Rusujo, el kiu montriĝis ke la ruzeco de advokato jam estis en li tre forta. Demandaro aranĝita de f-ino Elsie Godfrey (19.3) cerbumigis la ĉeestantojn. S-ro Marshall Cohen (26.3) revivigis Novzelandan legendon pri "Pelorus Jack", delfino kiu dum longa tempo loĝis en unu haveno kaj renkonte bonvenigis kaj enkondukis ĉiun ŝipon. Amuzan distraĵon provis f-inoj Amy Godfrey kaj Lorna Samblebe (2.4) per kelkaj skizoj—intervjuoj kun anoncoj laŭ la maniero de radio-disaŭdigoj.

La klubanaro amase kunvenis por adiaŭi Frank Halls, kiu forveturas al Eŭropo por partopreni la Universalan Kongreson en Oslo. Frank mem provis interesan programon per montrado de memfaritaj bildoj pri aŭstraliaj pejzaĝoj. Poste la Klub-Prez. Drummond nome de la klubo deziris al li bonan vojaĝon; AEA Prez. Linton transdonis leterojn kun salutoj al la Kongreso kaj transmaraj kluboj; AEA-Sekretario Koppel havis specialan surprizon por nia vojaĝanto: li transdonis enkondukleteron de la aŭstralia ĉefministro, R. Menzies, rajtigante Frank saluti la kongreson en la nomo de la aŭstralia registaro. Fine oni ĝuis festmanĝeton kiun provis s-ino Koppel.

Ce la Februara kunveno de la **Melburna Rendevuo**, birdamanto s-ano Ferguson prezentis 2 filmojn, kiuj provis kaj bonan distraĵon kaj in-

teresan informon. La unua temis pri la vivhistorio de la Argenta Mevo, kaj montris ankaŭ la malgrandan Herbo-birdon, Fulikojn, Pentritan Galinagon, Blankan Egreton, Avocetojn ktp. La dua—vojaĝfilmo, montris la "Coorong" en Suda Aŭstralio, kaj multajn birdojn kaj bestetojn, kiuj troviĝas tie, inkluzive de la "Mallee"-birdo, kiu ne metas la ovojn en arbeston, sed lasas ilin elkoviĝi en sablo.

Por distri nin en Marto venis inter ni neofte vidata s-ano Hirschel por preparoli la germanajn poetojn Goethe, Heine kaj Schiller. Preskaŭ tiuj evidentiĝis, ke kvankam ĉe tiu klubano ne ofte troviĝas ĉe ni, tamen li multe laboras for. Nur estas bedaŭrinde, ke plejparte la aŭskultantaro ne sufiĉe konas la verkojn de tiuj grandaj poetoj por meritaltaksi la penojn de la tradukinto. Pli ol tradukon oni bezonis interpreton, informon pri la poetoj kaj komprenon pri la rilatoj inter iliaj verkoj kaj la homoj kaj tagoj de iliaj vivoj. Tamen oni tre bone konstatis ke s-ano Hirschel vere mirinde mastrumas la poezian arton, kaj ŝajnas domaĝe, ke liaj verkoj ne iras pli malproksimen ol nur en nian rondon.—F.F.K.

● **CANBERRA:** Ke la E-klubo de Canberra havas bonajn rilatojn kun registaraj instancoj pruviĝis kiam la A.E.A-sekretario kontaktis la prezidanton de la klubo, s-anon Ralph Harry, por ke li intervenu ĉe la Departemento de la Ĉefministro, kaj akiru enkondukleteron por s-ano Halls. S-ano Harry tuj kontaktis la sekretarion de la ĉefministro kaj sukcesis havigi la deziratan dokumenton.

## Recenzoj

**UEA-Jarlibro 1952, 1-a Parto.** 264 p., nur por membroj. Pli frue ol kutime aperas tiu nepre havinda konsultlibro por ĉiu E-isto. Ĝi listas i.a. 2018 delegitojn en 61 landoj, ĉiujn landajn asociojn, E-gazetojn, la lastaperintan literaturon kaj la E-aranĝojn en 1952. Nur la jarlibro meritas la kotizon. Informoj de L. E. Pfahl, 37 Seymour St., Croydon, NSW.

## "LA HUNDO KRUSO"

de R. M. Ballantyne; el la Angla tradukis J. M. Inman. Eld. The Esperanto Publishing Co. Anglujo. 150 paĝoj; broŝurita. Prezo 4/4. Aĉetebla ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Antaŭ preskaŭ jarcento R. M. Ballantyne komencis sian famekonatan serion da aventuraj romanoj, kiujn li destinis ĉefe por knaboj. Li bazis la rakontojn sur siaj propraj spertoj inter la Indianoj kaj la pelt-komercistoj en Kanauo. Dum sia vivo Ballantyne ĝuis la favoron de granda publiko inter kiuj troviĝis ne nur knaboj sed ankaŭ multe da plenaĝuloj. Ĝis hodiaŭ liaj verkoj restas tre popularaj, kaj la apero de Esperanto traduko en bona lingvaĵo estas bonvena.

"La Hunlo Kruso" estas tipa ekzemplo. Ĝi enhavas abundon da harstarigaj aventuroj, kiujn dividis la junulo Rik kaj Kruso. Ĉi tiu hundo estis bone edukita kaj inteligenta ĝis homeca grado. Sajne ĝi povus fari ion ajn. "Kial ne instrui ĝin uzi pafilon?" demandis amiko de Rik. Ne surprizis min ke la tradukinto, rilate la hundon, ŝanceliĝis inter la pronomoj "ĝi" kaj "li"! El ĉiu danĝero, ĉu de granda urso, ĉu de Indianoj avidaj je la skalpoj de la blankhaŭtuloj, Rik kaj liaj kunuloj eskapis—dank' al Kruso.

La stilo de Ballantyne estas vigla, klara. La tradukinto sukcese redonis en Esperanto la viglecon de la originalo, sed pro tio ke la verko estas mallongigita je pli ol kvarono, li devis oferi la multajn flankekskursojn, kiujn la aŭtoro laŭ la modo de sia tempo faris. Sekve iom da la aromo de tiu periodo perdiĝis, sed la aventuroj restas en plena mezuro. La problemoj pri la redono de dialektoj kaj neinstruita parolmaniero ne estas tuŝita. Ĉiu konversacio aperas en la bonstila Esperanto kiu estas karakterizaĵo de la tuta traduko.

Oni rimarkas, la uzadon de la logikaj formoj, "horduono," "mejlkvarono" c.s. anstataŭ la pli ofte vidataj "duonhoro," "kvaronmejlo" k.s.

La preso estas kontentige klara kaj preseraroj tre maloftaj. La libro

estas plene rekomendata al ĉiuj, kiuj ĝuas la legadon de fidindaj priskriboj pri la vivmanieroj kaj aventuroj de bestoj kaj homoj dum la pioniraj jaroj de Usono.—I.P.H.

## Lingvaj Problemoj

### JURNALO

La vorto "jurnalo", kiu laŭ la Vortaro de Kabe kaj la Plena Vortaro signifas: ĉiutaga gazeto, estas jam tiel vaste uzata por nomi kiun ajn periodan eldonadon, ke zorga verkanto preferu uzas "taggazeto", kiam li efektive volas indiki ĝian ĉiutagan eldonadon.

Tamen "jurnalo" ŝajne devenis de la Latina "dies" (tago), diurnalĵis (taga), kaj origine indikis ne tiom la oftecon en kiu ĝi aperis, kiom la fakton, ke ĝi estis taga kroniko de okazajoj. La Diurnalĵis de la 17a jarcento estis plejparte semajne aperantaj raportoj de la tag-post-tagaj okazajoj en la parlamento. La tag-post-taga eco estas krome konservata en la naciaj terminoj por "taglibro" (diary, journal k.c.).

Kun escepto de la P.V. kaj la Kabea, E-aj vortaroj ĝenerale akceptas la pli vastan signifon de "jurnalo", tial la batalo reteni la vorton en senco de taga eldonado verŝajne estas vana. Kelkaj E-istoj bedaŭras tion, vidante perdon de utila vorto kun sencenhavo limigita.

Se "jurnalo" estus unuece uzata de E-istoj tra la mondo laŭ la senco rekomendita de P.V. kaj Kabe, ne estus bezone, ke lingve-puremuloj devas uzi "taggazeto", aŭ "ĉiutaga gazeto" por indiki tagan eldonadon de iu presajo.

Por eldonajo ne ĉiutaga oni povas uzi "gazeto", "revuo", "periodaĵo" (sed ne "magazeno"), kaj homoj, kiuj vidas danĝeron en nacilingvaj influoj, persistos sekvi la konsilon de la du internaciaj vortaroj menciitaj.

—F.R.B.

Deziras korespondi s-ro T. Sibata, Fukujuen, Koga-maĉi, Kasuja-gun, Fukuoka-ken, Japan.



# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 51.

MELBURNO.

Junio-Julio, 1952.

---

## ESPERANTO — THE LANGUAGE OF THE FUTURE

Language is peculiar to Man, he invented it and perhaps it is his most important invention. Don't you believe that it is an invention? Well, I'll prove it to you. God gave Man the raw materials as He usually does, in the shape of a voice box fitted with vocal cords capable of producing any number of different sounds, but that is not language. It remained for Man to work out for himself a system whereby certain sounds meant certain things. And how far has man progressed along this road? A long way, until now we have hundreds of thousands of words in many hundreds of different languages. The fact that different nations all speak different tongues proves language to be an invention. "Hund" in German, "chien" in French, and "cane" in Italian, all mean the same four-footed animal which we mean when we use the word "dog", in English. However, unless we are familiar with the word inventions of these nations, it will mean nothing to us to hear "Hund", "chien" or "cane". As our life becomes more complicated, so we invent new words to explain the continually expanding horizons of the mind.

It is certain that our very early ancestors had a very limited vocabulary, but nevertheless all language as we know it has developed from the idea of the first man to grasp the fact that a certain sound could mean a certain thing.

In a similar way all our modern industry has evolved from the idea

of the first man to cut a piece from a round tree trunk and use it for a wheel. The complexity of language and the complexity of wheels has become in this modern world extremely great. In the realm of industry, however, the common sense of business men evolved the idea of "standardisation", to make interchange of mechanical parts throughout the world easy. In language, standardisation is no such easy matter. Language is a thing of the mind and spirit, as well as the practical means of communication we use every day. By the use of its language each nation expresses its soul and its culture.

All great civilizations have produced great literature, and enshrined in the written word the greatness of that civilization lives on, long after those that produced it may have perished. Two words typify all this, "Greece" and "Rome".

The spoken word and the written word are perhaps the two most powerful forces in existence, yet we can only use them with people who understand similar speech patterns to our own. The means of communication in the world to-day have increased tremendously due to man's invention, but man's means of comprehension lag far behind. We can take a plane and land in any country in the world in a matter of hours, but can we talk to the local inhabitants when we get there? Quite likely not. There are still many countries where English is not spok-

en. We can turn on the wireless and tune in to any part of the globe, but the chances are we hear a language we cannot understand. We have conquered the barrier of distance, but not the barrier of language. It would be interesting to understand a broadcast from China or Peru, but unless those countries used English, where would we be?

To-day we turn to science to solve all our problems, and science very often turns out to be the application of common sense. The science of Economics is nothing more or less than trying to find a balance between production and distribution, the common sense thing to do in a world where so many still lack an adequate supply of daily bread.

What would be the common sense approach to this problem of inter-communication between the nations? Between Man and Man in a world where we can now hear, and no doubt will soon see, what is happening in every part of it? The obvious common sense answer would be "a universal auxiliary language" to be taught in conjunction with the mother tongue in the schools of the world, and in a very few years the problem would be solved. This language would be used for world communications and international business.

There is a certain amount of prejudice against an "artificial language" as some people call Esperanto, especially in academic circles. People holding such views may have knowledge but they have no vision. They are of the type who in the early days of the railway, complained that "these terrific machines running over the countryside will pollute the air, will cause the cows to give sour milk," and other such notions. This did not stop the development of the locomotive, and now no country of any importance could exist without its network of railways to carry goods and people from place to place. Nearer our own time similar things were said about motor cars and aeroplanes, but—well, try and imagine a modern world without cars or aeroplanes! They are a part, and an important part, of our everyday life. In 50 years it may well be that it would be hard to imagine a world without an

international language. It is such a common sense practical idea that in some ways it seems surprising that we have got along so far without it. In the middle ages Latin was the international language of the educated class in Europe, and in modern times until the first world war, French was the main language of diplomacy. Now, however, we have to unite the East and West, so a simple universal language must be found. Esperanto seems eminently suitable. A humanitarian and an idealist, Dr. Zamenhof gave to the world his universal language in an effort to unite the nations of the world and to bring understanding to this modern tower of Babel.

Esperanto is not an "artificial language," but a skilfully planned one. This is a very different thing. An artificial language would bear no relation to existing tongues. Esperanto on the other hand, contains no words that are not related in some way to an existing language. Dr. Zamenhof has taken the root words most commonly used in European languages, and fitted them into a simple and perfectly regular grammar system. Esperanto is also phonetic and the student has no need to struggle with that nightmarish spelling of which all foreigners learning English complain bitterly. There are 21 ways of writing the "A" sound in "ate," in English, and our constantly varying vowel sounds are always a source of great difficulty to those learning our language.

The object of this article is, however, not to compare any two languages, but to stress the need in a modern world for a universal language. For the first time in the world's history men talk of a "world parliament," a "world bank" and of the international control of the production and distribution of the world's food supplies and goods. Well, the more the nations get together, the more the need for a simple universal language such as Esperanto will become apparent, and to those who think in terms of world peace and world unity, I would say that Esperanto deserves consideration as a force with tremendous possibilities in the building of this "Brave New World."

—DAVID C. MILLER (Perth).

## De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj:

Ankoraŭ ni eldonas nian gazeton per provizora komitato, sed sen ia ajn dubo ni devas gratuli tiun komitaton pro la ĝisnunaj sukcesoj. Bone atentante la proponojn de la lasta kongreso por la plibonigo de "La Rondo," ili penis kiel eble plej multe plenumi la dezirojn de la legantoj, samtempe konservante interesan enhavon kaj altan nivelon. Tiurilate niaj legantoj estas invititaj skribi al la redakcio, ĉu por helpi per sugestoj aŭ kritikoj, ĉu por kuraĝigi per merititaj laŭdoj. Plaĉi al ĉiuj oni tute ne povas, sed efektiviĝi la dezirojn de la plejmulto devas esti la konstanta celo.

Estas ĝojige denove legi en "Aŭstralia Kroniko" pri la faroj de niaj Sudaŭstraliaj samideanoj. Ilin gratulante pro la starigo de la Adelaide Esperanto-Asocio, ni arde deziras al ili la plej bonan sukceson.

Ĉiu, kiu ĉeestis la Sepan Aŭstralian Kongreson en Melburno, kare memoras S-ron Harold Hutton, kiu tiel sukcese organizis la muzikvesperon tiuokaze. Ĉiuj ankaŭ sentos perdon, eksciante pri la forpaso de ĉi tiu fervora samideano kaj kune funebros lian morton. Ni kondolencas lian vidvinon.

Via Prezidanto,  
K. G. LINTON.

### BRAZILIO, LANDO DE KONTRASTOJ.

Brazilo estas grandega lando, la plej granda lando de la sudamerika kontinento, tial ankaŭ la vivcirkonstancoj kaj vivrimedoj diferencas inter la norda, meza kaj suda parto. Tial ekzistas grandaj kontrastoj en tiu lando!

La portugalo Vasco da Gama eltrovis Brazilon, kaj de tiu tempo, multaj portugaloj enmigris ĝin. La praloĝantaro estis indianoj, kiuj ankoraŭ vivas malmultnombro en la norda parto de la lando. Kelkaj sovaĝaj indianaj triboj, oni supozas, vivas ankoraŭ en la interno laŭlonge de la Amazonas riverego. Car la loĝantaro estis tro malgranda por kulture la landon, oni havigis nigruojn el Afriko, kaj tiamaniere oni havis ni-

grajn sklavojn, kiuj faris ĉiujn laborojn. La portugaloj ĉefe estis komercistoj. Proksimume inter 1860 kaj 1870 okazis la liberigo de la nigraj sklavoj, kaj de tiu tempo la nigruoj ricevis tiajn samajn rajtojn kiel la blankuloj. Ek de tiu tempo blankuloj intermiksiĝas kun nigruoj.

Se oni parolas pri Brazilo oni tuj pensas pri la ĉefurbo Rio de Janeiro. Plej ofte homoj vizitante la ĉefurbon de iu lando parolas ĝenerale pri ia lando mem. Tio estas eraro! Ĉefurboj ne ĉiam respegulas la landajn cirkonstancojn. Ĝenerale la ŝtataj leĝoj estas la samaj en ĉiuj partoj de Brazilo.

Brazilo havas pli ol 45,000,000 da enloĝantoj; en Rio vivas pli ol 2,000,000, kaj preskaŭ la sama nombro en la dua urbo Sao Paŭlo. Kvankam la lando mem estas tre riĉa pro siaj tertrezoroj, mineraloj kaj nutraĵoj, la popolo plejparte estas malriĉa kaj havas malaltan vivnivelon. Tamen la brazila popolo ne sentas tiun malaltan vivnivelon. Ĝi vivas tre feliĉe kaj kontente. Oni ne bezonas luksajn salonojn por loĝi; multaj loĝantoj preferas simplajn domojn; ili sentas sin tre kontentaj. Kiel manĝaĵoj sufiĉas rizo, peco da viando, nigraj faboj, bananoj kaj glaseto da kafo. Taseton da kafo oni trinkas kelkfoje dum la tago. Ĝi estas malmultkosta.

Dum preskaŭ 6-8 monatoj la klimato estas tre varmega kaj la kafo vivigas la nervojn kaj la koron. La plej malmultekosta nutraĵo estas la bananoj; ili estas tre bongustaj. La plej granda plezuro de preskaŭ ĉiuj Brazilanoj estas la piedpilkado. Pli ol 200,000 vizitas ĉiudimanche tiujn ludojn en Rio sole, kaj vere tie oni tre bone piedpilkas!

La esperantistoj estas sufiĉe viglaj; oni aranĝas kursojn kaj grupvesperojn; ekzistas laboristaj, katolikaj kaj eĉ spiritistaj E-grupoj.

La kontrastojn oni tuj rimarkas se oni promenas tra la urbo. Apud novaj altaj domegoj staras malgrandaj, malnovaj domaĉoj, la plej novaj kaj la plej modernaj aŭtomobiloj veturas en la urbo, kies stratojn oni ŝajne nur tre malofte purigas. Kvankam oni vidas multajn modernajn aŭtomobilojn, oni pli ofte vidas homojn, kiuj nur malbone estas vestitaj. Ili

portas nur ĉemizojn, pantalonon kaj lignajn sandalojn, kaj tre ofte iras sen ŝuoj. Sed tiun simplan vestaĵon oni portas ne nur pro malriĉeco, sed ankaŭ pro la varmege. Se oni estus vestita per kelkaj aliaj vestaĵoj oni treege ŝvitus. Oni nur tre malofte vidas virojn aŭ virinojn kun ĉapelo sur la kapo kaj nur tre malmulte da virinoj estas vestitaj per ŝtrumpoj. Ankaŭ dum la tielnomata vintra sezono estas ankoraŭ sufiĉe varme, nur frumatene kaj vespere estas iomete pli freŝa.

Kiel mi jam rakontis, dimanĉe la viroj vizitas la piedpilkuldojn—sed la virinoj ĉefe vizitas la kinejojn. En la centro de Rio la kinejoj estas veraj palacoj, eĉ ekzistas strato, nomata "kineja lando" kie troviĝas unu kinejo apud la alia. Sed kvankam estas tre varmege, ne estas permesate viziti tiujn kinejajn palacojn sen kravato. La servistoj tuj malpermesas eniron, se oni ne surhavas kravaton.

Sed alie la kontrasto: Se oni volas viziti la strandon, tiam oni iras, aŭ veturas en la tramo, vestite nur per naĝpantalono. Neniu homo, ankaŭ ne la policisto diras ion pri tio.

Ĉu vi jam spertis tropikan fulmotondron? En Rio dum la somera sezono vi kelkfoje povas travivi ĝin! Dum kelkaj minutoj falegas tiom da akvoamasoj de la ĉielo, ke multaj urbopartoj estas tute ne paseblaj. Pro tiu pluvego, ĉiuj kanaloj estas ŝtopitaj kaj la akvo ne povas deflui, kaj restas en la stratoj. Komprenible la tramoj ne povas veturi dum tiu tempo, nur la aŭtobusoj malrapide movas tra la akvoamasoj. Samtempe aliaj, ĉefe la nordaj partoj de la lando, suferas pro manko de akvo kaj nepluvo kaŭzas la forvelkon de multaj nutrajplantoj.

Jes, oni diras ke Rio estas la "plej bela urbo le la mondo," sed tiu bela urbo similas belegan virinon kun malbonaj dentoj. Kaj tiuj malbonaj dentoj estas la truoj en la pavimo, la rubaj-amasaĵoj tie, kie ili devus ne esti, kaj similaj malbonaj aferoj.

La salajroj en preskaŭ ĉiuj profesioj ne estas altaj, sed la prezoj montras la kontraŭon. Tial la vivnivelo ne estas tiel alta kiel en multaj aliaj landoj. Sed la ĉefajo estas ke la brazilanoj estas kontentaj. Vere, Brazilo estas la lando de kontrastoj!

—JOSEF MUGRAUER.

## Nia Gast-Artikolo

Daŭrigante nian serion da "GAST-ARTIKOLOJ" ni prezentas hodiaŭ artikolon de la Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio.

Speciale tiuj el niaj membroj, kiuj hezitas organizi lokajn kursojn aŭ kiuj timeme silentadas pri nia lingvo, legu ĝin tre atente:

### RESPEKTINDA ASOCIO

de W. A. Gething, B.Sc. (London),  
Prezidanto de Brita Esperantista  
Asocio.

Dum la 19-a jarcento la celo de ĉiu ambicia homo estis, akiri reputacion pri respektingo. En ĉiu ebla maniero, per la sinteno, la vizaĝesprimo, la vestoj, la ora poŝhorloĝo kaj ĉeneto, la amelita kolumo, li penis montri al la samtempuloj, ke li estas dignoplena kaj ĉiel-admirinda civitano.

Eble la homoj tro forte strebis doni tian impreson. Certe en la 20-a jarcento la pendolo swingiĝis en la kontraŭa direkto, kaj nun, kiam oni diras, ke iu homo estas "respektinda" la vorto enhavas ian malfavoran, malkan signifonuancon. Por esti demokrata ŝajne oni devas senzorge vesti sin ŝajnigi sin ordinara, kaj esti nerimarkinda individuo, perdita en la amaso de egaluloj.

Jen kion emas fari ankaŭ ni Esperantistoj. Anstataŭ paroli fiere pri nia lingvo kaj ĝia alta celo, ni kvazaŭ pardonpete mencias ĝin se okazas bona oportuno. Ne volante trudi nian ideon, ni silentas pri ĝi . . . kaj niaj konatuloj komencas opinii, ke Esperanto mortis.

Sed jam venis la tempo por forjeti tiun ideon! Esperanto sukcesis kontraŭstari la efikon de du mondmilitoj kaj la prezenton de diversaj rivalaj lingvoj, inkluzive de la subvenciita "Basic English," kaj nun restas nenia dubo, ke nia lingvo, kaj nur nia lingvo, provizas la plej taŭgan solvon de vere grava nuntempa problemo. La mondo komencas akcepti tiun fakton, kaj sekve ni Esperantistoj kaj nia organizita Movado okupas multe pli gravan lokon en la kultura vivo de la mondo ol iam antaŭe. Nia Movado estas respektinda, laŭ la plej bona senco de la vorto, kaj gravaj instancoj, aŭtoritatuloj, gazetoj, sciencaj rondoj k.t.p. montras tion per sia sinteno rilate al Esperanto.

Ni, do, levu la kapon iomete! Ni pli firme kaj fiere parolu pri nia lingvo! Ni rekonu la fakton, ke ni donas ion valoran al la mondo! Ni tiam konstatos, ke la intelektuloj de la mondo venos al ni por peti gvidon, kaj ne plu estos necese, ke ni "ĉapoen-mano" petu ilian subtenon.

Ni do gloru en la fakto, ke ni apatenas al respektinda Movado!

### NIA AMIKO HAROLD HUTTON MORTIS

Reirante al la Granda Nenio konkludis sian vivcirklon HAROLD HUTTON. La fato ŝparis al li longan suferadon. Vendrede, la 9-an de Majo, li ĉeestis ankoraŭ la entombigon de konatulo kaj revenante hejmen mem gvidis sian aŭtomobilon. Sed hejme li subite kolapsis. Ne rekonsciigante li mortis en la hospitalo sabate, la 10-an de Majo.

En lia persono la Melburna E-Klubo perdis multjaran samideanon, bonan amikon kaj por festvesperoj membron kun valoraj artistaj kapabloj. Ĉiam bonhumora kaj bruema, li estis plena de spritajoj kaj anekdotoj, kaj lia alveno tujs premis stampon de lia viveco sur la ĉeestantaron.

Indulga kaj komprenema por aliaj, amiko de infanoj, li havis nur unu psikan komplekson: li ĉiam estis mal-kontenta pri si mem kaj siaj atingoj. Sed lia postulemo estis direktita nur kontraŭ sin mem.

La klubo demetis ĉe la ĉerko floran kronon kaj areto da samideanoj akompanis lin sur la lasta vijo. Li longe postvivis en nia memoro.—A.F.

## Australia Kroniko

● **PERTH:** Komenciĝis studrondo por altgradaj studantoj, sub s-no McGrath, kun 12 partoprenantoj. Artikoleto "E-o kaj la lingva problemo dum Olimpiaj Ludoj" aperis en "West Australian" (7/3) kaj "Daily News" aperigis kelkajn "Leterojn al la redakcio" (13/2, 4/3, 10/3) Journalisto humore diris en nia vespera ĵurnalo ke Esperanto estas bona afero, sed ŝajne neniu ĝin parolas. Ni tuj respondis, klarigante ke ekzistas ci-tie vigla E-Ligo kiu gastigos la 1954-an Kongreson. S-ro Finch, enmigrinto el Anglujo, bone helpas per arango de elmontra kesto en urba butikio.

—Jack Hawks.

● **ADELAIDE:** Dum Majo komerca artisto s-ro Max Weaver faris kelkajn belajn afiŝojn por nia afero. Okazis vigla interkorespondado en la tagĵurnalo "Advertiser" pri E-studado inter infanoj. F-no W. Addis faris interesan kaj instigan paroladon responde al peto de Radio-Stacio 5DN. Okazis sukcesplena kunveno ĉe la Sindikata Domo. La auskultantaro ŝajne parolis al siaj kunlaboristoj en la laborejoj, ĉar la Societo ricevis poste pli ol dek petojn pri lernado.

—Grace Barlow.

● **MELBOURNE:** Ke la ridado estas bona medikamento pruviga, kiam, eĉ en la mezo de mizero, la homoj penas ŝerci. Almenaŭ trovis tiel s-ro Dikŝtejn. Malantaŭ la fera kurteno li kolektis bonegan ŝercaron, kaj, laŭtlegante tiun (16/4), li multe refreŝigis la klubanaron. Ne malfacile D-ro Fridenbergs eltiris materialon por eĉ tria parolado pri siaj "Spertoj kiel studento en Cara Rusujo" (23/4). Pli proksima lando estis la temo de la sekvanta programo (30/4). Kun helpo de mapo s-ino Koppel priskribis rondveturon de Adelaide per aŭtobuso laŭ la Rivero Murray ĝis Albury kaj poste tra Canberra al Sydney, kaj revene laŭ la marbordo ĝis Melbourne kaj de tie al Adelaide per trajno. Ankoraŭfoje alparolis nin nia sprita Vic-Prez. D-ro Fridenbergs (7/5). Per rakonto plena de ŝercoj li informis nin pri la mond fama germana kuracisto D-ro Sauerbruch, kaj montris, ke lerta hirurgo kelkfoje estas pli potenca ol reĝoj aŭ diktatoroj, kaj eĉ la brutajn fortojn de naciismo portempe superregis.

Pro la morto de klubano Harold Hutton ne okazis programo la 14-an de Majo. D-ro Fridenbergs nekrologis la mortinton, kaj nur malgaje konversaciis la ĉeestantaro. Pola instruisto s-ro Bursztejn interese informis nin pri ne multe konata lando, kaj la popolo de Uzbekujo (Uzbekistan) kie tiu dum la lasta milito pasigis 5 jarojn. Demandaro de F-no Elsie Godfrey (28/5) provizis materialon por diskutoj, kiuj elvokis du—tri pensinstigajn respondojn; kaj interesan vojaĝon en la pasintecon faris s-no Hill (4/6) kiam ŝi informis nin pri la Mayo-tribo de Sud-Ameriko kaj klarigis, ke malgraŭ granda primitiveco, tiuj homoj estis sufiĉe lertaj matematikistoj, kaj konstruis mirindajn templojn kaj observejojn.

### ● MELBURNA RENDEVUO:

Feliĉuloj, kiuj ĉe-estis la aprilan kunvenon, aŭskultis interesplenan paroladon de s-ino Hanks pri "La Religiaj Kredoj de la Aŭstraliaj Indigenoj." Kredeble ĉiuj sciis, ke ĉi tiuj homoj havas nenian ideon pri terkulturado aŭ bestbredado, kaj tute dependis de la ĉasado kaj la natura vegetaĵo por la vivrimedoj. Sed estis interese lerni, ke, malgraŭ tio, ekzistis instinkta deziro konservi kaj kreskigi, kaj tiucele ili provis per kelkaj ritoj kunlabori kun la spiritoj, kiuj laŭ ilia kredo enloĝis en ĉio—besto, kreskaĵo, eĉ ŝtono. Interesa estis ankaŭ la informo, ke ili havis nenian komprenon pri la deveno de si mem, sed ankaŭ tion atribuis al la eniro de spiritoj en la virinojn.

Ĉe la maja kunveno s-ro Hanks montris kaj s-ro Hearne informis pri bildoj de la belega ĉirkauaĵo de Mount Buffalo. Oni estus kredinta ke kelkaj indigenoj sin metis en la bildojn, sed ŝajne nur estis kelkaj Esperantistoj en malbona lumo.

—F.F.K.

● **CANBERRA:** Sub la sperta gvidado de s-ro Ralph Harry niaj agemaj s-anoj en la federacia ĉefurbo daŭre kaj efike propagandas, eĉ en la plej "ekskluzivaj" rondoj, kiel ekz. la "Rotary Club", kie s-ano Harry faris prelegon en ĉeesto de altaj registaraj oficistoj. "Canberra Times" (20/4) raportas pri sukcesplena kunveno ĉe la "Bon-Najbara Konsilantaro" (Good Neighbour Council). F-ino Marjorie Harry kantis E-kantojn kaj s-ro R. Harry parolis varbcele. Rezulte kelkaj nov-aŭstralianoj interesiĝis pri E-o.

Sed la plej granlan sukceson akiris s-ro Harry kiam li proponis al la Generala Kunveno de la Canberra sekcio de la Aŭstralia Asocio por UNO (14/6) ke ili rekomendu al la tutaŭstralia organizo ke E-o estu uzata ĉe la kunvenoj de UNO. La unuanime akceptita rezolucio rekomendas i.a. ke la centra organizo kontribuu £100 por ebligi la eldonon de Esperanto-traduko de la Carto de UNO en kunlaboro kun la Aŭstralia E-Asocio.

Sub la lerta kunlaboro de s-no Maybee kaj ges-roj Torr, la kluba vivo bone progresas kaj la A.E.A. sekretario ĵus ricevis la aliĝon (kaj ĉekon!) de 10 membroj.

### UNUA KONGRES—BULTENO

Bone sciante ke la distanco inter Perth kaj la aliaj ŝtatoj kreas baron al grandnombra partopreno al la 9-a Aŭstralia E-Kongreso (2-7 Jan., 1954), ni petas ke la aliaj E-societoj frue planu la aferon, tiel, ke ankaŭ la anoj kies financaj rimedoj estas limigitaj, povu havi la tempon ŝpari la necesan sumon por la vojaĝelspezoj. Ni tial proponas ke ĉiuj kluboj starigu finanĉan organizon por kolekti ĉiumonate malgrandan sumon de la anoj kiuj intencas veturi al Perth. Deponate £2/- ĉiumonate dum la restantaj 18 monatoj, ili trovos £36/- pretaj je la ĝusta momento kaj facile estos aldoni pluan monon bezonatan.

Dua afero, kiun ni proponas al diskuto estas la organizo de la "Seminario." En Eŭropo kaj lastatempe en Melbourne, la Seminario donis al la vizitantoj okazon por plibonigi la lingvoscion kaj lerni de spertaj oratoroj la teknikon instruan. Do, nia komitato decidis starigi "Seminario" dum la matenoj de la kongresperiodo. Unu tagon la traktotaj temoj koncernos komencantojn; alian tagon koncernos mezgradajn E-istojn kaj la finan tagon koncernos la progresintojn. Unu el niaj Liganoj prelegos al la progresintoj, sed ni deziras ke iu el la aliaj kluboj prelegu dum la aliaj 2 matenoj. Ni do atendas proponojn rilate al nomo de la preleganto kaj la elektita temo.

Alia afero rilatas al la "Literatura Konkurso Masel" por 1953. Ni decidis ŝanĝi por tiu jaro la daton de la fermigo de la Konkurso ĝis la fino de Oktobro kaj starigi 2 premiojn kvinfuntajn, unu por prozaj verkoj kaj unu por poeziaj verkoj. La rezulto estos komunikata ĉe la Kongreso kaj la venkontaj verkoj publike legataj.

La Kongres-Komitato bonvenigas ĉiun privatan aŭ oficialan sugeston por la plibonigo de la Kongreso. Kongreskotizo estas 25/-. Donacoj estos danke akceptataj. Eventuala profito estos dividita po duone inter A.E.A. kaj nia Ligo. Pagu anticipe por faciligi niajn antaŭ-laborojn.

#### Unua listo de aliĝintoj:

1. f-no O. Strempe (Perth)
2. s-ro E. Walker (Perth)
3. s-no Fay Koppel (Melbourne)
4. s-ro Herbert Koppel (Melbourne)

**Donacoj ricevitaj:**

f-no A. Curtis (Kvinslanda), £1  
s-ro Herbert Koppel (Melb.), 10/-  
Ĉiujn leterojn sendu al F-ino O.  
Stempel, 96 Blencowe St., West  
Leederville (W.A.).

**GRAVA REGISTRARA INSTANCO  
REKOMENDAS ESPERANTON**

La Novaj- kaj Informoficejo de la aŭstralia registaro cirkuligas en Usono anglalingvan filmon titolitan "AUSTRALIA TODAY" ("AŬSTRALIO HODIAŬ"). S-ano Ralph Harry, Prez. de la Canberra E-Klubo multe impresis la direktoron de tiu oficejo, s-ron S. S. Brown, pri la utileco de nia lingvo.

En Memorando de 21 Aprilo 1952, direktita al la direktoro de la Nov-Jorka filio de la Aŭstralia Novaj- kaj Informoficejo, s-ro Brown sugestas ke speciala eldono kun Esperanto-komentario estu farota. "Tio havas mian subtenon," tekstas la letero, "ĉar tio reklamas Aŭstralion en alloga kaj nekutima maniero ĉe multaj influhavaj homoj, kiuj ne estus atingeblaj per la angla eldono."

Sugestante al la Nov-Jorka oficejo, ke s-ano D-ro W. Solzbacher, Prez. de la E-Asocio de Nord-Ameriko, estus taŭga parolanto por la E-komentario de la filmo, Direktoro Brown konkludas: "Mi deziras ke vi faru vian plej eblon por provizi Esperanto-eldonon de "Aŭstralia Hodiaŭ."

Cu tiu filmo vere eldoniĝos nun dependas de la demando ĉu tiu ŝtata instanco povas provizi la necesan sumon en dolaroj.



## Frank Halls Raportas

La 15-an de Aprilo nia membro Frank Halls forlasis Melbourne per la ŝipo "STRATHNAVER" par partopreni la 37-an Univ. E-Kongreson en Oslo. Li ne nur reprezentos la Aŭstralian E-Asociacion, sed per speciala dokumento, subskribita de la aŭstralia ĉefministro (R. G. Menzies), li

ricevis la rajton transdoni al la kongreso la bondezirojn de Aŭstraliao.

Lia unua letero venis de "Nord-okcidente de Freemantle" en kiu li i.a. raportas:

"Ĉe Adelaide, f-no Addis aranĝis tagmanĝi kun mi, sed pro la ventegoj la ŝipo devis resti ekster la haveno dum 12 horoj. La marvojaĝo de Adelaide al Perth estis treege malglata, kun fortaj ventoj kaj grandegaj ondoj. Unu momenton la ŝipo saltis ĉielen kaj videbliĝis nur griza ĉiejo kaj tiam ĝi rapide falis en la ondovalojn.

El la pasageroj 75% suferis de marmalsano, sed mi restis tute sana kaj eĉ ĝuis la movadon de la ŝipo. Kondiĉoj sur la ŝipo estas treege luksaj kaj la manĝaĵo bonega—entute oni povas plendi pri nenio!

Ĉe Freemantle mi ne sukcesis renkonti la esperantistojn. Sur la ŝipo oni donis al mi telefonnumeron (de s-ro Brodie, mi pensas) kaj sesfoje mi telefonis sen sukcese. Tamen, mi ricevis telegramon de s-ano Norman Brodie: "Regret unable contact you. Best Wishes, pleasant trip to Esperanto-land!"

Niaj membroj en Perth aranĝis ĉion por agrablighi la restadon de nia mondvojaĝanto. Eĉ la aŭtomobilo de s-ro Strassberg estis servopreta. Sed kiam la Perth-anoj (laŭ raporto de f-no Stempel) alvenis ĉe la ŝipo, Frank jam estis, foririnta al la urbcentro. (Kompilis H. K.)

**Recenzoj**

"SENNACIECA REVUO" eldonis S.A.T., Jaro 1952, Aŭstralia prezo 5/- plus afranko. Ĉe S-ino G. Barlow, 21 Harris St., Glenelg, S.A.

Tre grava bezono por inteligentaj homoj hodiaŭ estas objektiveco en la prezentado de eventoj tra la mondo. Preskaŭ ĉiu gazeto havas sian politikan koloron kiu nepre evidentiĝas en ĝiaj artikoloj. Tamen, ni konstata ke inter la limoj de sia perspektivo, "Sennacieca Revuo" atingis la plejblon da objektiveco. La starpunkto de la politikaj artikoloj estas plejparte la "ortodoksa" marksismo (kontraste kun la "stalinista").

S.R. reaperas sub modifita formo post la interrompo kaŭzita de la

milito. Ĝi celas en "unu sola kajero . . . por la tuta jaro . . ." revui "la eventojn de la pasinta jaro en ĉiuj fakoj de la homa aktiveco." La nomoj de la kunlaborantoj garantias altan nivelon, kaj lingve kaj enhave. La eroj estas tre diversaj ni mencias nur kelkajn ĉar eĉ nuda listigo de ĉiuj okupas nian disponeblan spacon.

R. Laval detale pritraktas la ĝenan demandon kiel esperantigi proprajn nomojn, kaj provas ke la problemo estas ne nur solvenda sed ankaŭ solvebla. Lucien Laurat majstre analizas la bazojn de nunaj tendencoj al ŝovinismo en demokrataj kaj en sovetaj regnoj. Artikolo de Ben Alter Jehiel skizas la historion de la cionista movado kaj la starigon de la ŝtato Israelio, kaj cetera montras akrajn kontraŭ-britajn sentojn. Sub la titolo "Laŭ mia Rid-punkto" Raymond Schwartz denove akriĝas celtrafajn sagojn per karakterizaj spritaĵoj kaj vortludoj por "piki morta" plurajn iluziojn.

Pluaj artikoloj donas informojn jen pri la mirinda drogo "Kortizono", jen pri la teorioj de Freud, jen pri la Iberiaj lingvoj.

Entute S.R. estas gazeto multflanka kaj pensiga.—I.P.H.

**Korekto:** Sub "La Hundo Kruso", en Junia numero, okazas skribbaro: "da la aromo", kiu devas teksti "de la aromo."—I.P.H.

## Lingvaj Problemoj

### "DISAPPOINTMENT"

"Ĉagreno" estas ofte uzata por tio. Tamen "ĉagreno" signifas simple malplezuro, malkontento, kio cetere povas esti kaŭzita de "disappointment". Unu difino en la Oxford English Dictionary samsencigas **chagrin** kun **disappointment**; The chagrin of an unfortunate wretch who has not obtained what he wanted (la ĉagreno de malfeliĉa mizerulo, kiu ne atingis kion li deziris).

Edinburgh Esp. Dic. donas interalie "malefektivigo", sed tiu formo povas indiki al kaŭzoj aliaj ol "disappointment".

Millidge donas "disappointment" sub ĉagren', tromp' (mia lasta espero trompis min), iluzi' (seniluziigo), rev' (disreviĝo).

Fulcher & Long kaj Rhodes ne kontentigas pri la vorto.

"Ĉagreno" ne estas klara traduko por "disappoint", ĉar la ĉefa ideo en "ĉagreno" estas simple "malplezuro, pro (persona aŭ cirkonstanca) kontraŭstaro al la intereso aŭ deziroj de iu." Ekzemple:

tiu perdo de tempo ĉagrenas min.  
lia morto ĉagrenis min.

En ambaŭ ekzemploj mankas la aparta nocio de "disappointment".

Strange estas, ke klasikaj aŭtoroj diris: esperoj trompis lin, kaj—la espero estis trompita! Krome, li estis trompita en siaj deziroj.

Desaponto (laŭ la Franca *desapointement*) ne sukcesis enradiki. Sufiĉe klara estas: elesperiga, elreviĝa ĉagreno, ĉagreno pro ekmorto de espero (pro esperafrakaso).

Simple "ĉagreno" estas uzata de Zam. ĉe Sentencoj de Salomono 15/13, 17/21, 25, 25/23. Por mio la vorto tie uzata signifas nur "the sorrow caused by disappointment".—F.R.B.

**Kontisto, Impostagento registara; Notado, Kontrolado kaj Balancado de negocaj libroj; Kompilado de Impostdeklaracioj; Kontrolado de impostpagpostuloj; Efektivigado de protestoj ktp.; Regula Servo al Klientoj.**

**K. J. HIRSCHTEL, 25 Cardigan St., East St. Kilda, S.16.  
Tel. LB 1305.**

### SUBSCRIPTIONS TO 1 JULY

Messrs. Dr. Fridenbergs, Davies, Hutton, Hearne, T. Cowley, Holmes, Costa, Beasjou, Hirschel, R. Perry, Towsey, Peck, E. Thompson, Guilbert, Wall, Prewitt, Schwerin, Pfahl, Maddern, Kelk, 12/6; Dr. Caldera 5/-, Lowe 2/6, Fekonja 2/6, Schofield 10/-, Dr. Downing 13/-, Wishart, Wyres 12/6; Misses Dunlop, A. Godfrey, E. Godfrey, Samble 12/6. Brisbane E-Soc. 6/-, Donaco A.C.H. 3/-, Amiko £5/5/-, Sydney E-Soc. £18/15/- (30 members), Canberra E-Club £6/5/6 (10 members), Wellington E-Club 10/6 (N.Z.). Sales Rondo: 10/10, 5/10, 4/2.

### SUBTENANTOJ:

Afable aliĝis kiel subtenantoj: f-no A. Curtis (Kvinslando) 20/-, s-ro K. Humold (Coomat) 20/-, s-ro K. Podenas (Ballarat) 20/-. Koram Dankon!



# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 52.

MELBURNO.

Aŭg.-Sept., 1952.

---

## UNESCO PLANS STUDY OF LANGUAGE PROBLEM

By Ralph L. Harry (Pres. Canberra Esperanto Club)

On August 2, 1950, the petition requesting the United Nations to help spread the use of Esperanto, endorsed by over 16,000,000 people throughout the world, was presented to the United Nations. (See "La Roŝido," November, 1950.)

The petition was transmitted by the United Nations Secretariat to the Director-General of UNESCO, the "specialized agency" of the United Nations whose first function is to:

"collaborate in the work of advancing the mutual knowledge and understanding of peoples, through all means of mass communication and to that end recommend such international agreements as may be necessary to promote the free flow of ideas by word and image."

UNESCO was the logical international organisation which could give official international recognition to Esperanto. S-ro E. D. Durrant, "komisiito" of U.E.A. for UNESCO affairs, maintained close touch with the UNESCO Secretariat in Paris, and personal contact was also made by Esperantists in Paris. The Assistant Director of UNESCO, Jean Thomas, addressed the 35th Universal Congress in Paris in August, 1950, emphasizing the unity of purpose which exists between UNESCO and the Esperanto movement.

Interest in the UNESCO Secretariat was also stimulated by the dissemination in Esperanto of information about UNESCO and its work. Numbers 534-7 of "Esperanto" con-

tained a digest in Esperanto of a series of articles by R. Calder, entitled "Man Against the Desert." Mlle. Huguette Royer, in her broadcasts over the French Short-wave Radio included frequent reports of UNESCO activities. The Esperanto translation of the Declaration of Human Rights of the United Nations interested UNESCO. The address by Dr. Ivo Lapenna on the legal significance of the Declaration of Human Rights and other aspects of international law, now collected in "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo" were also brought to UNESCO'S attention and the copyright of one lecture was purchased by the organisation.

The Secretariat, faced with innumerable demands from governments for projects sponsored by them, hesitated to take the initiative in making proposals for promotion of an international language, a project not sponsored by any government. However, the petition to the United Nations, which had been referred to it, was a fact which could not permanently be ignored. A few months ago the UNESCO secretariat recommended to the Twenty-ninth Session of UNESCO Executive Board a study of the problem of an international language.

The UNESCO Executive Board at its meeting in Paris in April placed in the reserve list of projects to be considered by the General Conference in Paris in November, the following item:—

"The Director-General is authorized to carry out a study of the problems connected with the intellectual and moral relations between the peoples to which the diversity of languages gives rise and of ways of assisting the solution of such problems."

Reference will be made to the Esperanto petition to the United Nations which will thus be brought to the attention of the Conference.

As Australia is one of the 43 members of UNESCO, and will be represented at the General Conference at Paris, it is important that the Australian Delegation should be instructed to propose or support a proposal to place this item, not on the reserve list, but on the work programme for UNESCO for 1953. The initiative of one Government may have more effect than the 16,000,000 voices reflected individually or through their organisations in the petition to the U.N., and could be the means of bringing Esperanto to official notice in 43 countries.

The Australian Esperanto Association will be approaching the Minister for External Affairs urging that the Australian Delegation support the UNESCO project. It is suggested that each Club might approach the Senators in its State and each member write to his own Member of the Federal Parliament. The Canberra Esperanto Club has already arranged for the U.N. Association (Canberra Division) to endorse the project and has made personal approaches to the appropriate officials of the Dept. of External Affairs.

Prompt and concerted action may bring a major step towards achieving the objective of the petition to the United Nations—official international recognition of Esperanto.

## De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,

En nia vasta lando, kie apenaŭ konstateblaj distancoj apartigas la ĉefurbojn, la pluraj ŝtatoj povas facile sin senti iom fremdaj unu al la alia eĉ spite de tio, ke ni ĉiuj parolas la saman nacian lingvon. La sama cirkonstanco efikas sur nian movadon en Aŭstralio, sed estas la rolo de A.E.A. interligi la ŝtatajn organizojn.

Ĉi-riilate, kiel via prezidanto, mi estas kaj preta kaj volonta ne nur iniciati sed konstante konservi personan kontakton kun la membroj el la diversaj ŝtatoj. Do se iu havas sugeston, problemon, aŭ disdonindan informon, ne timu skribi al via amiko, la prezidanto. Ĉiujn mi respondos per ĉi tiu ĝenerala letero, aŭ, se necese, eĉ per persona letero.

S-ron Ralph Harry, la prezidanto de la Canberra Esperanto Club, ni devas gratuli pro lia iniciatemo rilate al la venonta kunveno de U.N. en Parizo, kiel atestite per la artikolo aperanta en ĉi tiu numero. Li meritas sukceson kaj ĉies kunlaboradon.

Nia Komisiito por Ekzamenoj, Pastro C. C. Cowling, raportas progreson rilate al la nova skemo pri ekzamenoj sub la aŭspicio de la Akademio de Esperanto. Ni atendas baldaŭ fari oficialan anoncon.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

## LA NACIA UNIVERSITATO DE KANBERO

de H. R. Torr, D.B.E.A.

En Kanbero formiĝas nova universitato—nova pro tio, ke ĝi ankoraŭ nun konstruiĝas, kaj ankaŭ pro tio, ke ĝi estas nova speco de universitato en Aŭstralio. Ĝi estas "La Aŭstralia Nacia Universitato", kiu estis starigita per parlamenta akto en jaro 1946. Ĝi estas, do, tre juna kaj ankoraŭ ne havas daŭrajn konstruaĵojn.

Ĝi estas bele situata en areo de 200 akreoj (proks. 80 hektaroj), sur maldense arbumita grundo apud la malsupro de "Nigra Monto," preskaŭ en la centro de Kanbero, kie, inter la indiĝenaj eŭkaliptoj, okazas granda konstru-agado.

La unua daŭra konstruaĵo, kiu nun alproksimiĝas al la finaj stadioj, estas "Universitata Domo," vasta du-etaĝa konstruaĵo, en kiu povos loĝi cent nedziĝintaj anoj de la stabo kaj studentoj. Tie ĉi troviĝos ankaŭ klubo, manĝejoj, ktp. Oni esperas aranĝi la solenan malfermon post nelonge.

Dua konstruaĵo, kiu progresas bone, estas la unua parto de tiu por la "Fako por Esplorado en la Fizikaj Sciencoj." Tiun ĉi, ankaŭ, oni esperas malfermi dum la nuna jaro. Lastatempe komenciĝis la elfosado por la fundamentoj de la konstruaĵo por la "John Curtin Fako por Es-

plorado en Medicina Scienco." Plue, la restantaj fakoj kaj la administra departanta funkcias en provizoraj konstruaĵoj en diversaj partoj de la sidloko.

La celoj de tiu ĉi entrepreno estas, unue, esplorado en 4 fakoj—Fiziko, Medicino, Sociaj Sciencoj kaj Pacifikaj Aferoj; due, la instruado de post-diplomitaj studentoj, el aliaj universitatoj, en la metodoj de esplorado. Tiuj ĉi studentoj devas posedi la gradon de almenaŭ "Magistro," kaj, laŭ aprobo de la Konsilantaro povos progresi ĝis la grado de Doktoro de Filozofio." Pro tiuj ĉi celoj, la proporcio stabo/studentoj estos la malo de tiu, kiun oni kutime trovas—estos relative multe da stabo, malmulte da studentoj.

Por sukcese plenumi tiujn ĉi taskojn, la Konsilantaro de la Universitato dum la lastaj jaroj kunigas la plej eminentajn sciencistojn el ĉiuj mondpartoj. Jam akceptis postenojn, tiaj famuloj, kiaj Profesoro Oliphant, kiu estas estro de la "Fako per Esplorado en Fizikaj Sciencoj." Malgraŭ la fakto, ke ties konstruaĵo ankoraŭ ne estas finigita, tiu ĉi fako jam sukcesis funkciigi sian ciklotronon kaj havigi nuklean reakcion lastan januaron. En la "Fako por Esplorado en Medicina Scienco" ankoraŭ ne estas elektita estro, sed la fako bone progresas sub la gvidado de Profesoro Sir Howard Florey, je "penicilin" famo. Tiu ĉi fako ja estas iom noveca. Ĝis nun, ĝi funkcias en 4 diversaj urboj, en 3 partoj de la mondo! Du sekcioj estas en Melburno, unu en Londono, kaj la kvara organiziĝas en Dunedin, Nov-Zelando. Tamen, provizoraj konstruaĵoj kreskas ankaŭ por tiu ĉi fako, kaj, antaŭ la jarfino, la kvar sekcioj kunigos en Kanbero.

La du aliaj fakoj—"Fako por Esplorado en Sociaj Sciencoj" kaj "Fako por Esplorado en Pacifikaj Aferoj," nun laboradas en iama hospitalo, dum oni planas la daŭrajn konstruaĵojn. Membroj de la stabo de tiu ĉi lasta jam laboradis kaj laboradas en Figio, Nov-Gvineo kaj aliaj insuloj de la Pacifik-Oceano, kaj ankaŭ en Centra Aŭstralio, inter la indiĝenoj.

La universitata biblioteko ankaŭ nun funkcias en Kanbero, kvankam ankaŭ ĝi havas nur provizoran hejmon. Ĝi jam kunigis pli ol 30,000

binditajn librojn kaj pli ol 20,000 gazetojn.

La unua vic-kanceliero estas la famekonata ekonomisto Profesoro Sir D. B. Copland kaj la Konsilantaro antaŭ nelonge elektis la unuan kancelieron, Lordon Bruce de Melburno, kiu estos solene instalita dum Oktobro de la nuna jaro.

La Nacia Universitato jam de longe starigis bonajn rilatojn kun la aliaj universitatoj de Aŭstralio kaj faris multon por fortigi la universitatan vivon en Aŭstralio.

(Reprezo permesata kun fonto-cito.)

## FRANK HALLS RAPORTAS

La dua raporto kiu atingis nian redakcion estis skribita "Survoje de Aden al Suez." Suferante de la granda varmego en tiu terparto, Frank skribas:

"Mi tre ŝatus skribi longan leteron, sed pro la diabla varmego mi ne havas skribeman humoron. En Colombo kaj Bombay ni estis nur unu semajnon antaŭ la 'Monsoon' kaj la vetero estis diabla; ĉefe la malsekeco estis la ĝeno. Oni devas surmeti 2 ĉemizojn tage kaj post nur kelkaj minutoj ili estas malsekigitaj per ŝvito. Estas tute ne eble dormi en la kajutoj kaj dum pli ol 10 tagoj ĉiuj dormis sur la ferdeko. En Ceylon mi vizitis la belegan lokon Kandy en la centro de la insulo. Precipe interesa estis la vilaĝoj de la indiĝenoj, kie oni vivas ŝajne tute same kiel la prapatroj.

Iu indiĝeno forŝtelis mian horloĝeton en Colombo, do mi aĉetis alian en Aden, kiun oni povus nomi 'havenon de horloĝoj,' ĉar tie oni povas aĉeti ĉiuspecajn horloĝojn tre malkare. Plenplenaj estas la butikoj ankaŭ de fotografiloj, binokloj kaj skribmaŝinoj. Mi pagis £5 por horloĝeto, kiu kostus £12 en Melburno. Skribmaŝinon, por kiu mi pagis £35 hejme, mi vidis tie por nur £18."

La unua eŭropa haveno estis Marseille, kie la UEA delegito s-ano Beau estis informita pri la alveno. Ĝis nun unu demando multe cerbumigis Frank: "Ĉu la interna ideo de l' Esperantismo vere vivas?" Jen la entuziasma raporto:

"Pro uragano en la Mediteraneo ni alvenis 7 horojn malfrue. Atente

mi serĉis la karan emblemon. Kaj jen! Tie, ĉe la fino de la ŝtuparo atendis viro kun grandega verda stelo. Miaj kunveturantoj miregis kiam s-ano Beau kaj mi salutis kaj manpremis unu la alian kiel malnovaj amikoj. Unue, vizito al instituto kie oni prizorgas krimuliĝintajn knabojn ("Reformatory"). Tie la direktoro gvidis nin tra la tuta prizorgejo kaj respondis al miaj multaj demandoj. Reciproke mi priskribis la aŭstralian sistemon kaj ni ambaŭ multe profitis. S-ano Beau agis kiel tradukisto kaj sen lia helpo mi estus kompreninta nenion. La oficistoj de la prizorgejo tre impresiĝis pri nia lingvo kaj la tuta afero estis bonega propagando. Per aŭtomobilo al registara alternejo kie s-ano Beau mem instruas. Ĝi estas unu el la plej modernaj en tuta Francujo kaj konsistas el multaj modernstiliaj konstruaĵoj kaj situas en bela parko. Poste temango kun ges-roj Beau kaj familio. S-ano Beau ankaŭ parolas E-on, sed ne la 11-jara filino kaj la 16-jara filo. Kaj jen kortuŝa ekzemplo de la lingva barilo: la filino forte deziris paroli al mi kaj mi ankaŭ deziris paroli al ŝi, sed ŝi ne komprenas la anglan lingvon kaj mi ne la francan. Post cerbumado mi diris "Comment allez-vous?" (Kiel vi?), kaj post minuta cerbumado ŝi eligis "Good-bye" (Ĝis la). Post la mango, s-ano Beau veturigis min aŭte tra la urbo mem kaj ĝiaj cirkaŭaĵoj, haltis kelkloke por ke ni travagu piede butikojn, magazenojn ktp.

Nun mi povas kompreni kial eŭropanoj estas tiel entuziasmaj pri la lingvo-ponto E-o. Sen ĝi mi estus estinta 'fremdulo en fremda lando', sed ĉar mi posedis la ŝlosilon al la lingvo-baro mi sentis, ja mi certis, ke mi estis amiko inter amikoj! Ĉar ges-roj Beau tute ne akceptis pagon pro sia bonkoreco, mi aranĝis fari prelegon en Marseille, kiam denove vizitos ĝin dum Novembro.

Ree sur la ŝipo, mi multe priparolis la sukceson de mia vizito kun la aliaj pasaĝeroj, kiuj forte impresiĝis pri nia lingvo."

(Komp. H. K.)

## Australia Kroniko

● **PERTH:** Novaj studentoj kaj malnovaj anoj kune ĝuis tre feliĉan socian kunvenon (12/6). La afero estis "kuraĝig-vespero" por la unuigradaj studentoj. F-no Hobcroft el Nov-Zelando atingis Perthon kaj jam vizitis la Ligon. Si esperas trovi taŭgan laboron dum restado de kelkaj monatoj kaj ni esperas, ke ŝi ĝuos amikecon en nia Ligo.

Dum Junio ankaŭ atingis ĉi-tiun ŝtaton f-no Riet Teune el Nederlando. Si skribis pri sia alveno, sed ĉar ĝi okazis dum labortago kaj ŝi forveturis tuj al Bunbury, neniu povis renkonti ŝin. Tamen, letere ni bonvenigis ŝin kaj eble aliaj aŭstraliaj esp-istoj skribos al ŝi por doni al ŝi senton, ke ŝi estas inter amikoj. Sia adreso estas: Riverside Park, Bunbury, W.A.—Jack Hawks.

● **ADELAIDE:** La Adelaide E-Societo strebante propagandi la lingvon intencas donaci librojn al la Adelaide Publika Biblioteko, al kiu ĝis nun preskaŭ tute mankis Esperantaj libroj. F-no W. Addis intervjuis la estron de la biblioteko, kiu konsentis ricevi la librojn, ripari ilin kaj se necese aldoni fortajn kovrilojn. Tiu ĉi estas granda kuraĝigo por nia juna societo kaj ni urĝe kolektas librojn por plenumi tiun ĉi planon. Pro nia malgranda anaro ni trovas ties efektivigon tre peza sen la helpo de niaj samideanoj. Tial ni apelacias al vi, se vi havas librojn, kiujn vi ne plu uzas, helpu nin per la sendo se eble. La pasinta laboro por la movado de Win Addis estas ja konata de ĉiuj kaj ni esperas ke la nuna plano plene sukcesos.—Grace Barlow.

● **CANBERRA:** Lundo, 21 Julio, estis grava tago por nia movado. En la salono de la Radio Stacio 2CA okazis tuthora debato kaj disaŭdigo pri la temo "Ĉu internacia lingvo devus esti 'vivanta' aŭ 'artefarita?'" Parolis por Esperanto s-ro Ralph Harry kaj s-no Maybee. Iliaj kontraŭuloj estis D-ro E. Emmerly, lektoro de modernaj lingvoj ĉe Canberra Universitato kaj s-ro R. Crawford, Vicestro de Canberra Alternejo. Niaj membroj lerte propagandis niajn ideojn kaj rikoltis aplaŭdon de la ĉeestantoj. Iliaj "eminentaj" kontraŭuloj ne rakontis ion novan por E-istoj. Ke la angla, aŭ iu alia nacia

lingvo, estu uzata, ili ne kuraĝis rekomendi, do "Basic English" estis iliaj "solvo." Kaj s-ro Maybee elvokis grandan aplaŭdon tradukinte la faman eldiron de Churchill "Blood, Sweat and Tears" en "Basic English" per "Red body water, white body water and eye-wash." "Canberra Times" publikigis longan artikolon pri la radio-debato, kiu entute estis bonega propagando por E-o.

La kluba vivo tiel bone progresas ke la ĝisnuna ĉiulunda kurso ne plu sulĉas. Tial kursoj nun okazas lunde en la hejmo de la prezidanto kaj jaŭde ĉe la Vicprez. s-ro Torr. La lastan lundon en la monato ambaŭ grupoj kuniĝas ĉe filmvespero en "Lawley House". Laŭ detala raporto de "Canberra Times" oni montris, 28 Julio, filmstrion pri Novzelando kun E-komentario, pruntita de la N.Z.-Altkomisaro.

● **SYDNEY:** Dum julio Esperanto eniris novan kampon. Letero de la Ministerio por Edukado petis informon pri eksperimentoj rilate al E-o en lernejoj. Dum multaj jaroj s-ro Chandler kaj aliaj lokaj esperantistoj klopodis interesi la Edukajn Aŭtoritatojn pri Esperanto, tute senŝukcese. Kaj nun venas signo de vekiginta intereso.

La 3-an de Julio komenciĝis 2 novaj kursoj. F-no Smith gvidas la kurson por komencantoj kaj s-ro Chandler por progresintoj. Kunlabore kun la "Fur-Croix Experimental Theatre" la societo prezentis (5/7) marionetajn teatraĵetojn "Virtue's Reward", "Brer Rabbit" kaj elĉerpajojn el "The Mikado". La ĉeestantoj pli ol plenigis la klubejon kaj multaj el ili devis stari pro manko de sidlokoj. La mongajnon ni transdonis al la "Children's Library and Crafts Movement". 31 Julio ni bonvenigis ges-rojn Rutland, kiuj forlasis nin en aprilo 1950 por ĉeesti la Univ. Kongreson en Paris kaj poste veturis tra Eŭropo. S-ro Rutland paroladis pri siaj spertoj, precipe tiuj, kiuj interesas Esperantistojn. Tre malnova, fervora esp-isto li diras, ke li revenas multe pli konvinkita pri la valoro de E-o por turistoj en fremdaj landoj. Dum Junio ni helpis fondi grupon en Newcastle. S-ro Bennett vizitis Newcastle por la fondiga kunveno.

La julia numero de "Reader's

Digest" portis sur la kovrilo belan kolor-fotografon de nia "Ekspozicio de Infanaj Artverkoj". Mallonga teksto pri la Ekspozicio aperis sur la interna kovrilo. De pluraj lokaj venis petoj pri nia ekspozicio. Kamparaj lernejoj petas malgrandajn ekspoziciojn por specialaj okazajoj, ekzemple "Infanlibro-Semajno"; kaj eĉ privataj personoj petas parton de la desegnaĵoj kiel ornamaĵoj por infanaj festoj.

Nova lernejo, Greenwich, aliĝis al la Internacia Lerneja Familio gvidata de s-ro Chandler. Intereso pri tiu movado daŭre kreskas. Multaj instruistoj interesiĝas, precipe lingvinstruistoj en alternejoj. La lerno-libro "Ernie, le Petit Australien", de s-ro Kelk, faras tre bonan propagadon; kaj la infanoj en la Knabina Alternejo ĉe Hornsby nun klopodas sendi al Francujo materialon por nova lernolibro kiun, ili esperas, oni eldonos en Francujo.—E. W. Chandler.

● **MELBOURNE:** Unu lupo parolis pri alia, kiam D-ro Fridenbergs priskribis renkonton kun lupoj en Siberio, kaj montris, ke lupoj ne estas kanibalo, ĉar, tre facile rekoninte parencon, li nur oscede formariĝis (18/6). S-ro Bursztein donis interesan informon pri ge-edziĝoj de Uzbekistanoj, kaj ĉe-estantinoj konstatis, ke ili preferas loĝi en Aŭstralio. (25/6) La celo de parolanto J. Mugrauer estis instruo pri la presarto. Profesia kompostisto li povis, ne nur preparoli, sed ankaŭ montri kaj klarigi diversajn kliŝojn kaj ilojn, kiuj multe aldonis al la intereso. (2/7) estis dediĉita al enspezo por "La Rondo." "Kunportu ion—aĉetu ion," estis la postulo, al kiu multaj, eĉ neregulaj ĉe-estantoj, respondis. Okazis vigla merkato de multaj utilaĵoj, kaj krom tio oni organizis kelkajn loteriojn, ekz. pri kukoj, libro, kuseno kaj korb, kiuj pligrandigis la enspezon. Fine la vendistoj refreŝigis sin per teo kun sandviĉoj kaj kukoj ankaŭ vendataj. La tuta enspezo kun donacoj estis £16:12:0. Jen bona ekzemplo por aliaj kluboj. (9/7) S-ro Drummond ekhavis feliĉajn pensojn, kiam, trovinte kelkajn malnovajn paperojn, li decidis alparoli nin pri la fruaj paŝoj de la movado en Melbourne kaj la unua Aŭstralia Kongreso en Adelaide, kiun li mem partoprenis. (30/7) Bedaŭrinde oni devis ree funebri. La nesatigebla morto denove

forŝtelis unu el niaj anoj. Ci-foje estis S-ro Rosen, kiu multe suferis en koncentrejoj en Polujo. (6/8) F-ino Rosengrave provis bonan regalon por la okuloj. Bildoj prenitaj dum ŝia ferio en Novzelando montris en belaj naturaj koloroj pitoreskajn montpintojn kaj valojn, lagojn kaj riverojn de ambaŭ insuloj.

Krom tiuj aferoj, de tempo al tempo, kiel li ricevis leterojn, S-ro Koppel donis raporton pri la vojaĝoj kaj spertoj de Frank Halls survoje al Oslo.

Ce la Junia kunveno de RENDE-VUO, S-ro E. Hanks distris nin per mem verkita rakonto pri indigenoj, kiuj loĝis kie Melburno nun situas. La verko montris kiel funkciis inter la indigenoj la diversaj tradicioj jam priskribitaj de S-ino P. Hanks, kaj montris iom ne nur de la fizika, sed ankaŭ de la mensa batalo kontraŭ la invado de la blankuloj.

La parolanto ĉe la Julia kunveno estis S-ro Gottlieb. Kvankam mallonga, lia informo pri Hilelismo, ofte ligata al la Homaranismo de D-ro Zamenhof, estis interesa. Li klarigis, ke ĉi tio estis la doktrino de Hillel, Juda saĝulo, kiu vivis kaj instruis la "Oran Regulon" eĉ antaŭ ol Kristo.

—F.F.K.

(Neniu raporto alvenis el Brisbane.)

### S-ANO ROY RAWSON ELEKTIGIS AL LA VIKTORIA SENATO

La 21-an de Junio okazis balotado por la Viktoria Senato (Legislative Council). S-ano Roy Rawson, kiu kandidatis por la Laborista Partio gajnis la balotdistrikton "Suda Provinco" kaj tiel fariĝis nia unua aŭstralia Esperanto-Parlamentano. S-ano Rawson eklernis E-on en 1914 kaj partoprenis 1921 la Univ. Kongreson en Praha. De 1921 ĝis 1935 li estis sekretario de la Melburna E-Klubo kaj dum 25 jaroj (1925-1950) li estis Melburna UEA delegito. Al lia iniciatemo ni ŝuldas la "Pyke Memorial Ekzamenon". Gratulante lin pro sia elekto ni forte esperas, ke li daŭrigos helpi nian movadon eĉ pli forte ol dum sia fervora 40-jara agado.

### NIAJ LEGANTOJ OPINIAS

Post la apero de la nova "Rondo" ni ricevis de multaj legantoj leterojn en kiuj ili esprimis sian opinion pri la nova aspekto kaj enhavo de nia

organo. Malsupre ni citas el kelkaj leteroj:

"Pri la nova 'Rondo': mi plene kontentiĝas pri ĝi. La enhavo estas ankoraŭ bona kaj interesa, ankaŭ altnivela kaj bonstila, kaj certe ŝajnas arde aranĝita. Komence la redakta komitato faris bone kaj mi esperas, ke nia gazeto daŭre tenos sian lokon en la altestimo de la mondo."

—Alan Tomsey (A.E.A. Vic-Prezidanto).

"Pri la nova Rondo' mi devas kore gratuli vin. La dupaĝan 'Around the World' novaĵon mi multe utiligas inter amikoj k ĉe la laborejo kiel propagandon. Ankaŭ la 'Gast - Artikolo' serio ŝajnas al mi bona ideo, kiu promesas interesegan estonton, kaj la bone verkita 'Paradokso de Lili Marlen' de A. F. devis esti sekvota de aliaj similaj verkaĵoj. Por la unua paĝo, mi forte esperas ke ĉiufoje ĝi portos artikolon en nia propra lingvo. La letero de la nova prezidanto estas kuragiĝa komenco, sed mi ne konsilus ke ĉiam oni devus aperigi sur tiu paĝo nur leteron. Laŭ mia opinio, la Rondo nun montras al ni vizaĝon pli ridetantan."

—Steve Bennett (Prez. Sydney E-Societo).

"La prezenta aspekto estas plaĉa, kaj agrabla por la okuloj estas la nigraj buletoj, kiujn la presisto kompleze provis. Same agrabla estas la pli grandaj kaplinioj ĉe la rubrikoj. Mi gratulas la komitaton pri ĝia brava kompilo de n-ro 50. Ĝi estas okule tre plaĉa, kaj la enhavo tre interesa. Kun aparta plezuro mi legis la artikolon de DIAMO."

—F. R. Banham (ĝisnuna redaktoro de la "Rondo").

"Alvenis la Marta-Aprila numero de 'La Rondo'. Ĝi ja estas entute bonega, informiĉa numero. Gratulon pro ĝia aperigo!

—Joab Eljot (Willoughby, N.S.W.).

"Gratulojn pri la nova 'Rondo', kiu forme kaj enhave estas tre leĝinda."

—Ralph Harry (Prez. Canberra E-Klubo).

"La Rondo novvestita plaĉas al mi ĝenerale, speciale la propaganda

paĝo 'With E-o Round the World'. Mi iomete bedaŭras kaj malmultaj aŭstraliaj s-anoj verkas raportojn aŭ artikolojn, sed eble oni ricevos pli post iom da tempo. Ĉu ni povus vidi raportojn pri infanaj grupoj en Aŭstralio? Eble estas sufiĉaj por rajtigi malgrandan infansekcion."

—Grace Barlom (Sekr. Adelaide E-Societo).

## Lingvaj Problemoj

### "DISAPPOINTMENT"

En via bonega numero 51 S-ro Banham lerte diskutas pri la vorto "disappointment". Kiel do traduki? Mi ĝojas, ke tiu malbela vorto "desaponti" ne enradikiĝis. Generale, mi mem tradukas per la simpla vorteto "fuŝi": mia lasta espero fuŝis al mi; li promesis veni, sed fuŝis; mi tre deziris aĉeti tiun domon, sed fuŝigis miaj esperoj.—Joab Eljot.

### "SOCIAL EVENING"

Uzataj estas socia, sociala, societa, interamikiĝa, fest- (vespero).

Socia: kio koncernas la socion (the social organism as a whole).

Sociala: alia formo de "socia".

Societa: pri daŭra kuniĝo de personoj sub komuna regularo por atingi plezuron, profitan, kulturalan celon. 2 Kron. 1, 16. "Tiuĵ rondetoj havas karakteron . . . pure societatan" (Zam., Orig. Verkaro 321.)

Estas bedaŭrinde, ke iuj vortaristoj donas "societ'" por difini "high society", "the upper circles", "high life". Grosjean-Maupin: la bona

societo (la bonne societe); Millidge: "Society", la grandmondo (the higher social circles). "Mondumo" estas preferinda.

Festvespero estas bone uzata, se efektive oni celebras ian feston, ekzemple la naskiĝon de Zamenhof aŭ datrevenon de la klubo. Sed por Germano festvespero bildas "Festabend", kiu estas antaŭvespero de iu festo: eve, or vigil of a coming holiday.

Ordinare, "social evening" estas kunveniĝo de homoj, kiuj pli malpli bone jam konas unu la alian, inter kiuj tamen ĉeestas certa nombro ĝa nove-venintoj al la movado. Por la unua kategorio "interkonatiĝa vespero" taŭgas, ĉar, malgraŭ ke ili jam iomgrade konas sin reciproke, estas oportuno por ankoraŭ pli intime progresi en tiu rilato. Por la dua "interamikiĝa" estas trafa. "Interamika" servus por ambaŭ klasoj.

Ĉe la Pariza Kongreso oni komence uzis "interkonatiĝa", sed grade ĝi perdis silabojn, ĝis fine restis nur "interkona". Kaj tiu forme ĝi estis multe uzata.—F.R.B.

### MALLONGA RESPONDO AL

F.R.B.

Se germano aŭdas la vorton festvespero "Festabend" tiam li komprenas, ke temas pri la vespero de la festo mem. Mi interparolis ĉi-rilate kun 3 aliaj germanoj; ĉiuj samopinias, ke F.R.B. eraras.

La antaŭvespero de festo estas germane "Vorabend des Festes" kaj neniam "festvespero".

—Karl Hunold (Germano, el Hannover, nun Cooma, N.S.W.)

## With Esperanto around the World

● **AUSTRIA:** A special Esperanto-Information service was in operation at the International Socialist Youth Camp during July in Vienna. Esperanto-books and tourist literature were displayed and various excursions to the famous Vienna Woods organized. On the other hand, the Austrian Catholic Esperantists will organize an Esperanto Church Service and an exhibition during the All-Austrian Catholic Congress taking place in Vienna in September.

● **BRAZIL:** General Paulo de Figueiredo opened the 13th Brazilian Esperanto-Congress in Recife (State

of Pernambuco). The Governor of the State of Pernambuco received the members of the Congress at Government House.

● **DENMARK:** "Politiken," the leading Danish paper, publishes daily the programmes of all Esperanto-broadcasts in Europe. "The World Radio Handbook for Listeners," published yearly in Copenhagen, lists in its 1952 Edition the regular short-wave-broadcasts in Esperanto.

● **ICELAND:** "Aspektoj de Islando" is the title of an interesting picture book, published recently in Reyk-

javik, which gives a vivid picture of Iceland's unique scenery, hot springs, fishing and sheep raising, as well as the social and cultural life.

● **ITALY:** Prof. A. Segni, Minister for Education, by special circular-letter directed to all District Supervisors of Education recommends the teaching of Esperanto at Public and High Schools and allows the use of class-rooms by local Esperanto groups.

● **U.S.A.:** "Time," New York's well-known news magazine, published recently an article about Pastor John La Farge, S.J., expressing admiration that this churchman speaks 16 languages, amongst them also Esperanto. The 1952 Edition of "The New International Year Book," published by Funk and Wagnalls (New York), contains a long article about the progress of Esperanto. The Ford Foundation in a survey of the educational activities of trade unions recommends the study of Esperanto.

#### AM-KONSILO (Laŭ Shelley)

La plej esa font' avidas  
Por la brakoj de l' rivero;  
Ventoj, por ripoz', rapidas  
Ĝis la sino de l' ĉielo:  
Tra la mond' nenio solas;  
Ĉio laŭ dekreto dia  
Unuigi devas, volas—  
Ĉu ne, devo nia?

Montoj la blu-blun kisas;  
Ondo premas sin al ondo;  
Floroj ĉe la branĉ' kunkreskas  
En komuna intim-rondo:  
Teren falas sunkis' brila,  
Maren luna kis' magia—  
Ĉio tamen sensignifa  
Sen amkiso cia!

—JOAB ELJOT.

## Recenzoj

**NIKO KAJ NINA** de Josef F. Berger, eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg, Germanujo. 70 paĝoj; broŝ. Prezo 2.40 gm. plus afranko.

Bonvena signo de revigligo inter la germanaj samideanoj estas la eldonado de pluraj verkoj originalaj. Inter la freŝdataj venis al ni ĉi tiu "post-kursa legolibreto", kun la aprobo de la Lingva Sekcio de la Germana Esperanto-Asocio, kaj enkondukvortoj de la konata Esperanta verkisto, Max Butin. Niko kaj Nina estas gek-

naboj kies travivaĵojn ni ŝekvas ekde la lernejaj jaroj ĝis ilia geedziĝo. Ni plene konsentas kun S-ro Butin ke la libro estas en "modela bonstila lingvo." Aldone, la enhavo estas interesa, la aspekto plaĉa, la preso klara.

La aŭtoro ĉe la fino de la libro donas helpajn notojn pri kelkaj vortoj, kaj tradukojn de ĉiuj nacilingvaj kaj latinaj frazoj uzitaj en la verko—sekvida ekzemplo por ĉiaj Esperantaj presajoj.—I.P.H.

**KIEL AŬTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO**, de Klemenzenz Wiczorek. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg, Germanujo. 40 p. broŝ. Prezo 1.80 gm. plus afranko.

Kiel laiko, recenzante verkon kiu traktas la pedagogian sciencon, mi devas konfesi ke mi ne trovis ĉi tiun libron sukcesa. Ŝajnas al mi ke unuflanke ĝi ne estas sufiĉe scienca laŭ metodo kaj sistemo por kontentigi fakulon, dum aliflanke por nefakulo ĝi estas ne sufiĉe ordigita por ke li povu iri de punkto al punkto kun plena kompreno. La konkludoj de la aŭtoro ne estas demonstritaj sed nur metitaj antaŭ nin en jam-preta formo. La libro komenciĝas per difinoj pri la diversaj pensprocedoj ĉe spiritoj sana kaj malsana, sed la spaco por tiu parto estas tiel limigita ke la ĉelata kompreno flanke de la laika leganto ne estas trafita. Kontraŭe ĉe la fino de la libro pluraj paĝoj estas dediĉitaj al la ideoj de la aŭtoro. Oni ne povas dubi ke li estas homo de altaj idealoj kaj forta religia kredo. Ni citu: "La vera eduko povas enradikiĝi nur en spirito dikredema. . ." ". . . senreligia lernejo estas absurdaĵo," ". . . instruo senreligia estas la komenco de morala disfalo de la homa spirito." Certe ne ĉiuj el niaj legantoj povos akcepti tiujn dirojn; tamen ni tutkore aprobas ĉi tiun: "Nun la tempo forte urĝas al unuigo de la homaro, kaj tial estas necese nova ligilo aŭ ponto . . . Tia spirita ligilo aŭ ponto . . . estas la lingvo Esperanto."

Meze en la libro troviĝas mallongaj vivhistorioj pri famaj homaranaj pedagogoj, Socrates, Platon, Aristoteles, Comenius, k.c. . . La lingvo de la verko estas nesimpla, kaj enhavas multe da kunmetitaj vortoj. Prezo estas klara kun nemultaj prereraroj.

—I.P.H.



# La Ronda

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 53.

MELBURNO.

Okt.-Nov., 1952.

---

## ESPERANTO AND THE LINGUISTS

By Alan Towsey, B.A., Dip.Ed. (Sydney)

(Vice-President Australian Esperanto Association)

When seeking advice in most fields of human endeavour, ordinary people do not hesitate as a rule to turn to the experts in those fields, and in greater or lesser degree to follow their advice. Yet it is strange that, in the matter of the choice of an international language—on the necessity for which almost everybody is agreed—so little attention is paid to the opinions of the very people who are best qualified (in fact, the **only** ones qualified) to **give** a reliable opinion: the linguists. And when attention is sometimes paid to them, it is often to the minority or the comparatively inexpert.

Here is a list of prominent linguists and philologists who have made pronouncements on the International Language question: Professor Otto Jespersen (brilliant and widely known Danish philologist), Prof. B. Colinder (Upsala University), Dr. Stanley Rundle (brilliant English linguist and philologist), Dr. Frederick Bodmer ("The Loom of Language"), Prof. Leonard Bloohfield (Professor of Germanic Philology, University of Chicago), Mr. A. T. Pilley (UNO interpreter, President of the famous London "Linguists' Club"), Mr. J. R. Firth (famous phonetician of London University), Prof. E. Allison Peers (Professor of Spanish, University of Liverpool), Prof. Mario A. Pei (Associate Professor of Romance Languages at Columbia University), Dr. David Diringer (prominent Italian

Orientalist, author of "The Alphabet"), Prof. W. E. Collinson (Professor of German and Hon. Lecturer in Comparative Philology, University of Liverpool, also John Buchanan, Lecturer in Esperanto), Mr. S. L. Salzedo (distinguished Law Courts interpreter), Prof. Gilbert Murray (Regius Professor of Greek, Oxford University), Prof. J. E. B. Mayor (former Professor of Latin, Cambridge University), and Prof. Max Miller (famous linguist and Sanskrit scholar).

This list is not, and could never be, complete. It is culled from my linguistic reading and my bookshelves. But it is, I believe, a fair sample, and will serve.

Of the above, five are opposed to the whole idea of a constructed language, as impracticable. Bloomfield, Firth, Diringer and Salzedo prefer as an international tongue English, and Peers Spanish. There is no evidence that any one of them has ever made a thorough study of Esperanto; perhaps this accounts for their attitude. There is no space here to consider their arguments in detail. But they are by no means unanswerable.

For example, Firth says ("The Tongues of Men", p. 82): "The dangers of the translation of national idiom into the international language are perhaps even more difficult to avoid than with single words . . . **Platz nehmen** in German is not at all the same thing as **take place** in English, and if by any chance an

Englishman were to translate his sentence **Take the money to my father** word for word into an international language, a Frenchman hearing it might understand it to mean **Take the money FROM my father.**

But this ignores the fact that one does not translate mere words, but ideas. In Esperanto, **Platz nehmen** is **sidiĝi** (sit down), and **take place** is **okazi** (happen). In the sentence quoted, **take** is translated in both French and Esperanto by **carry** (portez, portu), and ambiguity could not arise. These things must be learnt in any language.

The other ten, that is, nearly 70%, all believe in the practicability and preferability of a "planned" rather than national language. Eight favour Esperanto. Jespersen did, too, originally, but later turned to Ido, then developed a project of his own (Novial). Bodmer is critical of Esperanto. Though the Press is fond of quoting him, his criticisms are apparently based on the outline given in a tiny Esperanto "key," and his "analysis" is laughable to anyone with a real knowledge of the language.

He complains, for instance, that **sesono** does not mean **season**, but **one-sixth**, that the word for **dog** is not **kano** (It. cane, Port. cao, Eng. canine), but **hundo**; that **year** is not **ano** (Fr. an, It. anno, Sp. ano, Eng. annual), but **jaro**; that **school** is not **skolo** (Lat. schola, It. scuola, Fr. école, Ger. Schule, Swed. skola), but **lernejo**.

Had he known more, he would be aware that **season** is **sezono**, that **kano** is already Esperanto for **cane** (Fr. canne, It. canna, Sp. cana), that **ano** is already a suffix meaning **member**, **follower** (Eng. Lutheran, Ger. Lutheraner, Sp.-It. luterano), that **skolo** does exist, meaning "school of thought," and that **lernejo** comes from **lerni** (to learn) and **ejo** (place for—Lat. -ia, Russ. -skaja; eq. -ery, ary in **bakery**, **dispensary**).

Some of those who favour Esperanto are outspoken in their praise. Mr. Pillery says that he follows the Esperanto translation in "The Linguist" every month, and has realised that Esperanto is in fact a real language, can be spoken, and can express any idea.

Dr. Rundle, though not a "regular" Esperantist, says ("Language as a Social and Political Factor in Europe," p. 179): "Esperanto is based on word material taken from the modern cultural tongues, has a very simple grammatical system ("regular and scientific"), and is easy to learn. . . . The result is a language of pleasing sound and easy to speak." And further (p. 180): "In spite of objections, Esperanto has shown that it is a language which can be learned, can be spoken and can perform the tasks expected of it. While it is far from perfect—and what human project can be perfect? . . . —the quality of the translations which have been made into Esperanto and the value of its ever growing literature, testify to the fact that the language is worthy of very serious consideration as a candidate for the role of international auxiliary language."

These are experts' opinions. On them you may base your own.

## De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,

Via malavara kaj tuja respondo al la sugesto esprimi per ia konkreta donaco nian sinceran dankegon kaj profundan estimon al S-ro Banham estas alta tributo al lia tre longa, sinofere-ma, kaj elstare kapabla servo al nia movado kiel redaktoro de nia oficiala gazeto.

La 3-an de Septembro, ĉe kunveno de la Melburna Esperanto-Klubo speciale dediĉita al tiu celo, S-ro Rawson prezentis al li je la nomo de A.E.A. belan oran horloĝon taŭge gravuritan. Lian vortan tributon subtenis multaj parolantoj kaj leteroj el cetera Aŭstralio.

Ĉiuj aŭstraliaj Esperantistoj fiere gratulas S-ron Rawson pro lia elekto kiel parlamentano. Grandan sukceson al li!

Ĉar la financa stato de nia organizo estas ankoraŭ tre malforta, ni estas speciale dankemaj al tiuj samideanoj, kiuj sendas donacojn. Tiurilate mi dankas F-inon Curtis en Brisbano kaj S-ron Hirschel en Melburno.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

# Nia Gast-Artikolo

## LETERO EL HAVAJO

Honolulu, Hawaii.

Karaj Amikoj!

Bonvolu akcepti havajn "Aloha'n" kiel esprimo de amikeco de izola Esperantisto restante meze en la norda Pacifiko.

Antaŭ longe, via redaktoro petis al mi artikoleon pri la movado ĉe ni, aŭ pri mia lando. Eble, la afabla redaktoro jam tute forgesis pri tia demando—tiel longe estas la tempo. Nun mi provas respondi.

Ĉe ni, bedaŭrinde, ne ekzistas movado. La instancoj de Esperanto Asocio de Nord-Ameriko sciigis al mi, ke ili konas neniam, almenaŭ kiel de la asocio. Pro diversaj kialoj estas ege malfacile starigi kurson en Havajo, ĉefe, kaj eble paradokse, ĉar restas ĉe ni pluraj nacioj.

Car la indiĝenoj tute ne ŝatas labori ĉe la sukerkamparo, la plantejstoj serĉas alilande, por akiri bonajn laboristojn. Unue ili venigis Ĉinanojn, tiam tiujn el Japanujo, tiam el Puerto Rikujo, tiam el Portugalujo—kaj eĉ tiujn el Rusujo. Laste, oni venigis Filipinanojn.

Multe el tiuj ĉi nacioj elektis resti ĉe Havajo; la gefiloj ĉeestis, kaj ĉeestas ĉe niaj lernejoj. Tiuj gefiloj fariĝas civitanoj de Usono, kaj nun tute apartenas al nia civita vivo. Sed la plenkreskuloj neniam lernis la anglan lingvon, aŭ nur sufiĉe por labora interkontakto. Do, la gefiloj devas esti dulingvuloj, parolante ĉinan, japanan, hispanan, portugalan, k.t.p. ĉe hejmo, kaj anglan ĉe la lernejo. Pro tiu kialo, ankaŭ oni starigis la t.n. "pidgin English", kvankam tiu ne estas sama kiel tiu parolata ĉe Solomoninsuloj, kaj alie en la suda Pacifiko.

Tial la ĉefa zorgo de ni instruistoj estas starigi bone parolatan anglan inter la diversnaciaj geknaboj. Ne facila tasko, ĉar la geknaboj nur ĉe la lernejo aŭdas kaj parolas la anglan; plej ofte ili uzas aŭ "pidgin" aŭ sian propran lingvon.

Kiel postvido, oni povas konstati, ke tiam kiam tiuj ĉi popoloj frue alvenis tien ĉi, tiam estis granda okazo por starigi Esperanton. Sed tiuj ĉi grupoj ne alvenis tien ĉi samtempe, kvankam grandamase.

Al tiu miksaĵo, alvenis ankaŭ naci-

anoj, ĝenerale unuope kaj senedzinaj blankuloj el eŭropaj landoj. Krom usonanoj (kiuj efektive, devenis el diversaj landoj) estis Skotoj, Svedoj, Angloj, k.t.p. La Skoto tre ŝatas kontroli la maŝinaron de la sukermueloj, kaj tiom loĝas ĉe la norda marbordo de insulo Havajo, ke oni nomis ĝin la Skotan marbordon.

Kvazaŭ tiu miksaĵo ne estus sufiĉa, tiuj senedzinaj blankuloj edziĝis al virinoj de la havaja, ĉina, japana (nur malofte) kaj portugala landoj. Kaj la ĉinoj, japanoj, k.t.p. interedziĝas. Do, nuntempe oni povas trovi geknabojn en kies vejnoj kuras la sangoj de du, tri, kvar, kaj pluaj rasoj! Felice, ne fiaskas la granda miksaĵo. Tiuj ĉi plursanguloj kreskas kiel prosperaj komercistoj, juĝistoj, samkiel la blankuloj.

Tial oni konstatas, ke almenaŭ en Havajo, povas resti diversnacioj en pacemo kaj unuiĝo, kvankam multaj el ili ankoraŭ retenas iom de naciaj kutimoj. Sed el tiu rezultas nur koloraj festagoj, kaj diversmanieraj festenoj! Ĉiuj sentas sin civitanoj de Usono, de unu lando—la geknaboj ĉe la lernejoj paroladas pri "niaj fondintaj patroj" ne rimarkintaj ke tiuj fondintaj patroj estis blankuloj de la malproksima okcidento, dum ili mem estas de la oriento. Unu el la plej kuraĝaj kaj viglaj batalstabo dum la lasta milito estis farita el "nisei" japanoj naskitaj ĉe Havajo.

Nu, ŝajnas al mi, ke mi sufiĉe babilas pri mia lando. Kompreneble, en tia eta letero, oni ne povas diri ĉion pri mia lando, sed tie ĉi mi nur provas klarigi kial ne ekzistas Esperanto-movado ĉe Havajo. Kaj mi esperas, ke la bildo pri mia lando kontentigas.

Kun koraj salutoj al vi ĉiuj, via Charles C. Cummingsmith, S.M. Marianisto.

## DUA KONGRES—BULTENO

La vojaĝservo de la bone konata firmo Boans Ltd. (Wellington St. Perth) jam faris rezervon por 24 kongresanoj je la bele lokita "University Hostel" je modera kosto. Plaĉos al Boans Ltd. prizorgi la vojaĝaranĝojn de iu ajn kongresano. Ĝenerala diskuto pri propagandaj metodoj okazos. (5 minutoj por ĉiu parolanto.) D-ro Fridenbergs (Melbourne) afable konsentis prelegi en la seminario kaj fari specialan paroladon

pri elstaraj E-istoj li ĝis nun renkontis.

#### Dua listo de aliĝintoj:

5. s-no D. Baesjou (Mt. Barker)
  6. f-no E. Chandler (Perth)
  7. s-ro N. Brodie (Perth)
  8. s-ro A. Saar (Perth)
  9. s-ro M. Strassberg (Perth)
- Kreskigu la liston, ŝparu kaj venu al Perth. Sendu vian kotizon (25/-) al 96 Blencowe St., West Leederville (W.A.).

## Australia Kroniko

● **PERTH:** Dum Aŭgusto ni bonvenigis ges-rojn Collier el Anglujo. Ili tuj iris al Albany kaj eble ili ŝatus ricevi leterojn de aŭstraliaj esperantistoj. La adreso estas: s-ro Collier, c/o Mr. Morgan, 4 mile Peg, Perth Highway, Albany (W.A.). Dum Septembro nia Ligo partoprenis en Ekspozicio de "International Goodwill League", kiu dum tuta semajno okazis en la urbdomo; ni ankaŭ partoprenis en la granda flortago. Tuta rondo da 5 studentoj sukcesis en elementa ekzameno, kun tre bonaj rezultoj; ili ĉiuj daŭrigas la studadon por pretigi sin por la Pyke-ekzameno. —Jack Hawks.

● **ADELAIDE:** La aŭgusta kunveno de la Adelaide E-Societo okazis kiel kutime je la 2-a jaŭdo. Nia plano doni librojn al la urba biblioteko progresas kaj jam ni transdonis kelkajn al la estro. Vizitis la kunvenon 3 s-anoj el Eŭropo, kies ĉeesto multe plaĉis al ni. F-no Telfer faris interesan paroladon, ilustritan per siaj belaj pentraĵoj de sia vizito al Anglujo.

Ni devas raporti bonan propagandlaboron de f-no Addis; intervjuo kun ĵurnalisto aperis en la vespera gazeto "The News", en kiu ŝi trafe pledis por nia afero. S-ino Barlow prelegis ĉe la Sindikato de la Butiklaboristoj. Jam 3 apartaj grupoj studas E-on, krom unuopuloj, kiuj ne povas viziti kursojn. —Grace Barlow.

● **CANBERRA:** Dum aŭgusto nia klubo sendis pakajon da esperantaĵoj al niaj suferantaj samcelanoj en Taegu (Koreujo), responde al letero de s-ano Heng Wi Hong, UEA delegito tie. S-ro H. W. Bullock, 4/8, montris bildojn de Koreujo al la klaso de la "suda flanko". S-ro S. Fulop montris, 25/8, filmstrion pri Parizo kaj s-ro Harry parolis pri siaj

spertoj en Parizo kaj la E-movado tie.

Ni starigis nian propran bibliotekon kun libroj kaj gazetoj donacitaj de klubanoj de Sydney E-Societo kaj de s-ro A. Towsey.

Ni nun havas 2 klasojn, kiuj nun kunvenas en la nordflanka kaj en la sudflanka antaŭurboj de Kanbero. La nordflanka grupo estas sub la gvidado de s-ro H. Torr kaj la sudflanka sub la gvidado de s-ro R. Harry. La klasoj kunvenas ĉiusemajne.

—N. Maybee.

● **BRISBANE:** Kun bedaŭro ni devas raporti ke la 22-an de Aŭg. mortis nia membro s-ro S. Wanmer. Dum la pasintaj 10 jaroj li multe helpis al nia afero pere de artikoloj en "Brisbane Telegraph". Li estis alte ŝatata de niaj membroj. Li longe postvivis en nia memoro.

S-ro H. N. Love, 8/7, prelegis pri la "Origino de Parohaj nomoj en la regiono de Cooktown." kaj s-ro Kelk, 12/8, pri "Sovaĝaj postsignoj en via kato, via hundo kaj vi mem." Bonvena vizitanto estis s-ro Crowe el Melburno kaj en nia kunveno de la 23-a de Sept. ni bonvenigis ges-rojn d'Oliveyra el Amsterdam, kiuj ekloĝis en nia urbo.

● **MELBOURNE:** Ĉiam bonvena kaj interesa al la anaro estas programo de s-no P. Hanks, kiu denove kompleksis (20/8) per legado de historio el Sveda Antologio—laŭ ŝia klarigo tipa historio pri la svedaj kamparanoj. Je 3/9 okazis festvespero honore al s-ro Banham. La anoj ĉe-estis grandamase kaj ĝuis veran parolfeston. Paroladoj de s-roj Drummond, Gottlieb, Hanks, Linton, s-no Hintze kaj D-ro Williams temis pri la longa servo al la movado kaj la bona laboro de s-ro Banham kiel redaktoro de "La Rondo". Poste, kiel dankesprimado de la AEA-anaro, s-ro Rawson transdonis al s-ro Banham oran brakhorloĝon taŭge gravuritan. Ŝajne estis granda surprizo por nia eksredaktoro. Tre emocie li faris dankparoladon en kiu li memorigis 3 virinojn, sen kies helpo eble oni estus elfarinta nenion, nome s-no Rawson, kiu, kiel Prez. de AEA multe klopodis por starigi la organon, s-no Bailey, kiu multe laboris je la multobligo kaj s-no Hintze, kiu faris grandan laboron ekspedi ĝin. Per bongusta manĝo finiĝis la vespero.

Neofta vizitanto al la Klubo (17/9) estis s-ano J. Oki. Li montris interesan filmstrion pri la malfaciloj kiujn spertas japanaj kamparanoj por havigi edukadon. Duan filmvesperon provizis s-ro Koppel (24/9), kiam li prezentis la filmstrion pri Nov-Zelando, kiun la nov-zelanda registaro eldonis kun E-komentario. La tria datreveno de lia alveno en Aŭstralio ŝajnis al D-ro Fridenbergs bona okazo por festo, do li gastigis la anojn per mangado kaj antaŭe parolis pri siaj spertoj en nia lando dum tiu periodo.

"Ekskurso al Wilson's Promontory" estis la temo de interesa rakonto de s-ro McKenzie (8/10) Bone desegnita mapo montris la vojaĝplanon. Kiel tre malnova Esperantisto, s-ro Drummond povas diri multe pri la fruaj tagoj de la movado en Aŭstralio. La programo (15/10) revivigis kelkajn spertojn por la malnovaj kaj donis interesan informon al la novaj anoj. Bonvena vizitanto (8/10) estis s-ro Suess, Prez. de la Brisbana E-Societo. El Anglujo venis f-ino Ruth Spencer, sekretariino de Halifax E-Klubo, kiu restos inter ni ĝis Decembro. Enmigris Aŭstralion, kune kun edzino, s-ano Marcel Leereveld, konata pro artikoloj en Sennaculo, Sennacieca Revuo kaj nederlanda Laborista E-isto.

Je la aŭgusta kunveno de la RENDEVUO, s-ro Linton legis ĉapitron el sia libro pri dummilitaj aventuroj en Nov-Gvineo. Ci-tiu rakonto temis pri renkonto kun krokodilo, de kiu savis lin liaj indigenaj amikoj Damok kaj Mageu. Li tiel grafike priskribis la aventuron ke oni image vidis filmon. La distrado en la septembra kunveno konsistis el humoroj prezentitaj de s-ro Mugrauer kun sia kutima aktora talento. Nur li iomete tro entuziasmiĝis je la prezentado de kolera edzo kaj lia voĉo sonis tro laŭte en la oreloj.—F.F.K.

(Neniŭ raporto alvenis el Sydney)

## Infan-Angulo

● **PERTH:** Ciun sabatan, en la Lig-Cambro, estas klaso por infanoj. Ne estas multaj lernantoj, sed ilia vicleco rekompencas la malgrandan nombron. Unu knabino, Jan. Featherstone, kiu estas ankaŭ ano de "Junior Red Cross," kantis esperante dum radio-disaŭdigo. "Sankta Luĉio" kaj "Valse Matilda". Sia Esperanto estas tre bona.

Ce festeto en la Mt. Lawley Stata

Lernejo knabinoj faris malgrandan ekspozicion en kiu estis E-aj libroj kaj leteroj kaj poŝtmarkoj de iliaj plumamikoj el diversaj landoj.

Ce unu el niaj kolegioj, la estrino instruas Esperanton al mezgrada klaso. Si opinias ke E-o multe helpas studentojn kiam ili lernas aliajn lingvojn.—(S-no) A. B. Sedgley.

● **ADELAIDE:** Gratulojn al (12 jaraĝa) Meredith Bartlett, kiu lernas Esperanton sub gvidado de f-no Kempson ĉe Woodville Lernejo kaj plej bone sukcesis en E-ekzameno kun 93%.



## Frank Halls Raportas

Post alveno en Londono, nia reprezentanto vizitis la centran oficejon de la Brita E-Asocio kaj de UEA en Rickmansworth. Cie li ricevis varman bonvenon. En Bournemouth la 3 lokaj kluboj aranĝis komunan salutvesperon, dum kiu Frank montris filmojn pri Aŭstralio. La "Bournemouth Daily Echo" aperigis longan intervjuon kun li.

Post ricevo de nova aŭtomobilo, Frank enŝipiĝis por Belgujo. Lia prelego en Brugge ricevis tre favorajn raportojn en la gazetaro. Tra Flandrujo al Aachen, kie germanaj esperantistoj bonvenis lin. 350 aŭskultantoj plenigis la plej grandan salondon de la Teknika Altlernejo de Aachen kaj la loka gazetaro favore raportis. De Aachen li rekte veturis al Kolonjo, kie li trifoje prelegis antaŭ pli ol 400 personoj.

Kune kun 3 germanaj esperantistoj Frank forlasis Kolonjon survoje al la Univ. Kongreso en Oslo. Tra Bremen, Hamburgo al la german-dana landlimo ĉe Flensburg, kie la UEA delegitino, f-no Jacobs, kore gastigis la vizitantojn kaj tute rifuzis ian pagon por trankonto. Tra Danujo al Helsingor kaj per pramŝipo al Svedujo.

La tre vigla E-klubo de Goteborg okazigis "Turismajn Tagojn", speco de antaŭkongreso. La palaca Borso estis impona kaj digna fono por renkontiĝo de 350 esperantistoj divers-

landaj, inter ili aŭtobusa karavano el Italujo, survoje al Oslo. Kaj jen raporto de nia delegito el Oslo:

"Ceestis pli ol 1600 s-anoj el 35 landoj. Ekster la Universitato flirtis grandaj verdstelaj flagoj. La Solena Malfermo okazis en la plej granda filmteatro de Oslo, Colosseum. Malfermis ĝin la urbestro, s-ro Brynjulf Bull. Ankaŭ parolis la norvega Ministro por Edukado, s-ro Lars Moen kaj la UEA-Prez. E. Malmgren. Sekvis salutoj de reprezentantoj de 12 registaroj kaj de 20 landaj asocioj. Mi rajtis paroli nur po unu minuto. Jen la teksto de mia paroladeto por la registaro:

Nur malofte mia lando reprezentigas sur tiu-ĉi estrado. Eĉ pli malofte aŭstraliano rajtas transdoni al la kongreso salutojn de sia registaro. Unu el la plej gravaj paŝoj al tutmonda akceptaĵo de nia lingvo estas registara agnosko. Do estas kun granda plezuro ke mi laŭtlegas la jenon: la Cefministro rajtigas min transdoni la bondezirojn de la Regno Aŭstralio al 37a Univ. Kongreso de E-o, kiun li esperas plene sukcesos.

Kaj por la Aŭstralia E-Asocio mi transdonis la jenajn salutojn:

Pro la granda distanco inter Aŭstralio kaj la eŭropa kontinento nur malofte ano de mia asocio povas partopreni Univ. Kongreson. Do despli ĝoje mi kaptas la oportunan transdoni al vi la bondezirojn de mia asocio. La komitato kaj anoj de A.E.A., kies reprezentanto mi estas, salutas vin, deziras plenan sukceson al la kongreso kaj certigas varman bonvenon al ges-anoj kiuj vizitos Aŭstralion.

Festparoladis D-ro Ivo Lapenna, brila oratoro. Per kantado de "La Espero" finiĝis la inaŭguro.

Jen telegramstilo la plej elstaraj

eroj de la kongreso: Sabato: Interkonatiĝa Vespero. Dimanĉo: Solena Inaŭguro, kunsidej de fak-organizaĵoj kaj malfermo de la Somera Universitato. Lundo: Unua Generala Kupveno, kunsido de la Unua Sekcio (E-o kaj Edukado) Ĉe tiu mi parolis kaj petis ke oni ne tro emfazu la facilecon de E-o; ĝi estas lingvo kaj devas esti lernata kiel aliaj lingvoj. Tiuj kiuj diras, ke oni povas ellerni ĝin en kelkaj semajnoj faras malservon al nia afero. La Distra Vespero samtage estis tre gaja kaj sukcesa. Elstara estis trupo da etaj gimnastikistinoj, 4 jaraĝaj. Mardo "Arta Vespero" en la Colosseum. La Oslo Urba Orkestro prezentis norvegan muzikon, kune kun popolkantoj kaj popoldancoj. Merkrede okazis diversaj ekskursoj, tre favorataj de la vetero. Jaŭde mi prelegis en kunsido de "Internacia Ligo de E-instruistoj" pri "Puno en la Lernejo". Sekvis forta aplaŭdo. La Oratoran Konkurson gajnis 14-jara Niĉjo Minnaja el Romo. Samtage oni laŭtlegis la premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj. Mia verko "Mia unua publika parolado" gajnis "Honoran Mencion". Vendrede okazis grandioza balo en la urbdomo. La urbestro regalis la esperantistaron. Manĝaĵoj, trinkaĵoj, cigaredoj, ĉio senpaga. Mi persone parolis kun la urbestro (s-ro Malmgren tradukis) kaj konstatis ke li tre favoras nian movadon. Ludis la Urba Orkestro, oni dancis kaj gaje interbabiladis ĝis malfrunokte. Sabate la kongreso solene finiĝis. Oni prezentis la premiojn de la Oratora kaj Belarta Konkursoj. Brazilo gajnis la UEA punkt-konkurson. La Prezidanto de la Zagreba E-Asocio invitis la 38-an Kongreson. La Espero eksonis, finiĝis la 37-a kongreso. (Komp. H.K.)

## With Esperanto around the World

● **AUSTRIA:** The visiting Melbourne Esperantist, Frank Halls, was received by the Lord Mayor of Vienna. The interview lasted an hour, during which only Esperanto was spoken. The Lord Mayor, an old Esperantist, smoothed the way for the visitor to study the famous workers' flats, Kindergartens and other social institutions of Vienna.

● **CANARY ISLANDS:** The new Chancellor of the University of La

Laguna has consented that Esperanto be taught at this university.

● **GERMANY:** In August, 760 Esperantists from 16 countries took part in the 25th World Congress of Labour Esperantists (S.A.T.) in Duesseldorf. Next year's congress will be held in Sheffield, England.

450 Railwaymen from 11 countries participated in the 4th World Congress of Esperanto Railwaymen at Lindau. The Austrian, French, Ger-

man and Norwegian Railway Administration were officially represented and the National Union of Railwaymen of Gt. Britain sent a telegram of good-will.

● **HOLLAND:** In The Hague, Esperanto policemen are wearing the green Esperanto Star when on duty.

● **JAPAN:** In September, more than 400 Esperantists from all parts of Japan met at the 39th Japanese Esperanto Congress in the ancient city of Kyoto.

## Recenzoj

**BAGATELARO** de Johan Hammond Rosbach, eld. Esperantoforlaget A/S, Oslo, 174 paĝoj; broŝurita, prezo (angla) 7ŝ. 6p. plus afranko.

La eroj de la "Bagatelaro" estas diversaj: poeziaĵoj spritaj kaj amuzaj, noveloj, kaj pluraj pecoj kiuj estas pli skizoj ol noveloj. Ili ĉiuj atestas viglan observo-kapablon. Du-tri ekscitas la mistikemon kiu estas ankoraŭ flegata ĉe multaj koroj. La plej longa kaj plej grava novelo estas "Mozaiko", en kiu la aŭtoro uzas la saman planon kiu servis al Boccaccio kaj Chaucer antaŭ jarcentoj kaj paroligas homojn hazarde kunvenintajn. Dum la rakontado montriĝas ke inter la kunvojaĝantoj estas kelkaj kiuj travivis la suferojn de la germanaj koncentrejoj. La demando leviĝas ĉu la militkrimuloj iel povos esti kvitaj al siaj viktimoj.

Kvankam kelkaj eroj estas pensigaj, ili estas samtempe esperigaj, kaj la tuto certe trovas koran akcepton ĉe la Esperantista legataro. Preso kaj la lingvo ĝenerale estas tre plaĉaj, sed ĉar S-ro Rosbach modeste destinis la verkon ĉefe por progresintoj, oni devas rimarki la uzon (paĝo 79, kvarfoje) de "meznokto" anstataŭ "noktmezo". Aparte bona en la listo de maloftaj vortoj, kiu aperas ĉe la komenco de la libro, estas la aldono de sciencaj nomoj de menciitaj plantoj kaj animaloj—priskribo ofte estas aplikebla al pluraj, sed scienca nomo al nur unu speco.

—I.P.H.

**LA SUNKRONO** de Marie Koenen, el la nederlanda lingvo tradukis P. CH. M. VAN DE VIJVER. Eld. "Malnova Turo." 104 paĝoj, broŝ. Prezo: ngd. 1,25 aŭ 6 int. rpk.

Jen bela alegorio en kiu, laŭ mezepoka modo, la Maliculo, Lucifero,

prenis sur sin homan eksterajn kaj venis sur la terglobon. La deirpunkto de la rakonto estas la Novtestamenta historio pri la Tentado de Kristo sur la Monto. La malvenko, kiun Lucifero tiam suferis, daŭre rodis en li kaj por venĝi tion li denove utiligis la mirindan Sunkronon, forĝitan en la Infero. Ĝi vekis en la homaj koroj ambicion kaj avarecon senkompatajn. Tiuj, kiuj sekvas ĝian erarlumon trovas ĉiam sukceson, sed neniam trankvilon.

La libro, kvankam trafadenita de la morala leciono, neniel estas predikeca. Male, ĝi tenas la atenton de la leganto ĝis la fina paĝo. La lingvouzoj estas plaĉaj, la tropoj bone elektitaj, kaj la frazoj egalpezaj—fakte la tuta verko havas lirikan kvaliton. Memevidente, la laboro estis laboro pro amo, ne nur ĉe la aŭtoro, sed ankaŭ ĉe la tradukinto.—I.P.H.

**HENRY GEORGE** ("Tributo al Nobla Geniulo") Trad. F. R. Jones; originalo de E. Yardley. 64p. Prezo 4/3 (angla), ĉe Henry George Foundation, 11 Bryson St., E.7, Victoria.

Pro sia klara traduko kaj simpla esprimforto, tiu kompilaĵo pri la vivo kaj verko de la impostreformisto taŭge servus kiel klasa leglibro.

Naskita malriĉule en Filadelfio en 1839, Henry George en 1870 konceptis teorion. Li kredis, ke la radiko de la ekonomia malbono estas la termonopolo. Por liberigi la teron do oni kolektu la terorentojn por la publiko. Tio devigos ĉiun terposedanton aŭ plene uzi ĝin aŭ cedi ĝin al alia por frukta uzado. Dum 1877-79 li verkis sian ĉeflibron, "Progreso kaj Malriĉeco." Ĝi estas en ĉiu biblioteko en la civilizita mondo.

En 1897 centmiloj baraktis por funebre saluti lian brankardon en Nov-Jorko.

Lia filo Henry donas vivan bildon pri sia patro, skribas rememore pri lia karaktero kaj pensevoluo, pri lia juro ne ripozita ĝis li eltrovas la ŝlosilon al justa, abunda socio, kaj fine pri la sceno ĉe la enterigo.

Protestanto (d-ro Lyman Abbott), katoliko kaj rabeno foras la panegirojn en lingvaĵo majeste sonora.

Leo Tolstoj plene aprobis Esperanton; ankaŭ al la terimpost-reformo de George li samforte favoris. Lia teksto, ankaŭ la funebraj oracioj, estas en ĉi-libro.

La teorio estas: imposti la tervarojn kaj forigi kompenso la impostojn sur ĉio, kio estas la produkto de homa laboro. Alivorte: abolu ĉian imposton krom unu—la imposto sur la tero.

La bazprincipo jam parte estas aplikita en iuj mondpartoj, interalie Aŭstralio, sed ankoraŭ en neniu lando oni aplikas ĝin ĝis la punkto, kie la tuta valoro de la tero estus kolektata por publikaj bezonoj. En Aŭstralio, kiel en aliaj, restas individuaj impostoj, kiuj tre ŝarĝas la produktadon.

Preseraroj: ununcenda; "San Francisco Times."

P. 5: tenadas ilin sklavigitajn (sklavigitaj, aŭ, en sklaveco); p. 9: movigan (movan, aŭ pelan) pasion; 31: demonstracio (manifestacio); 35: memorigataj (rememorataj); 41: justeco (fitness — ĝusteco); 43: la trad. misuzas "ignore" (intence neatentante) en la senco de Agoj 17/23: . . . . kiun vi nekonante adoras.

—F.R.B.

## Lingvaj Problemoj

### Oficialigo de la sufikso -END

Post pristudo kaj voĉdonado la Akademio de E-o decidis oficialigi la sufikson -end kun la difino: "kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata -i."

### "FESTVESPERO"

Kvankam nia malgranda organo ne povas okupi sin per la diskutado pri germanlingvaj esprimoj, mi tamen deziras aldoni, ke ankaŭ en Aŭstrio la esprimo festvespero "Festabend" estas uzata kiel s-ano Hunold diras kaj ne kiel en la artikolo de F.R.B. Tamen, la plej granda german-angla vortaro Muret-Sanders tradukas la vorton "Festabend" kiel "eve of a holiday". Denove pruvo, ke la lingvo de vortaristoj aŭ gramatikuloj ne estas tiel sama kiel tiu de la ordinara popolo.—Herbert Koppel.

Forpasis ĉe la 15a de Sept., en sia 69a jaro, Mary Caroline, kara edzino de Joab Eljot. La tuta forpaso okazis, kvazaŭ amikaj manoj forkondukis ŝin.

Deziras korespondi kun Aŭstralianoj: Ladislauo Pohl, str. Garii 6, BAIJA MARE, Rumanio.

Por la vero pri Nova Ĉinio, abonu "El Popola Ĉinio," 7/6 jare. Aŭstr. Peranto: S. Bennett, 62 Brighton Av., Croydon Park, NSW.

### GIVE 'BOOKS FOR CHRISTMAS.

To your local or public lending library give a copy of "LIFE OF ZAMENHOF," by Dr. Privat. English, cloth-bound, only 5/6.

Grammar & Commentary (Cox) 10/-  
Practical Course in E-o (Szilagy) 3/-  
English-Esperanto Dictionary

(Fulcher & Long) . . . . . 16/6

Esperanto-English (Millidge) . . 17/6

Plena Vortaro de E-o . . . . . 31/-  
Leteroj de Zamenhof—

Vol. I . . . . . 27/6

Vol. II . . . . . 27/6

The Language Problem (Durrant) 2/-

Vivo de Zamenhof (Privat) . . 7/-  
Fundamenta Krestomatio

(Zamenhof) . . . . . 15/-

### READ "EPOKO" BOOKS

Light reading for an idle hour.

1. Murdo en la Orienta Ekspreso (Christie).

2. La Knaboj de Paŭlo-strato (Molnar).

3. La Princo kaj Betty (Wodehouse).

4. La Tempo-Maŝino (H. G. Wells).

5. Princo de Marso (Burroughs).

6. Colomba (Merimee).

7. Sep Vangofrapoj (Aszlanyi).

8. La Virineto en Bluo (M. Stuttard).

9. Brulanta Sekreto (Zweig).

10. Kiso de la Reĝino (Navjivin).

Nos. 1 to 6 each 3/6.

Nos. 7 to 10 each 5/-.

### ORDER BOOKS FROM:

Mrs. O. Glenie, 12 Crimea St., St. Kilda, Vic.

Mr. A. Towsey, 41 Hill St., Parkes, N.S.W.

Miss E. B. Carrick, 167 Lytton Rd., East Brisbane.

Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Add 10% for postage.

### SUBSCRIPTIONS RECEIVED

Mesd. Hintze 10/-, G. Barlow 12/6,

W. Andres (Donation) 15/-, Mr. L.

Dusek, Canberra E-Club, 12/6.

### Subtenantoj:

Afable aliĝis kiel subtenanto: F-no Curtis (Kvinslando) 21/- (dua abono!), s-ro V. Koseff (Adelaide) 20/-, s-ro K. Hirschel (Melbourne) 30/- (anonco kaj donaco). Koran Dankon!



# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



---

Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

---

Vol. 10, N-ro 54.

MELBURNO.

Decembro, 1952.

---

## ESPERANTO AS AN EDUCATIONAL TOOL

By Dr. C. J. Adcock, M.A., Ph.D., Lecturer at Victoria College  
(Wellington, N.Z.)

Quite apart from the value Esperanto may have to pupils when they leave school there are a number of weighty reasons why some use should be made of it as a contribution to the ordinary school work. Whether or not the extensive teaching of Esperanto on the ground of its value, immediate or potential, as a means of international communication is difficult to determine with any certainty, but there does seem to be strong evidence that the teaching of Esperanto pays immediate dividends in the school.

Two school subjects at the primary level are directly related to Esperanto: English and Geography. In the case of English it is found that the study of Esperanto gives an insight into language structure, which a direct study of English grammar fails to give. It was found in Eccles (England), that taking time out of the normal English teaching periods to teach Esperanto not only gave pupils a working knowledge of Esperanto in one year, but actually increased the average mark in English. At the same time there was a pronounced increase in the interest in Geography. Correspondence with children in other countries is a surprising stimulus to the study of the countries concerned. This effect is increased by the prestige value of the achievement.

One could not stress too highly the value of correspondence carried out in this way. It not only motivates the learning of Esperanto itself but takes allied social studies within its halo and what is surely extremely important in a world threatened with hydrogen bombs, reduces international tensions.

Much opposition to the teaching of Esperanto has come from a mistaken idea that its introduction into the schools would be inimical to foreign language learning. The contrary is the truth and constitutes the strongest argument for Esperanto in schools. Professor Findlay, an acknowledged authority on the teaching of foreign languages, puts forward in his text on "Modern Language Learning" a proposal that Esperanto should be used as an introductory course whenever foreign languages are taught. He bases this on actual experiments carried out in England and on his own experience with a group of graduate teachers who spent a fortnight learning Esperanto in order to make a study of the difficulties faced by the beginner in a new language.

Not only in England but in other countries also it has been shown conclusively that one year of Esperanto followed by one year of foreign language gives better command of the foreign language than two years on the foreign language alone. This is

quite understandable since the beginners tend to be overwhelmed by the complexities of a new language. Esperanto provides them with a simple grammatical framework which, because of the absence of exceptions, can easily be understood.

One of the weaknesses of our own language students is that they begin with little understanding of grammatical structure. The study of Esperanto in the final years of the primary school would make good this deficiency. It would provide a practical motive for grammatical study; it would provide simple material with which to work; and it would carry the pupil beyond the confines of the national language.

(Thanks to Mr. F. R. Banham for having drawn attention to the above article by the President of the N.Z. Esperanto Association, part of which is reprinted from the "N.Z. Esperantist.")

## De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,

La naskiĝtago de D-ro Zamenhof, la 15-a de Decembro, dato plej kara al ĉiuj Esperantistoj, estas sekvata dek tagojn poste de aŝia festotago tre kara al la granda pli-multo inter ni, la kristana. Do, dezirante al ĉiuj niaj legantoj "feliĉan kristnaskon", mi ripetu al la "Fortego la mondon reganta" la preĝon de nia kara Majstro, "Donacu Vi benon al nia laboro, donacu Vi forton al nia fervoro."

Precipe de la malgranda doktoro, sed ankaŭ de liaj kunbatalantaj pioniroj, nia generacio heredis tradicion de persista, fidema, kaj espera klopodo, ĉu en komuna agado, ĉu en individua penado. Ni restu, do, fidelaj al tiu tradicio, kaj, ĉerpante inspiron de lja nobla ekzemplo kaj kolosa kuraĝo, ni daŭre fosu nian malgrandan sulkon.

Por ni, Esperantistoj, "Amu unu la alian" estas la natura sekvo de "Kompreneble unu la alian."

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

## JAPANA ESPERANTISTO VIZITIS AŬSTRALION

Ciam troviĝas interesajoj en la A.E.A. poŝtkesto, sed de tempo al tempo troviĝas ankaŭ agrabla surprizo. Tia estis letero, kiu alvenis la 5an de Septembro. Skribis ĉi tiun Japanan samideano, S-ro Y. Waseda, Sek. de Nagoja E-Societo. Ekvojaĝante al Nov-Kaledonio por komercaj aferoj, li skribis aĉpoŝte el Moji por avizi, ke survoje lia ŝipo "Orient-Marŭ" vizitos kelkajn aŭstraliajn havenojn, kaj li esperas kapti la okazon por renkonti aŭstraliajn samideanojn. Tuj nia Sekretario fariĝis kvazaŭ elektrigita. Leteroj flugis en ĉiujn direktojn—al ŝipagentejoj por informo pri alvenoj de la ŝipo, al samideanoj por ke ili estu pretaj renkonti la vizitonton, kaj al la vizitonto mem ĉe ĉiu haltejo. Krom tio li multfoje vizitis agent-oficejojn en Melbourne por havi la lastan informon.

Okazis kelkaj prokrastoj, sed fine la ŝipo alproksimiĝis al la unua renkontejo. Car ne ekzistas E-isto en Townsville, la unua rezulto de la supremenciita agado okazis en Brisbane. Letero de F-ino Carrick informis nin, ke U.E.A. Deligito, S-ro S. L. Parry atendis la ŝipon ĉe 'a haveno, kaj kondukis S-ron Waseda al sia hejmo por lunĉo. Poste li veturigis lin al kelkaj vidindaj marbordejoj, Sandgate, Redcliffe kaj Scarborough. Denove por la vespermanĝo Gesinjoroj Parry gastigis lin kun du aliaj samideanoj, kaj dum la vespero alvenis kelkaj aliaj por saluti lin. Ĉiuj pasigis interesan vesperon. La sekvantan tagon subita forveturo de la ŝipo malebligis proponitan viziton al la Klubo en la vespero, sed antaŭ la adiaŭo S-ro Parry denove kondukis lin ĉirkaŭ la urbo.

Bedaŭrinde por E-istoj en Nov-Suda Kimrujo la ŝipo ne plu haltis ĝis alveno en Melbourne, sed tie ĉio iris glate por la planoj de la A.E.A. SEK. La ŝipo albordeĝis dimanĉmatene—do li estis libera por mem renkonti tiun malpaciente atenditan samideanon el lando, pri kiu li jam de longe interesiĝis kaj multfoje revis. Eĉ la naturo ŝajne kunlaboris, kaj meze de multe da malbona vetero provizis belegan sunbrilan tagon. Okazis nenia senreviĝo. Atendis lin

sur la ŝipo tre junaspekta, okulplaĉa Japana viro kun ĉarma rideto kaj agrabla informo, ke li restos en Melbourne 5 tagojn—do povos viziti la Klubon je merkredo; kaj, kvankam modeste, tre afable li konsentis alparoli la Klubanojn. Esperantisto dum nur 4 jaroj trege bone kaj nur Esperante li parolis. Nia Sek. estis ravita, kaj tuj komencis sian demandaron, kiu daŭris preskaŭ senĉese dum la tuta kunesto de nia nova amiko.

Oni ne povis forlasi la ŝipon sen ekzemplo de tiu gastamo, pri kiu ni multe legas, sed tuj post gastigo ĉe la ŝipestro, niaj reprezentantoj forkondukis la vizitanton por montri al li la urbon. Esploro de ĝardenoj kaj la Militmonumento, de la supro de kiu vidiĝas belega panoramo de la urbo, agrable okupis la posttagmezon, kies sola difekto estis la malbona servo ĉe la Gardena Kiosko. Sekvis vespermanĝo kaj granda intereŝanĝo de informo en la loĝejo de la Sek.

Lundon vespere nia Sek. denove renkontis kaj kondukis lin al japan-amerika Esperantisto, S-ro Oki, kiu poste helpis lin butikumi. Komuna manĝo kaj interesa konversacio pasigis la vesperon. Mardon renkontis lin la Prez. de Melbourne E-Klubo, S-ro Drummond, kiu helpis lin pasigi la tagon per plua esploro de la urbo;

kaj en la vespero por montri sian dankon S-ro Waseda invitis la Sek. n al vespermanĝo. Merkredon li vizitis la Klubon, kie li donis interesan paroladon pri Japanujo kaj la tiea E-movado; kaj poste tre afable respondis al multaj demandoj pri sia lingvo. Tiu vespero devis esti la adiaŭo por nia Sek., kiu post la kunveno prokrastigis la finan vorton per manĝeto, dum kiu li enŝovis kiel eble plej multajn last-momentajn demandojn, antaŭ ol, kun multaj esperoj pri estonta renkonto, li fine kaj damaĝe diris "Ĝis revido." Tamen restis al la vizitanto unu tago en kiu S-ro Drummond aranĝis por li interesan sperton. Post lunĉo en sia hejmo, tiu kondukis lin al la Parlamento, kie li renkontis nian Parlamentanon, S-ron Rawson, kiu montris al li ia domon.

Ĉe ankoraŭ unu haveno la ŝipo "Orient Maru" haltis antaŭ ol forlasi Aŭstralion, kaj en letero el Newcastle por esprimi sian dankon, S-ro Waseda priskribis plaĉan renkonton tie kun S-ro Perry. En pli frua letero post gastigo en Brisbane, li skribis, ke tiu renkonto 'estis por mi unua sperto bone memorinda pro kio mi ŝuldas grandan dankon al Brisbanaj samideanoj.' —O. B. SERVANTO.

## With Esperanto around the World

Mr. Joseph R. Scherer, well-known Esperantist world traveller and president of the Los Angeles Esperanto-Club, appeared in the Radio and Television Programme of the National Broadcasting Company which has an audience of 30-40 million listeners. In Groucho Marx' Revue, "You Bet Your Life," he explained the advantages of Esperanto. This programme was later rebroadcast over the U.S. Forces Network in Europe.

110 Youths of 10 countries met in Ry (Denmark) at the 8th International Congress of Esperanto Youth.

The well-known Boston magazine "Education" published recently a seven-page article "People must speak to people," by Mark Starr, in which the author pleads for Esperanto and its value in promoting friendship amongst people of different countries.

The Austrian Railways Administration has agreed to the erection of sign-boards at railway stations, directing travellers to local Esperanto delegates and clubs.

The Rand School of Social Science in New York includes Esperanto classes in its 1952 programme, conducted by Mark Starr, Educational Director of the International Ladies' Garment Workers' Union.

## Australia Kroniko

★ PERTH Anoj kaj amikoj de nia Ligo ĝuis tre sukcesan socian vesperon je sabato 18 Okt. Pli ol 40 personoj ĉeestis. Du delegitoj de nia Ligo akceptis inviton de Lia Moŝto, la Urbestro, kaj ĉeestis Civitan Bonvenigon al Pastro Cyril Brown, estro de la "Misio por Maristoj." S-ano Norman Brodie, iama prezidanto kaj

unu el niaj plej spertaj esperantistoj suferis gravan akcidenton kaj nun kuŝas en "Royal Perth Hospital". Krom aliaj vundoj, brako kaj kelkaj ripoj estis rompitaĵ.—Jack Hawks.

★ **ADELAIDE:** La Adelaide E-Societo kaj la W.E.A. Esperanto-grupo aranĝis tre interesan konferencon ĉe la Hotel Esplanade, Brighton dum Oktobro. Ĉirkaŭ 20 personoj partoprenis kaj ĉiuj ricevis novan esperon kaj entuziasmon de la sperto. Organizite de f-ino W. Addis, la konferenco estis la unua en Adelaide deponde longa tempo, sed ni esperas estonte organizi similajn semajnfinojn dufoje jare, dum aprilo kaj oktobro. Eble vizitontoj al nia ŝtato aranĝos feriojn ĉe ni dum tiuj monatoj por partopreni.

La plej ŝatata afero de la konferenco estis la ĉeesto de kelkaj novaj varbitoj. La knabinoj de la E-klubo de la Woodlands Anglikana Lernejo vizitis nin, kaj montris entuziasmon por nia afero. Ili babilis kaj ŝercis en Esperanto sentime kaj memfide. La plej laŭdinda Esperantisto nuntempe en Sud-Aŭstralio estas s-ro Harold Fidge kiu lernis la lingvon kaj povas paroli ĝin preskaŭ perfekte post nur 5 semajnoj!

Denove oni spertis ĝojigan interkompreniĝon kaj la fakton ke pli aŭ malpli la lernantoj de Esperanto infektiĝas per la interna ideo E-o, kaj volas labori por la tutmonda interfratiĝo de la homaro. Ni estas certaj ke de nuntempe la movado pli firmiĝos en nia ŝtato.—Grace Barlow.

Laŭ ĵus ricevita raporto el "Adelaide Advertiser", nova E-klaso kunvenas ĉiulunde en la Centra Metodista Misio.

★ **MELBOURNE:** Vizito de S-ro Waseda el Japanujo (22/10) (legu aliloke) komencis serion da interesaj vesperoj. Gratulon al S-ino Humphries. Esperantisto dum malpli ol jaro, ŝi prenis sur sin (29/10) la tutan programon. Ĉi tiu komenciĝis per ludo (en Esperanto), kiu elvokis ridadon kaj finiĝis per bona gesto—donaceto al nova klubano el Nederlando, S-ino Leerveld. Sekvis parolado, kiu montris bonegan progreson en la lingvo, kaj temis pri du ferioj per aŭtomobilo al kaj restado ĉe (1) Lakes Entrance, (2) Apollo Bay. Per mapo ŝi montris la vojojn, kaj poste per belaj kolorfilmoj ŝia filo

(ankaŭ lernanto) montris la lokojn. Du amuzaj filmetoj finigis bonegan programon. F-ino Ruth Spencer (Sek. de E-Klubo en Halifax, Anglujo) parolis (5/11) pri vojaĝoj al Nederlando, Germanujo kaj Francujo kaj gastigo ĉe samideanoj en Arnhem, Kolonjo kaj Parizo. Post preskaŭ 2-jara restado ĉe ni, S-ro Peter Dikštejn anoncis (12/11) reiron al Svedujo, de kie li enmigris nian landon. Per la ŝipo, "Castel Felice" li vojaĝos al Napoli de kie li esperas viziti Hispanan korespondanton, antaŭ ol veturi tra Francujo kaj Germanujo al Svedujo. En adiaĵa parolado li dankis pro samideana akcepto en Melburno. Prez. Drummond kaj Vicprez. Fridenbergs memorigis la fervorecon de S-ro Dikštejn. Poste S-ro Marcel Leerveld faris interesan paroladon pri la ekonomia kaj kultura vivo de Nederlando. Ĉi tiun li daŭrigis (19/11) kaj donis multan informon pri diversflankaj aferoj en la lando de sia naskiĝo. Samnokte S-ro Burštejn priskribis adiaŭon ĉe la ŝipo de S-ro Dikštejn, kaj S-ro Koppel donis interesan raporton pri la vojaĝo de Frank Halls en Jugoslavio, kie nur malfacile li evitis malliberiĝon.

RENDEVUO: "Aŭstralioj kaj Eŭropoj" estis la titolo de parolado de D-ro Fridenbergs ĉe la Oktobra kunveno. Li parolis pri siaj observoj en Aŭstralio kaj faris kelkajn komparaĵojn kun aferoj en Eŭropo. Eble kelkaj aliaj, kiel mi, ne tute konsentis pri ĉio, kion li diris pri Aŭstralio, sed tio ne forrabas la intereson de kutime oratora parolado.

Kun bedaŭro ni anoncas ke s-ano J. Gottlieb ("Diamo") suferis aŭtomobil-akcidenton kaj restis longatempe en hospitalo. Kvankam li suferis vundojn kaj dolorojn, li ne suferis malkuraĝiĝon. Kun bona spirito li interesigis kelkajn kunpacientojn pri nia afero kaj komencis instrui la lingvon. Ni deziras al li baldaŭnan resaniĝon.—F.F.K. (Sydney and Canberra NE raportis).

### MONTA SAVO de Karo T.

Sur la suproj de la sudaj alpoj en Aŭstralio apud Monto Koziusko, oni paŝtigas ŝafrojn dum la someraj monatoj, deirigante ilin, kiam alprok-

simiĝas la vintro.

Lastatempe, vendredon, dekkvinan de Majo, kelkaj ŝafgardistoj kolektis ŝafojn kiel kutime je la tagmezo. Unu el tiuj, dekdu-jara knabo, perdiĝis pro la nebulo, kiu ofte kovras la monton, malhelpante vidon.

Kiam la anaro konstatis, ke li perdis la vojon, ili tuj organizis serĉon, rapidante al la registara tendaro sur grandega hidro-elektra entrepreno, kie laboris 440 homij, inter kiuj estas 150 norvegoj ja alktutimigintaj al neĝo kaj malvarmo en sia propra lando, sed la tuta armeo de 440 homoj senescepte sin proponis por helpi en la serĉo, kaj ekiris la sekvintan tagon por trovi la perditon. En tre malvarma vetero ili serĉis la tutan regionon sensukcese ĝis tagmezo, sed kiam iu sonigis la aŭstralian alvokon, "K-u-u-i!" ili aŭdis la bojadon de la hundo de la knabo, kaj baldaŭ retrovis la knabon, kiu manĝis nenion dum tridek horoj.

Post kiam li avide englutis la proponitan manĝaĵon, la tuta armeo eskortis lin al lia hejmo, kie li tuj satigis sin per rostita ŝafido kaj terpomoj, neforgesante la fidelan hundon, kiu tiel komfortis lin dum la longa malvarmega nokto, ke ĝi eble konservis al li la vivon. Estis bonŝance, ke la afero ŝniĝis tiel kontentige, ĉar la sekvintan tagon, dimanĉon, kiam neĝegis, la monto kovriĝis tiel amase, ke necesis ne malpli ol ok neĝplugiloj por malfermi la vojon kaj malhelpi malsaton al la tuta monta regiono.

## Nia Gast-Artikolo

Okaze de la vizito de la japana samideano Y. Waseda, pri kiu vi trovas detalan raporton aliloke, ni petis lin kontribui artikolon al nia serio "Nia Gast-Artikolo". Li afable akceptis nian proponon kaj sendis al nia redakcio la ĉi-suban artikolon:

### LA ESPERANTO—MOVADO EN JAPANUJO

de Yutaka Waseda  
(Sekretario de Nagoja E-Societo)

Mi estis tute embarasita kiam mi ricevis peton de la sekretario de A.E.A., s-ano Herbert Koppel, ke mi kontribuu artikolon al "La Rondo" pri la "Japana Esperanto-movado". Mi ne estas tiel "elstara" persono kiel tiuj samideanoj kiuj ĝis nun kon-

tribuis al via rubriko "Nia Gast-Artikolo." Mi diras tion nenion por ŝajniĝi min ordinara laŭ modo de la 20-a jarcento. Nur 4-jara, t.n. post-milita soldato de nia movado, mi timas ĉu la petinto ne supertaksis mian kapablon respondi la demandon. Sed modesta kompetenteco por akcepti la proponon troviĝus en la fakto ke mi estas la unua japana esperantisto kiu vizitas vian landon post la milito. Do, mi provos priskribi la staton de nia movado kiun mi mem travivis depost la milito.

En Japanujo ekzistas la "Japana Esperanto - Instituto" (J.E.I.) kun 2000 membroj, kiu estas ŝajne landa organizo. La J.E.I. eldonas jam depost 30 jaroj konstante kaj regule sian organon "La Revuo Orienta," kiu enhavas japanajn kaj esperantajn artikolojn, plejparte por studo de la lingvo. Troviĝas en ĉiuj urboj memstaraj lokaj grupoj aŭ societoj. Ekzemple en nia urbo Nagoya kun miliono da loĝantoj, la Nagoja E-Societo havas ĉirkaŭ 50 membrojn. En ĉiu somero okazas tutlanda kongreso sub organizado de sufiĉe granda societo. Post mia esperantistiĝo mi mem partoprenis 4 kongresojn, nome la 35-an en Osaka, 36-an en Tokio, 37-an en Yokohama kaj la 38-an en Nagoya, kies sekretario mi estis. Ĉi-jare oni organizis kun sukceso la 39-an en Kyoto de la 21-a ĝis 23-a de Sept. dum mia vojaĝo al Aŭstralio. Laŭ aeropostaj raportoj de amikoj partoprenis proksimume 200 samideanoj.

La malvenko de la japana armeo en 1945 estis plej grava okazaĵo, kiu ŝajne preskaŭ entombigis ĉion malnovan, feŭdecan, ŝovinisman, kaj malfermis novan vivon modernan kaj internacian por la japana popolo. La lingva problemo ankaŭ ne estis escepto. Kompreneble, Esperantistoj esperis tro grande al ekfloro de nia movado, sed plejparto de la popolamaso, en terurege mizera vivnivelo, kiun vi neniam povus imagi, ne povis, eĉ se ĝi volus, oferi sian tempon kaj monon al tia sufiĉe ideala kultura movado kia estas nia, dum ili lernis la usonan lingvon energie aŭ kaprice pro sia profito aŭ snobismo, sed plejmulte sensukcese. Jen la reala stato de nia movado, ne tiel floranta okulkvide, nek brua orelaŭde kiel supoz-

eble vi pensus. Malgraŭ tio, mi atentigas vin ke nia movado neniam stagnas, sed progresas paŝon post paŝo firme kaj trankvile.

Mi prefere diru ke nia movado jam transiris en novan stadion de praktiko, post tiu de propagando. Tiu fakto pruviĝas precipe en la medio de sciencistoj-esperantistoj, kiuj ĉiam insistas kulturis sian kampon. Estas rimarkinde ke antaŭ 2 jaroj 80 sciencistoj promesis verki almenaŭ unu referaton en nia lingvo en ĉiu jaro. Gravaj sciencaj gazetoj jam akceptas Esperantajojn. Estante laiko mi ne kapblas doni specialan raporton pri ĉiu fako, sed mi prezentu al vi 2 eldonadojn por vulgariĝi la sciencoj: unu estas "Historio de Yukawa Teorio" (D-ro Yukawa estas nobelpremiito), kiun kompilis grupo da fizik-studentoj, alia estas "Kongreso Universitato 1951", kiu estas prelegaro de 4 profesoroj okaze de la 38-a Kongreso en Nagoya. La studentoj laboras ne nur studi sian fakon, sed

ankaŭ batali por paco per Esperanto kune kun laboristoj. Ili eldonis la libron "Aŭskultu Voĉojn de l'Oceano", postlasita leteraro de studento-soldatoj, kiuj en sia agonio avidis pacon kaj tradukis la "Infanoj de Atombombo"-n, verkaro de infanoj de 6-18 jaroj, kiuj suferis atombombon en Hiroŝima. Mi esperas ke tiu-ĉi jam publikiĝis en lasta septembro okaze de la 39-a Kongreso. Estas certe ke eksterlandaj samideanoj kortuŝite legos la librojn kaj ili des pli konvinkiĝos por defendi pacon.

Kiel vi jam konstatas, Esperanto estas lingvo skribata pli ol parolata interalie por japanoj. Ni, japanoj, ĉiam tre bedaŭras preskaŭ ne havi ŝancon interparoli kun alilandanoj. Ekzemple, la antaŭlastan kongreson en Nagoya partoprenis nur 2 usonanoj. Tia izolita situacio ege malhelpas progreson de nia movado. Vi neniam preterlasu eventualan bonŝancon viziti nian landon, kie—pli ol ĉie—vi ricevos varman bonvenigon.



## Frank Halls Raportas

Post la Universala Kongreso en Oslo, Frank aŭtomobilis laŭ la orienta marbordo de Svedujo tra Kalmar, Karlskrona kaj Kristianstad, kie la lokaj UEA-delegitoj kaj ceteraj samideanoj bone gastigis lin; tra Malmoe kaj per pramo al Kopenhago kie la vicprezidanto de la Centra Dana E-Ligo, s-ano G. Kuehlmann kaj edzino, kore akceptis lin; trans Danujo al Esbjerg, tiam sude al Germanujo (Flensburg, Schleswig, Hamburg) Kaj jen Frank raportas pri deprima sperto:

"Laŭ antaŭa arango mi vizitis en la urbo Uelzen kazernon por rifugiĝintoj el la rusa zono de Germanujo. Ĝis 500 geviroj kun infanoj alvenas ĉiutage el la rusa zono. Ili forlasas ĉion posedaĵon kaj riskas mortpafon por serĉi liberecon en la okcidentaj zonoj. Se ili povas pruvi politikan persekutadon

—kaj tio estas malfacile pruvi—ili ricevas dokumentojn. Nur 25% ricevas ilin, la ceteroj devus reiri al la rusa zono. Ĉar tio ne eblas, ili travagas Germanujon sen rajtigiloj, sen laboro, sen loĝejo, sen registara subvencio por senlaboruloj! La loĝantaro de Uelzen kreskis de 12000 al 50000 kaj nur unu infano el kvin havas liton, la aliaj devas dormi sur la planko. En apuda Hamburg estas pli ol 100,000 senlaboruloj. Kolonjo estas preskaŭ tute detruita urbo kaj miloj da homoj loĝas laŭ teruraj vivkondicoj. Eĉ la plej detruitaj domoj enhavas homojn de la senluma kelo ĝis la plej alta etaĝo."

De Koeln Frank veturis laŭ la belega Rejnvalo, tra prosperaspektanta Wiesbaden al Frankfurt, kie la malnova E-pioniro Carl Barthel kore bonvenigis lin. Ĉi-tiu persone konis D-ron Zamenhof. De tie li iris al Nuernberg, kie li faris prelegon kun lumbildoj en "Amerika Haus". Sekvontage li vizitis orfejon kaj junulhejmon. Dum tiuj vizitoj E-o multe helpis kiel traduklingvo. De Nuernberg li daŭrigis al Munheno, kie s-ano Deubler gvidis lin dum 2 tagoj tra la urbo kaj al la iama koncentrejo Dachau.

Gi nun estas muzeo kun la titolo "Nie wieder" ("Neniam plu"). Frank vidis la gas-kameron, kiu estis aranĝita por aspekti kiel spruĉbanejo, por ke la viktimoj ne suspektu la veron. Li vidis ankaŭ la fornon, kie oni bruligis la kadavrojn. 60 s-anoj ĉeestis kiam Frank montris lumbildojn en la Munhena E-klubo.

"Sekvis Berchtesgaden, kie mi vizitis la ruinojn de la Hitlerdomo, kiun esplodigis la usona armeo. Apud Berchtesgaden mi eniris salminejojn, kie Goering metis dum la milito art-trezorojn, forŝtelitajn de aliaj landoj.

Kaj nun venis unu el la plej ĝuidaj spertoj de mia vojaĝo, vizito al la treege pitoreska vilaĝo Reit im Winkel en Bavarujo, rekte ĉe la aŭstria landlimo. La loko estas tiel izolita ke la UEA-delegito s-ano de Marich, afabla, helpema 70-jarulo, dum 8 jaroj vidis nur unu esperantiston kaj preskaŭ ploris pro ĝojo kiam mi alvenis. De tie mi veturis tra Oberammergau, mondkonata pro siaj religiaj festludoj (angle Passion Plays), al Stuttgart, kie mi vizitis multajn junulhejmojn kaj registarajn oficejojn, E-istino agante kiel interpretistino; de Stuttgart tra la Nigra Arbaro al Freiburg kaj de tie al la svisa urbo Romanshorn.

Jen mi havis strangan sperton: En la hejmo de la UEA delegito estis alia sviso el la franclingva regiono, kaj la 2 svislandanoj nur per Esperanto povis interkompreniĝi! La delegito de St. Gallen kondukis min al la mondfama infanvilaĝo ĉe Trogen, mirinda institucio kiu prizorgas infanojn el 9 landoj. La direktoro provizis al mi multe da materialo tre taŭga por mi en Aŭstralio. Al la E-grupo en St. Gallen mi montris filmojn kaj la anoj rekompencis pagante miajn hotel-elspezojn. Same faris la grupo en Thun, en la bela lag-distrikto de Centra Svisujo. De la mirinde bela urbo Interlaken, kiu kuŝas inter 2 grandaj lagoj, mi ĝuis bonegan rigardon al la neĝkov-rita "Jungfrau"-montego.

Interesa urbo estas Bern, kie mi ĝuis sengvidantan vagadon tra la

urbo. La hotelo Metropol, renkontejo de la loka E-grupo, apartenas al E-istino. Kiam oni forlasas Bern oni baldaŭ eniras la franclingvan regionon, kiu ne tiel plaĉis al mi kiel la germanlingva. Germanvisoj havas almenaŭ bazan scion de la franca lingvo, sed francaj svisoj parolas nur france.

Entute mi konstatis ke Svislando havas altan vivnivelon, stabilan politikan situacion kaj la lando estas prospera, sed la prezoj estas terure altaj. (Tranokto kaj matenmanĝo ofte kostas 30ŝ. kaj vespermanĝo pli ol 10ŝ.) (Komp. H.K.)

## Recenzoj

### Mezamerika Revuo

estas nova organo de Gvatemala E-ista Asocio (ĉe 15 C. No. 3-71, Gvatemala, Centra Ameriko) Jarbono 0.80 de dolaro. El ĝia interesa enhavo ni represas ĉi-suban artikolon:

### Kostariko, lando sen armeo.

En la mezamerika lando Kostariko dum multaj jaroj regadis trankvilaj demokrataj registaroj, kaj ĝia armeo liveris sian lastan grandan batalin antaŭ 100 jaroj, kontraŭ la "filibusteroj". Dum la lasta jardeko, diktatoro ekregis tie, kaj tiam eta "kariba legiono" organizis ĝian liberigon. Fine en 1948, la nova demokrata registaro, por elmontri sian pacifismon kaj siajn bonajn intencojn, forigis la armeon, retenante nur internan policon por la prizorgo de sekureco. Imitinda ekzemplo de relative malgranda lando, en tiuj ĉi nesekuraj tempoj de atombomba minaco.

## Lingvaj Problemoj

### Ac, FI

Pri ili estas dubo pri senco. En 1909 Boirac, kiu enkondukis -aĉ, difinis ĝin jene: "(Gi) estas kvazaŭ morale malplejgrandiga, kaj aldonas malŝatan nuancon al ĉiuspeca radiko, kun kiu oni kombinas ĝin: domaĉo, obstinaĉa, ridaĉi k.t.p."

Plena Gramatiko: Ĝi aldonas nuancon de malŝato, malestimo.

Millidge: expresses contempt, serious or comic.

Step by Step: denotes a poor opinion of the matter in question; dislike, disparagement, contempt, censure.

Minor: denotes ugliness of form in objects, actions or qualities; aĉa, ĉevalo (an ugly horse); parolaci (to speak in slang, argot); aĉe paroli (to speak badly, as regards form and pronunciation) dikaĉa (bloated); aĉe dika (of an ugly over-corpulence).

Fi- ne troviĝas en la Universala Vortaro (1894); en la Unua Aldono (1909) troviĝas krio fi! (Fr. pfui; Angla fie) La Angla "fie" signifas "Shame!" Boirac nomas -aĉ nova en 1909.

Malgraŭ la diro de Boirac, moralan subtonon -aĉ propre ne havas. Tio apartenas al fi-. Vortoj kiaj viventro, fihundo estas arkaismoj, domaĉo (slum, hovel. en kiu tamen povas loĝi honestuloj); fidomo (bordelo aŭ simila); homaĉo (a ragamuffin, senkarakterata homo, kiu tamen povas esti morale sana); fihomo (malmorala, malĉasta homo); agaĉo (stulta, fuŝa ago); fiago (ago de maldeco, naŭza ago).

"Swagman" (Aŭstralia vojvaguulo) povas esti viraĉo, ĉar lia aspekto estas tre malagrabra, malloga. Tamen li povas ankaŭ esti honesta, sincera animo de l'naturu kaj amanto de siaj kunhomoj. Li tiuokaze neniel estus fihomo!

Pri hundo ni korekte dirus pri malbela, mizera besto: hundaĉo.

Sed la lingvo ne estas entenebla en tre strikte logika kadro, kaj ni iufoje subkonscie atribuas al hundo la moralajn ecojn de la homoj, nomante ĝin fihundo pro imagata simileco de hunda al homa karaktero.

Simile pri objektoj kiaj manoj, okuloj. Fortenu viajn fimanajn for de tiuj kukoj. Tie la patrino transmetas la moralajn kvalitojn de la infanoj rekte en iliajn manojn. Li lasis siajn fiokulojn volupte gliti sur la belajn formojn de la nudaj dancistinoj. Tie la malĉasta naturo de la alrigardanto estas centrita en la vidorganoj, kaj ili rajte prenas metafore la fian karakteron de la homo mem.

—F.R.B.

### SPECIAL THANKS

to our supporters: Messrs. F. Bannham. 32/6; B. Schofield, P. Dikstejn, Mrs. E. Turnbull. 20/- (each).

### GIVE 'BOOKS FOR CHRISTMAS.

To your local or public lending library give a copy of "LIFE OF ZAMENHOF," by Dr. Privat. English, cloth-bound, only 5/6.

Grammar & Commentary (Cox) 10/-  
Practical Course in E-o (Szilagy) 3/-  
English-Esperanto Dictionary

(Fulcher & Long) . . . . . 16/6

Esperanto-English (Millidge) . . 17/6

Plena Vortaro de E-o . . . . . 31/-  
Leteroj de Zamenhof—

Vol. I . . . . . 27/6

Vol. II . . . . . 27/6

The Language Problem (Durrant) 2/-  
Vivo de Zamenhof (Privat) . . 7/-

Fundamenta Krestomatio  
(Zamenhof) . . . . . 15/-

### READ "EPOKO" BOOKS

Light reading for an idle hour.

1. Murdo en la Orienta Ekspreso  
(Christie).

2. La Knaboj de Paŭlo-strato  
(Molnar).

3. La Princo kaj Betty (Wodehouse).

4. La Tempo-Maŝino (H. G. Wells).

5. Princino de Marso (Burroughs).

6. Colomba (Merimee).

7. Sep Vangofrapoj (Aszlanyi).

8. La Virineto en Bluo (M. Stuttard).

9. Brulanta Sekreto (Zweig).

10. Kiso de la Reĝino (Navjivin).

Nos. 1 to 6 each 3/6.

Nos. 7 to 10 each 5/-.

### ORDER BOOKS FROM:

Mrs. O. Glenie, 12 Crimea St., St. Kilda, Vic.

Mr. A. Towsey, 41 Hill St., Parkes, N.S.W.

Miss E. B. Carrick, 167 Lytton Rd., East Brisbane.

Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Add 10% for postage.

### SUBSCRIPTIONS RECEIVED

Mesd. Brown, 6/3; O. Glenie, 12/6;

Misses Samblebe, 2/-; Willans, 12/6;

Messrs. Gleisher, 6/3; Collier, Ram-

sey, 12/6; J. Dudley, 13/-; Canberra

E-Club, 13/-; E-League of W.A.,

£18/3/6 (29 members).